

Arturo Conan Doyle

La Aventuroj

de

ŜERLOKO HOLMSO.

Verko el la publika fako.

https://fr.wikisource.org/wiki/Les_Aventures_de_Sherlock_Holmes

Enhava tabelo.

Antaŭparolo.....	3
La blua Grenato.....	7
La Aventuro de la Punktita Bendo.....	32
La Dikfingro de la Inĝeniero.....	62
La Fraŭla Aristokrato.....	86
La Diademo de Beriloj.....	112
La Purpuraj Fagoj.....	140

Antaŭparolo.

Al ĉiuj kiuj interesiĝas pri literaturaj aferoj, la nuna epoko prezentas vastan observkampon, tiel bone eksterlanden kiel en Francio. Nia jarcento tro rapide vivis; la inventoj de scienco, la modifoj okazigitaj en ĉiutaga vivo sin sekvis tro rapide por ke niaj samtempuloj povu sufiĉe digesti ĉi tiujn novaĵojn, senĉese renovigitaj; kaj multe da malkvietaj cerboj fantaziis renversi la inteligentan kampon, kiel oni renversis sub iliaj okuloj la sciencan kampon. Tiel estas ke en Francio oni alvenis per la unua fojo al ridinda troigo. Deziranta forlasi tiun belan, simplan kaj klaran lingvon kiu estis unu el la belaĵoj de nia nacia literaturo, sciante doni al ideoj formon kiun ĉiu el ili postulis, la junuloj volis novigi; kaj sub la etikedo de **simbolistoj**, de **dekadencistoj**, de egotistoj, ktp., ili enviciĝis sub malsamajn standardojn, kiuj ĉiuj devus ekzerge porti nur tiun ĉi vorton surskribita per majusklaĵ literoj : mistifikantoj.

En Anglujo ĉi tiu intelekta movado, pro esti estinta pli malrapide kaj senteme, tamen ekzistas. La angla literaturo ekde longege sin trenis en zorgiga rutino, kiam kelkaj verkistoj decidis reakiri sian sendependecon. Ekster la blovo kiu pasis sur ĉiujn civilizitajn naciojn, la angloj havis aliajn kialojn por vidi sian literaturon ŝanĝiĝi. Sen paroli pri Ameriko, la kolonioj de Hindio, de Kaburbo, de Aŭstralio prenis sufiĉe grandan aŭtonomion por kapabli teni sian lokon rilate al intelekto tiel bone kiel rilate al financo; kaj la gefiloj de la nebula Albiono, transportitaj en tiujn landojn de la suno, jam naskis junajn civitanojn kun ideoj ofte tre malsamaj de tiuj de iliaj gepatroj.

Sed la disvolvado de tia temo kuntirus nin multe tro for kaj ni simple volas prezenti al la legantoj unu el la

nuntempe plej laŭmodaj anglaj verkistoj. La formo kiun li adoptis, la temoj kiujn li traktas, neniel konformiĝas al la malnova modelo en kiu, antaŭ nur malmulte da jaroj, ĉiuj klasikaj romanoj sin ŝovis; kaj nenio povas pli bone pruvi kiom ĉi tiu bezono de intelekta renoviĝo fariĝis sentebla, ol la grandega sukceso konkerita de liaj verkoj.

Kun tridek jaroj, D^{ro} Conan Doyle ĝuis tian reputacion kiun la Usonanoj, kiuj ŝatas zorge kontempli samtempajn famulojn, faris al li oran ponton por veni doni en Usonon serion da prelegoj pri la angla literaturo kaj speciale pri lia verko.

Ĉi tiu verko povas esti dividita en du ĉefajn branĉojn : unu, alligante sin al la historia ĝenro, indikas pri sia aŭtoro profundan erudicion kaj paciencajn esploradojn; tiel estas ke, antaŭ ol eldoni *"La Blankan Kompanion"*, milita rakonto, kiu okazas duone en Anglio kaj duone en Francio aŭ Hispanio, dum la reĝado de Eduardo la 3^a, li dediĉis du tutajn jarojn al la studado de la 14^a jarcento. Kompreneble, estas ĉi tiu parto de lia verko kiun la aŭtoro preferas, same kiel patrino sentas apartan tenerecon al la infano kiun ŝi plej malfacile edukis.

La alia ĝenro kiun D^{ro} Conan Doyle zorgis kun egala sukceso, estas tute alia : ĝi estas tiu kies specimenon ni intencas proponi, konvinkita ke ĝi interesos esperantajn legantojn kiel ĝi fascinis legantojn de Anglio, estas la sensacia ĝenro de la romanoj de Gaboriau; sed devus suferi nia nacia orgojlo, dum Gaboriau scias eltiri el sia inventema cerbo la plej eksterordinarajn implikaĵojn, la stilo, la skribmaniero, por uzi profesian vorton, ofte restas tre malsupera. Doyle, male, parolas per sobra, firma, ofte eleganta lingvo, kaj ĉiam sin montras unuarangan verkiston.

La M. Lakoko enscenigita de Conan Doyle, nomiĝas Ŝerloko Holms. Strangan aferon, ĉi tiu diletanta policisto, for de esti fikciulo, entute kreita de la imagopovo de la

aŭtoro, estas nur la preskaŭ ĝusta figuraĵo de ulo kiun multe vizitis la doktoro Doyle. Li estis maljuna militista kuracisto, profesoro ĉe la malsanulejo de **Edinburgo** kaj nomita de lia vera nomo **Jozefo Bell**. Lia observemo, liaj sagaca kaj dedukta kapabloj estis tiaj ke, vidante klienton unuafoje, li ofte divenis la plej sekretajn detalojn de lia ekzisto kaj rivelis ilin kun ĝusteco kiu neniam deflankiĝis. Doyle prenis lin kiel modelon de sia Ŝerloko Holms kaj elpensis sensaciajn rakontojn por reliefigi tiajn eksterordinarajn kapablojn.

La labormetodo de doktoro Doyle meritas estis raportita : li komencas koncepti la krimon aŭ la okazaĵon kiu servas kiel bazon de lia rakonto; poste li iom post iom ŝpinas, per ia sinteza metodo, la implikaĵojn kaj la malfacilaĵojn super kiuj lia heroo devos triumfi.

Kelkaj biografiaj notoj pri doktoro Conan Doyle ŝajnas devi antaŭi la tradukon de unu el liaj verkoj. De skota deveno, li apartenas al familio de artistoj, iam lokitaj en Edinburgo. Lia avo, Johano Doyle, estis la fama H. B. kies politikaj karikaturoj ekscitis dum tridek sinsekvaj jaroj la scivolemon de liaj tiamuloj sen tio ke ili iam ajn sukcesu malkovri la anonimecon de la aŭtoro. Oni povas vidi kelkajn el liaj verkoj ĉe la Brita Muzeo, kiu pagis ilin je la deca prezo de kvardek mil frankoj.

La filo de la unua, **Rikardo Doyle**, estas la aŭtoro de la desegno kiu ankoraŭ hodiaŭ ornamas la kovrilon de la gazeto "*Le Punch*" (La vigleco).

Conan Doyle, li, estis sendita je la aĝo de naŭ jaroj al la jezuita gimnazio de Stonyhurst ĉar li estis katoliko. Liaj literaturaj gustoj jam aperis. Baldaŭ, fakte, li fondis en la kolegio ian gazeton; li same agis en germana universitato kie li estis sendita kelkajn jarojn poste; sed ĉi tie liaj liberalaj opinioj preskaŭ ludis al li malbonan malicaĵon, ĉar temis serioze foririgi la tro frumaturan ĵurnaliston. Reveninta en

Edinburgo, li komencis siajn medicinajn studojn kiujn li tamen interrompis dum unu jaro por efektiviĝi danĝeran ekspedicion en la Arktaj maroj surŝipe de balenŝipo; li tiam havis nur dudek unu jarojn. Tuj akceptita kiel doktoro pri medicino kaj post vojaĝadoj en Afriko kaj Azio, li ekloĝis en Southsea kaj tiam povis pli facile sin dediĉi al sia emo por literaturo. Sed liaj unuaj eseoj estis akceptitaj de la eldonistoj por tiom mokaj prezoj ke li ne kuraĝis forlasi sian karieron. Tamen, post la grandega sukceso akirita de "*La Blanka Kompanio*", li decidis veni loĝi en Londono kiel okulisto. Apenaŭ instalita, cedante al la instigaj petoj kiuj ĉiufланke venis al li, li definitive forĵetis eksteren la kuracarton kaj sin tute dediĉis al literaturo. Estas en tiu epoko ke, kontribuanta en *StrandMagazino*, li publikigis "*La Aventurojn de Ŝerloko Holms*", kies la reago estis giganta kaj kiu devis de ne multe antaŭi "*La Memuarojn*".

Fizike granda, larĝaŝultra, kun malkaŝema vizaĝo kvankam kun sufiĉe timema ŝajno, Conan Doyle prezentis unuavide bildon de la forto. Ĉiuj sportoj cetere estis kutimaj al li; li ne estis homo de studadoj sin izolanta en sia kabineto; tute male. Naturdotita per granda laborkapablo, unuigita kun eminenta facileco, li skribis matene kaj vespere, sed la posttagmezo estis dediĉita al fizikaj ekzercadoj pri kiuj li spertiĝis. Tute lerta en kriketo, en hokeo, ktp...

Somere, oni renkontis lin sur lia tandem-triciklo, akompanita de S^{ino} Conan Doyle. Vintre li piedvestis skiojn, tiujn longajn Norvegajn neĝrakedojn, kaj mirigis la svisajn gvidistojn per la nekredeblaj ekskursoj kiujn li realigis en la neĝkovritaj montoj en la ĉirkaŭaĵoj de Davos. Resume, li estis, kiel kunulo, ĉarma homo kaj tuj kiam oni konis lin, oni eksentis sin allogita al li de nerezistebla simpatio.

La allogo kiun oni tiel rapide sentis al la homo, ni esperas ke la publiko spertos ĝin por la verko.

La blua Grenato.

La postmorgaŭon de Kristnasko, mi dummatene pasis ĉe mia amiko Ŝerloko Holmsø por deziri al li bonan novjaron. Li estis en hejmkajo, maldiligente kuŝinta sur sofo; permane trafeblajn pipon kaj amason da gazetoj kiujn li certe legis kaj relegis tiom ili estis ĉifitaj; iom pli for, sur la dorsapogilo de pajla seĝo, malnova ĉapelo el malmola felto, tre eluzita kaj tubera. Mikroskopo kaj ĉapelformilo, metita sur la seĝo mem, atestis ke la ĉapelo estis certe tie metita por esti atente ekzamenata.

- Vi ŝajnas al mi tre okupata, kara mia, mi diris al Holmsø, kaj mi timas ĝeni vin.

- Ne, mi ja ĝojas povi diskuti kun amiko pri la rezulto kiun mi ĵus atingis : afero cetere el la plej banalaj, li aldonis, montrante per fingro la eluzitan ĉapelon; sed, post observado, miksiĝas al ĝi iaj apartaĵoj interesaj kaj eĉ instruaj.

Mi sidiĝis en fotelon; estis terure malvarme, la fenestraj vitroj estis kovritaj de prujno kaj varmiginte miajn manojn ĉe la fajro kiu kraketis en la kameno :

- Mi supozas, diris mi, ke la okazaĵo kiu okupas vin, kiel ajn simpla tio ŝajnas, rilatas al ia ajn murdo, kaj ke jen la indico per kiu vi malkovros misteron kaj vi punos krimon.

- Ne, ne, ne temas pri krimo, diras Ŝerloko Holmsø, ridante, sed nur pri unu el tiuj strangaj incidentoj kiuj okazas en la urbocentroj kie kvar milionoj da homoj perkubutas en spaco de kelkaj kvadrataj kilometroj.

La iro-reiroj de ĉi tiu homa svarmo, tiel kompakta, tiel densa, povas kaŭzi, krom la krimoj, ĉiujn eblajn eventojn kaj la plej strangajn problemojn; ni havis la pruvon pli ol

unufoje, ĉu ne estas vere ?

- Efektive, mi respondis, kaj inter la ses lastaj juĝaj aferoj kiujn mi raportis en miaj notoj, tri estis tute ne submetitaj al tio kion la leĝo kvalitigas per la nomo de krimo.

- Ĝuste. Mi vidas ke vi aludas pri miaj klopodoj por ekakiri la paperojn de Irena Adler, en la kurioza aventuro de ^{fino} Maria Suterlando, kaj en la historio de la viro kun malrekta buŝo. Nu ! Mi estas konvinkita ke la koncerna afero enŝoviĝos en la kategorion de tiuj kiuj ĉefine ne havas krimon. Ĉu vi konas Peterson, la komisiiston ?

- Jes.

- Nu ! Estas al li ke apartenas ĉi tiu trofeo.

- Tio estas lia ĉapelo ?

- Ne, li trovis ĝin. La proprietulo estas nekonata.

Rigardu ĝin, mi petegas vin, ne kiel simplan kapveston sed kiel intelekta problemo. Kaj unue mi diru al vi kiel ĝi tie troviĝas. Ĝi eniris ĉi tien dum la Kristnaska mateno en akompano de bona ansero kiu sendube estas rostiĝanta antaŭ la fajro de Peterson. Sed mi rekomencas la historion ĉe ĝia komenco.

...Ĉirkaŭ la kvara matene, dum Kristnaska tago, Peterson, tre honesta knabo, vi scias tion, revenis de iu vespermanĝo kaj hejmeniris laŭ Totenhamo Kortstrato kiam antaŭ li, li ekvidis, en la lumo de la gaslampo, altstaturan homon kiu iris per ŝanceliĝa paŝado, portante anseron sur sia ŝultro.

...Kiam li atingis la angulon de la strato Goĝo, disputo aŭdiĝis inter ĉi tiu individuo kaj grupeto da knaboj. Unu el ĉi tiuj ĵetis teren, per sia bastono kiu servis al li kiel defendan armilon, la ĉapelon de la viro, poste ĵetanta la bastonon, frakasis la fenestron de la butiko kiu estis malantaŭ li.

...Peterson kuregis al la helpo de la fremdulo, sed la viro, timigita de la malordigado kies li estis la kaŭzo, kaj vidante

individuon en uniformo antaŭenkuri al li, lasis fali la anseron, pelis siajn piedojn kaj malaperis en la labirinto de etaj stratoj kiuj troviĝas malantaŭ Totenhamo Kortstrato. La knaboj, siaflanke, fuĝis ĉe la vido de Peterson, tiel ke li restis mastro de la batalkampo kaj en posedo de la trofeoj de venko en la formo de tubera ĉapelo kaj de belega ansero de Kristnasko.

- Trofeoj kiujn li certe redonis al sia proprietulo.

- Kara amiko mia, jen kie estas la proverbo. Estas vere ke la ansero portis alligita al la maldekstra kruro, karton kun la surskribo "por S^{ino} Henriko Bakisto" kaj ke la inicialoj H. B. estas legeblaj funde de la ĉapelo; sed ĉar ekzistas kelkaj miloj da Bakisto kaj kelkaj centoj da Henriko Bakisto en nia urbo, ne estas facile redoni al ĉiu, tion kion li povis esti perdinta.

- Nu, kion faris Peterson ?

- Li alportis al mi en la mateno de kristnasko, la ĉapelon kaj la anseron por flati mian manion, ĉar li scias kiom mi ŝatas solvi problemojn, kiom ajn bagatelaj ili unuavide ŝajnas. Ni konservis la anseron ĝis ĉi tiu mateno, estis la lasta limo kiun ĝi kapablis atingi, kaj tiu kiu trovis ĝin, kunprenis ĝin por suferigi al ĝi la ordinaran sorton de ĉiu grasa ansero, dum mi ja konservis la ĉapelon de la nekonatulo tiel bedaŭrinde senigita de lian Kristnaskan vespermanĝon.

- Ĉu li ne aperigis anoncojn en la gazetoj ?

- Ne.

- Do, kiaj indikaĵoj vi povas havi pri lia identeco ?

- Nenio alia ol tiuj kiujn ni povas dedukti per ni mem.

- De lia ĉapelo ?

- Precize.

- Sed vi ŝercas, kion vi povas sciiĝi el ĉi tiu malnova tubera ĉapelo ?

- Jen mia lupo. Vi konas mian sistemon. Kion vi pensas pri la viro kiu surmetis ĉi tiun kapveston ?

Mi ekprenis la ĉapelon kaj, post esti turninte ĝin kaj returninte en ĉiuj direktoj, mi sentis min tre embarasita. Ĝi estis bulĉapelo el malmola felto kaj tre ordinara, tute eluzita. Ĝi estis subŝtofitita per ruĝa silko kiu ŝanĝis tonon. Ĝi ne portis la nomon de la fabrikisto; sed kiel Holmsø rimarkigis tion, la inicialoj H. B. estis rapide skribitaj sur unu el la flankoj. La rando estis trapikita por alligi ŝnureton, kiu cetere mankis. Fine, ĝi estis truita kaj kovrita de polvo kaj makuloj kiujn oni provis kaŝi kolorŝmirinte ilin per inko.

- Mi ne pli progresis ol antaŭ mia ekzameno, mi diris, redonante la ĉapelon al mia amiko.

- Vi estas tre observema, sed vi ne scias, per la rezonado, eltiri konkludojn de tio kion vi havas antaŭ la okuloj.

- Do diru al mi, mi petegas vin, tion kion vi kapablas dedukti pri ĉi tiu ĉapelo ?

Holmsø levprenis ĝin kaj ekzamenis ĝin per la akrasenteco kiu estis tiom karakteriza ĉe li.

- Eble ĝi estas malpli sugesta ol ĝi povintus esti, li rimarkis, kaj tamen mi tiras el ĝi plurajn deduktojn, kies nur kelkaj tre klaraj, aliaj fonditaj sur seriozaj probablecoj. Estas evidente ke la posedanto de ĉi tiu ĉapelo estis ekstreme inteligenta, kaj ke en tiuj ĉi lastaj jaroj li troviĝis en situacio kiu, de senĝena fariĝis malfacila. Li estis antaŭzorga, sed estas tia multe malpli hodiaŭ, tio estas la pruvo de morala regreso kiu, aldonita al la malkreskiĝo de lia riĉaĵo, ŝajnas indiki ian malvirton en lia vivo, probable tiun de drinkado. Ĉi tio sufiĉe klarigas kial lia edzino ne plu amas lin.

- Sufiĉe, Holmsø.

- Li tamen gardis ian respekton al konveneco, li daŭrigis, sen ŝajni esti aŭdinta mian ekkriion. Li estas mezaĝa viro kiu fikshejme vivas, malmulte eliras, ne estas tre aktiva. Li grasas per ŝmiraĵo siajn griziĝantajn harojn kiujn li ĵus tondigis. Jen tio kion la observado de ĉi tiu ĉapelo sciigas al mi el la plej elstaraj. Ha ! Mi forgesis aldoni ke probable ne estas gaso en la domo en kiu loĝas nia heroo.

- Vi ŝercas, certe, Holmso.

- Tute ne. Kial do ! Vi eĉ ne kapablas, kiam mi metas al vi punktojn super "i", kompreni la manieron kies mi bone elturniĝas ?

- Mi evidente estas nur stultulo, tute nekapabla sekvi vin. Ekzemple, kiel vi povas scii ke ĉi tiu viro estis inteligenta ?

Anstataŭ ĉia respondo, Holmso metis sur sian kapon la ĉapelon kiu surglitis ĝis liaj okuloj.

- Estas simpla afero de kubo : viro kiu havas tiom ampleksan kranion, devas havi esceptajn kapablojn.

- Kaj pri la malkreskiĝo de lia riĉaĵo ?

- Ĉi tiu ĉapelo datiĝas de tri jaroj; nu en tiu momento ĝiaj plataj randoj, iomete kuspitaj, estis laŭmodaj. Poste, ĝi estas ĉapelo el la plej alta kvalito. Vidu do la dike grajnecan bendon kiu borderas ĝin kaj ĝian zorgitan subŝtofon. Se tiu viro havis sufiĉe por aĉeti al si, antaŭ tri jaroj, ĉapelon el tiu prezo kaj ke de tiam li ne havis alian, mi konkludas ke lia situacio estas hodiaŭ malpli bone ol ĝi estis.

- Ĉio ĉi ŝajnas sufiĉe klara, sed kiel vi klarigos kaj lian antaŭzorgecon kaj lian moralan regreson ?

Ŝerloko Holmso ridetis.

- Jen la klarigo de lia antaŭzorgeco, li diras, metante sian fingron sur la malgrandan diskon kaj la ringon destinitaj por la ŝnureto de la ĉapelo, ĉi tio lokiĝas nur laŭ mendo, kaj se tiu viro metigis ĉi tiun ŝnureton pro antaŭzorgo kontraŭ la vento, tio ja estas pruvo ke li estas dotita de ia

antaŭzorgeco. Tamen, mi rimarkas ke la kaŭĉuko estanta rompiĝinta, li ne klopodis por anstataŭigi ĝin, do mi asertas ke li havas malpli da antaŭzorgeco nun ol antaŭe, pruvo de malfortiĝo de liaj kapabloj. Sed restas ankoraŭ al li ia respekton al la konvenecoj, ĉar li provis kaŝi la makulojn de sia ĉapelo kolorŝmirinte ilin per inko.

- Via rezonado estas tre ĝusta.

- Mi aldonis ke li estas mezaĝa, ke liaj haroj griziĝas, ke li antaŭnelonge tondigis ilin kaj ke li uzas ŝmiraĵon. Vi povus konvinki vin kiel mi zorge ekzamenante la suban parton de la subŝtofo. La lupeo malkovras al mi multajn harerojn tonditajn evidente de barbiro. Eliĝas el ili odoron de graso kaj ili kune gluiĝis. Finfine, ĉi tiu polvo, tute ne gruzeca kaj griza kiel tiu de la strato, estas bruneta kaj flokeca kiel tiu kiun oni levas en la domoj; ĉi tiu ĉapelo estas do pli ofte pendigita ol surmetita; kaj la spuroj de ŝimo kiujn mi rimarkas interne, pravas al mi ke tiu kiu portis ĝin, ne kutimis al la uzado ĉar li tiel facile ŝvitis.

- Vi aldonis ke lia edzino ne plu amas lin.

- Ĉu vi ne rimarkis ke ĉi tiu ĉapelo ne estis broŝita ekde pluraj semajnoj ? Kara Watŝono mia, kiam via edzino lasos vin foriri kun ĉapelo ne broŝita kaj ke mi vidos vin tiel alveni ĉe mi, mi havos dubojn pri la bona harmonio de via paro.

- Eble via viro estas fraŭlo ?

- Certe ne. Li kunportis anseron kiel pruvon de paco al sia edzino. Rememoru do la ŝnuron ligitan al la kruro de la ansero.

- Vi havas respondon al ĉio, kie diable vi nun vidas ke ne estas gaso en lia domo ?

- Akcepteble se estis nur unu makulo el kandelo, sed kiam mi nombras almenaŭ kvin de ĝi, estas ja evidente ke la koncerna ulo kutime uzas ĉi tiun lumigadan manieron, kaj ke li hejme supreniras nokte kun sia ĉapelo en iu mano kaj sia

ŝvitanta kandelo en la alia. Ĉiaokaze, ĉi tiuj makuloj ne devenas de gaslampo. Ĉu vi estas kontenta ?

- Estas tre sagaca, mi diris ridante, sed ĉar okazis nek krimo nek kaŭzita damaĝo, krom perdo de ansero, vi ja, ŝajnas al mi, perdis vian tempon.

Ŝerloko Holmsó estis respondonta kiam la pordo subite malfermiĝis. Peterson, la komisiisto, aperis sur la sojlon, kun la vangoj purpuriĝintaj, la mieno tute konfuzita.

- La ansero, sinjoro Holmsó ! La ansero, sinjoro ! li pene eldiris.

- Nu, kio ! Ĉu ĝi revenis al la vivo kaj ĉu ĝi forflugis tra la fenestro de la kuirejo ?

Holmsó ŝanĝis lokon por pli bone observi la sinsekvon da fizionomio de la vizitanto.

- Vidu do, sinjoro, vidu tion kion mia edzino trovis en la glutejo de la ansero.

Kaj li etendis la manon por montri al mi bluan ŝtonon dimensie kiel fazeolo, sed kun travidebleco kaj brileco tiaj ke ĝi ŝajnis luma punkto. Ŝerloko Holmsó rektiĝis ekfajfante.

- Oho, Peterson, vi tie faris multvaloran trovaĵon; mi supozas ke vi scias kiu estas ĉi tiu ŝtono ?

- Juvelŝtono; diamanto : ĝi eniras en la vitron kiel en paston !

- Kara mia; ĝi estas pli ol juvelŝtono : ĝi estas "la juvelŝtono" !

- Ĉu hazarde ĝi estus la blua grenato de la grafino de **Morkaro** ? mi ekkriis.

- Ĝuste : mi konis kaj la dimension kaj la formon per la anonco kiun tage publikigas "*La Tempo*". Ĝi estas tute unika juvelo kies oni ne povas taksi la valoron, sed estas certe ke la mil sterlingoj kiujn oni promesas al tiu kiu revenigos ĝin, ne estas la dudekona parto de ĝia

merkatvaloro.

- Mil pundojn, Dio granda !

Kaj la kompatinda komisiisto falis sur seĝon, rigardante nin unu post la alia kun mirego.

- Jes; estas ja la promesita rekompenco, reparolis Holmso; mi havas ĉiun kialon por kredi ke romano alligās al ĉi tiu ŝtono kaj ke la grafino de Morkaro volonte oferus duonon de sia riĉaĵo por retrovi ĝin.

- Ŝajnas al mi, mi diris, ke la juvelo estis perdita ĉe la hotelo *Kosmopolito*.

- Ĝuste la 22^{an} de decembro, antaŭ kvin tagoj ekde tio. La suspektoj pezis sur la plumbisto, Johano Hornero, kiu estis akuzita esti ŝtelinta ĝin en la juvelkesteto de la damo. Estis tiom da konjektoj kontraŭ li, ke la kazo estis sendita al la asizoj. Mi kredas havi ĉi tie raporton pri la afero.

Li unu post unu reprenis siajn ĵurnalojn, rigardante la datojn ĝis kiam fine li trafis la jenan paragrafon :

"Kosmopolito Hotelo, ŝtelo de juveloj.

Johano Hornero, dudek ses jaroj, estas akuzata esti ŝtelinta dum la 22^a ĉimonate en la juvelkesteto de la grafino de Morkaro, la multvaloran juvelon konata sub la nomo de "la blua grenato". Ĵakvo Ridero, la ĉefservisto, atestis ke li enkondukis Hornero" en la tualetejon de la grafino en la tago de la ŝtelo, por luti la duan stangon de la kamena krado kiu estis rompita. Li kelktempe restis kun Hornero, sed fine estis eksteren alvokita; reveninte, li rimarkis ke Hornero malaperis, ke la skribotablo estis enrumpita kaj ke la kesteto el marokeno en kiu, kiel oni eksciis pli poste, la grafino kutimis meti siajn juvelojn, estis malplena sur la tablo de la tualetejo. Ridero tuj sonorigis alarmon kaj Hornero estis arestita la saman vesperon; sed la ŝtono ne povis esti trovita nek sur li nek ĉe li. Katerina Kusako, la ĉambristino de la grafino,

depoziciis ke ŝi aŭdis la timegan krion de Ridero malkovrante la ŝtelon kaj ŝi ekrapidegis al la ĉambro kie ŝi trovis la aferojn tiel kiel la lasta atestanto. priskribis ilin. La inspektoro Larĝstrato de la fako B, atestas pri la aresto de Hornero, kiu furioze baraktis kaj certigis sian senkulpecon per la plej fortegaj vortoj. Ĉar oni sukcesis pruvi ke la arestito estis jam kondamnita pro ŝtelo, la juĝisto rifuzis juĝi la kazon sen antaŭa enketo kaj li submetis ĝin al la asizoj.

Hornero, kiu dum la proceduro, donis la signojn de la plej intensa emocio, svenis je la momento de la verdikto kaj oni estis devigita kunporti lin ekster la ĉambron".

- Hm ! Jen pri la polica tribunalo, diras Holmsø kun revema mieno ĵetante flanken la gazeton. La demando kiu restas al ni por solvi, estas la serio da eventoj kiuj okazis inter juvelkesteto priŝtelita kaj la kropo de ansero trovita en Totenhamo Kortstrato. Vi vidas, Vatsono, niaj malgrandaj deduktoj subite ricevis multe pli gravan kaj malpli naivan aspekton. Jen la ŝtono : ĉi tiu ŝtono estis trovita en ansero kaj la ansero apartenis al S^{ro} Henriko Bakisto, la sinjoro kun la malnova sugesta ĉapelo pri kiu mi tiel longe parolis al vi. Tiel ke nun necesas tre serioze ekserĉi ĉi tiun individuon kaj certigi al ni pri la rolo kiun li ludis en tiu eta enigmo. Por tio, necesas unue preni la plej simplan rimedon, kiu estas evidente iu anonco en ĉiuj vesperaj gazetoj. Se tio ne sukcesas, mi uzos alian metodon.

- Kiel vi redaktos ĉi tiun anoncon ?

- Donu al mi kraĵonon kaj ĉi tiun paperpecon. Jen :

"Trovinta ĉe la angulo de la strato Goĝo, anseron kaj ĉapelon el nigra felto. Ili ambaŭ estos al la dispoŝo de S^{ro} Henriko Bakisto ekde la deka kaj duono vespere. Strato Bakisto, n^{ro} 221 bis". Estas klare kaj koncize, ĉu ne ?

- Tre klare, fakte, sed ĉu li legos ĝin ?

- Estas probable ke li rigardos la anoncojn de la gazetoj, ĉar por homo malmulte riĉa, tiu perdo estis grava. Timigita pro rompado de fenestra vitro, teruriginta pro la alproksimiĝo de Peterson, li unue pensis nur pri fuĝo; sed de tiam li devis tre bedaŭri la unuan movadon kiu instigis lin malteni sian kortobirdaĵon. Poste la antaŭzorgo kiun mi havis por meti lian nomon, ne estos senutila, ĉar ĉiuj kiuj konas lin, alvokos lian atenton al la fakto. Diru do, Peterson, rapide iru al la agentejo de anoncoj kaj faru enpresu ĉi tiun en la ĵurnalojn.

- En kiuj, sinjoro ?

- Ho ! En *La Globo*, *La Stelo*, *La Pall-Mall*, *La Sankta Ĵakva Gazeto*, *La Vesperaj Novaĵoj*, *La Normo*, *La eĥo* kaj ankoraŭ tiuj kiuj venos al via ideo.

- Bonege, sinjoro, kaj la ŝtono ?

- Mi gardas ĝin, amiko mia ! Ha ! Mi forgesis, Peterson. Aĉetu anseron revenante kaj metu ĝin ĉi tien, ĉar necesas unu por tiu sinjoro anstataŭ tiu kiun via familio estas formanganta.

Kiam la komisiito estis foririnta, Holmsø prenis la ŝtonon kaj rigardante ĝin kontraŭlume : "Ĝi estas bela specimeno", li diras. Vidu kiel ĝi brilas ! Kompreneble ĝi estas fonto de krimo, kiel ĉiuj belaj ŝtonoj; ili estas la preferata logaĵo de la demono. Ĉe la pli dikaj kaj pli malnovaj juveloj, ĉiuj faceto respondas al iu krimo. Ĉi tiu ŝtono ankoraŭ ne havas dudek jarojn de ekzisto. Ĝi estis trovita sur la bordo de la rivero Amoj (Jiulong) en la sudo de Ĉinio kaj havas tiun apartecon, ke, kun ĉiuj karakteroj de la granato, ĝi estas el blua koloro, anstataŭ esti rubenruĝa. Malgraŭ siaj dudek jaroj de ekzisto, ĝi jam havas timigan historion. Ĉi tiuj kvardek karatoj da kristaligita karbo estis la kaŭzo de du krimoj, de atenco per vitriolo, de memmortigo kaj de pluraj ŝteladoj.

Kiu kredus ke ĉi tiu beleta vantaĵo estus provizanto de galerpunoj kaj de malliberejo ? Mi nun tuj enŝlosos ĝin en mian kiraskeston kaj skribos leteron al la grafino por diri al ŝi ke la ŝtono estas en mia posedo.

- Ĉu vi kredas ke tiu Hornero estas senkulpa ?

- Mi ne povas diri tion.

- Nu ! Tiam, ĉu vi pensas ke Henri Bakisto sinmiksas en ĉi tiu afero ?

- Mi kredas lin perfekte senkulpan; li ne suspektis eĉ sekundon la valoron kiun havis lia ansero, valoron multe pli grandan ol se ĝi estis el masiva oro. Sed se li respondas al nia anonco, mi rapide konvinkos min submetante lin al tre simpla provo.

- Kaj vi nenion povas fari ĝis tiam ?

- Nenion.

- En tiu kazo, mi tuj daŭrigos mian profesion rondvizitadon; sed mi revenos vesperen je la horo kiun vi indikis, ĉar mi deziras vidi la solvon de afero tiel konfuzita.

- Tre feliĉa revidi vin, kara amiko mia. Mi vespermanĝas je la sepa, mi eĉ havas fazanaĵon, mi kredas. Pri tio, ĉu vi ne opinias, ke en la ĉeesto de la eventoj, mi devus diri al S^{ino} Hudson ekzameni la glutejon de ĉi tiu fazanaĵo ?

Mi estis malfruigita de malsanulo, kaj estis iom plu ol la sesa kaj duono kiam mi revenis en la strato Bakisto. Kiam mi alproksimiĝis al la domo, mi vidis antaŭ la pordo, en la lumeto de la stratlanterno, sufiĉe grandan viron, kapvestitan de skota ĉapo, lia palto butonita ĝis la mentono. En la momento kiam mi kuniĝis kun li, la pordo de la 221 malfermiĝis, kaj ni kune eniris ĉe Holms^o kiu tuj sin starigis el sia brakseĝo por ricevi sian vizitanton.

- Vi estas, mi pensas, S^{ro} Henriko Bakisto, li diris kun tiu naturo kaj tiu gajeco kiuj tiel facile sin donas. Prenu, mi petas vin, ĉi tiun seĝon, tie apud la fajrejo, S^{ro} Bakisto,

malvarmas kaj mi rimarkas ke vi ne estas vestinta tre varme. Ha ! Watsono, vi venis en bona horo. Ĉu tio vere estas via ĉapelo, S^{ro} Bakisto ?

- Jes, sinjoro, certe estas mia ĉapelo.

Nia interparolanto estis vigla viro, larĝaŝultra kun masiva kapo, kaj larĝa kaj inteligenta vizaĝo maldikiĝanta al la mentono kiun finis pinta barbo el griziĝanta kaŝtankoloro. Liaj nazo kaj vangoj iomete ruĝaj, malforta tremado de la mano pruvis al mi ke la suspektoj de Holmso pri liaj kutimoj estis tre pravigitaj. Lia redingoto, kun rufaj rebriloj, estis butonita ĝis la kolo, la kolumo malfaldita, kaj sur la magraj pojnroj de nia heroo, estis signoj nek de tolaĵo nek de manumoj. La parolado de tiu viro estis malrapida kaj hakata, sed la elektitaj esprimoj pruvis ke li havas edukadon kaj ke se lia aspekto estis tiel mizera, estis ĉar li suferis sortobatojn.

- Ni gardis ĉi tiujn objektojn dum kelkaj tagoj, diris Holmso, ĉar ni esperis trovi en la ĵurnaloj anoncon de vi donanta al ni vian adreson. Mi ne povas kompreni kial vi ne prenis tiun rimedon.

Nia vizitanto ekhavis embarasitan rideton.

- Mi estas nun devigata multe ŝpari, li respondis. Mi ne dubis ke la aro da bubaĉoj kiuj atakis min, ne forprenis ĉapelon kaj kortobirdaĵon. Mi ne volis riski monon en eble senfrukta provo.

- Tre prudenta. Pri tiu kortobirdaĵo, ni estis devigata manĝi ĝin.

- Manĝi ĝin !

Nia vizitanto, en sia maltrankviliĝo, stariĝis el sia seĝo.

- Jes, ĝi profitus al neniu se ni ne tiel decidis. Sed jen alia, sur la kredenco, kiu estas proksimume el la sama pezo kaj tute freŝa, mi supozas ke ĝi plenumos la saman celon.

- Ho! certe, certe, respondis S^{ro} Bakisto, kun suspiro de

kvietiĝo.

- Kompreneble ni ankoraŭ havas plumojn, krurojn, kolon, ktp., de via kortobirdaĵo, tiel ke se vi volas...

La viro eksplodis per sincera rido.

- Ili estus memoraĵoj de mia aventuro, li diris, sed krom tio, mi ne tro vidas por kio la *disjecta membra*⁽¹⁾ de mia ansero povus esti utila al mi. Ne, sinjoro, mi kredas ke, kun via permeso, mi kontentiĝos per la bela peco kiun mi videtas sur la kredenco.

Ŝerloko Holmso ĵetis al mi ekrigardon de interkonsento, iomete ŝultrumante.

- Do jen via ĉapelo kaj via birdo, li diris. Pri tio, ĉu estus egale al vi diri al mi kie vi aĉetis la alian anseron? Mi estas iom ŝatanta kortobirdaĵojn kaj mi malofte vidis pli grasan ol ĝin.

- Certe, sinjoro, diris Bakisto kiu estis stara kaj estis metinta sub sian brakon la retrovitan objekton. Ni estas, miaj amikoj kaj mi, ĉiamuloj ĉe la drinkejo de la Alfa, apud la Muzeo, kie ni rifuĝas dum la tago. Ĉi tiun jaron, nia bona drinkejestro Vindigato starigis komitaton de la Kristnaska ansero, kies la celo estas provizi ĉiun el siaj membroj per ansero, je la 25^a de decembro, kontraŭ malgranda semajna kotizo. Mi regule pagis mian, vi scias la ceteron. Mi estas tre dankema al vi, sinjoro, redoni al mi mian ĉapelon, ĉar mia skota ĉapo taŭgas nek por mia aĝo nek por mia digno.

Kaj per samtempe pompa kaj ridiga mieno, li grave salutis nin kaj adiaŭis nin.

- Jen kiu senkulpigas S^{ron} Henrikoⁿ Bakistoⁿ, diris Holmso, kiam nia vizitanto estis ferminta la pordon malantaŭ si. Tute certas ke li neniel partoprenis en ĉi tiu afero. Ĉu vi malsatas, Vatsono?

- Ne tre.

1 Latina esprimo signifanta "disaj membroj".

- Tiam mi proponas al vi anstataŭigi tagmanĝon per vespermanĝo kaj sekvi ĉi tiun vojon dum ĝi estas ankoraŭ varma.

- Kun plezuro.

Estis tre malvarme; ni surmetis surtutojn kaj koltukojn. La steloj hele brilis en pura ĉielo, kaj la spiro de la pasantoj formis malgrandajn nubojn malpezajn kiel tiuj de la pudro. Niaj ŝuoj krakis kaj niaj paŝadoj rebruis dum ni trairis la kvartalon de la doktoro, tio estas stratoj Vimpolo, Harlej kaj fine Vigmorio, kiu kondukis nin rekte en la strato Oksfordo. En kvaronhoro ni atingis, en la kvartalo de Blumsberi, la drinkejon de la Alfa, situanta ĉe angulo de unu el la stratoj kiu kondukas al Holborn. Holms puŝis la pordon de la privata drinkejo, kaj sin direktante al ruĝvizaĝa individuo kun blanka antaŭtuko, la drinkejestro sen ajna dubo, li mendis al li du bierglasojn.

- Via biero devas esti bonega se ĝi estas same bona kiel viaj anseroj, li diris al li.

- Miaj anseroj ?

- Jes, mi babilis, precize antaŭ duonhoro, kun S^{ro} Henriko Bakisto kiu estas membro de via komitato de la Kristnaska ansero.

- Ha ! Mi komprenas. Sed sciu, sinjoro, ili ne estas niaj anseroj.

- Vere ! De ĉe kiu ili venas do ?

- Nu ! Mi aĉetis ilin ĉe komercisto kiu loĝas en la ĉirkaŭaĵo de Kovento Ĝardeno.

- Vere, mi konas kelkajn el ili en tiu kvartalo, kiu li estas ?

- Li nomiĝas Brekinriĝo.

- Ha ! Tiu ne estas konata de mi, diris Holms. Je via sano kaj mi deziras prosperon al via domo. Bonan vesperon !

- Ni ekiru al Brekinriĝo, li daŭrigis, butonante sian palton, ĉar la brizo pinĉis.

- Rimarku, Watsono, ke nia aventuro kun ansero ĉefine povas finiĝi kun kondamno de sep jaroj de punlaboro, krom se ni sukcesus pruvi la senkulpecon de la akuzito. Eblas ke nia enketo forte pezus kontraŭ li, sed ni estas pli progresintaj ol la polico, ĉar ni havas certan donitaĵon kiun la plej granda el hazardoj donis al ni. Ni do sekvu tiun vojon ĝis la fino kaj ni paŝu sub la venton.

Ni trairis Holbornon, poste laŭirinte straton Endeloⁿ kaj labirinto da stratoj en la kvartalaĉo, ni alvenis al la merkato de Kovento Ĝardeno. Unu el la plej videblaj butikoj portis la nomon de Brekinriĝo; kaj la proprietulo, viro kun inteligenta vizaĝo ornamita de longaj vangharoj, aspektis kiel viro de ĉevalo. Ĉe la momento kiam ni alpaŝis al li, li helpis junan knabon por fermi la butikon.

- Bonan vesperon ! Estas tre malvarme nun, diris Holmso. La komercisto kapjesis kaj ekturis demandajn okulojn al mia kunulo.

- Ĉu vi ne plu havas anserojn por vendi, ŝajnas al mi, daŭrigis Holmso, montrante la vendotablon el marmoro tute malprovizita de varo.

- Mi havigos al vi kvincent el ili morgaŭ matene, se vi volas.

- Ne estas tio kion mi demandas.

- Jen, se vi tuj deziras ĝin, iru tien en tiun butikon lumigitan de gaslampo.

- Estas ke oni speciale rekomendis al mi direkti min al vi.

- Kiu do parolis al vi pri mi ?

- La drinkejestro de la Alfa.

- Ho ! Jes, mi liveris al li proksimume du dekduojn da anseroj.

- Ili estis belaj pecoj. De kiu vi tenis ilin ?

Je mia granda surprizo, ĉi tiu demando kaŭzis eksplodon de kolero ĉe la komercisto.

- Nu, s'njoro, li diris, kun sia kapo klinita flanken kaj la

pugnoj sur la koksoj, kien vi celas ? Neniu elturniĝo.

- Tio estas sufiĉe klara. Mi deziras scii kiu vendis al vi la anserojn kiujn vi liveris al la Alfa.

- Nu ! Mi ne diros tion al vi, nune.

- Ho ! Tio estas al mi egala, sed mi ne vidas kial vi koleriĝas pro tia bagatelo ?

- Incitita ! Vi estus tia tute same, se vi estus tedita kiel mi. Kiam mi aĉetas varon per bona mono, oni ne plu devus pridiskuti ĝin. Sed ĝi estas nur : "Kie estas la anseroj ? Al kiu vi vendis viajn anserojn ? Kaj kiom valoras viaj anseroj ?" La publiko estas tiom zorgoplena pri tiuj anseroj ke oni kredus, vere, ke ne ekzistas aliaj en la mondo.

- Nu ! Mi ja havas nenian rilaton kun la homoj kiuj povis enketi, diris Holmso indifere. Se vi ne volas respondi al mi, la veto estas maltrafata. Sed mi estas ankoraŭ preta subteni mian opinion pri kortobirdoj, kaj mi vetis kvin frankojn⁽²⁾ ke ĉi tiu ansero estis bredita en la kamparo.

- Nu ! Sinjoro, vi perdis vian veton, ĉar ŝi estis bredita en la urbo, diras nia komercisto per kruda tono.

- Mi ne kredas vorton el tio.

- Vi malpravas.

- Vi ne konvinkos min.

- Ĉu vi kredas ke vi scias pli multe ol mi pri komerco kiun mi faras ekde mia infanaĝo ? Mi diras al vi ke la anseroj venditaj ĉe la Alfa estis breditaj en la urbo.

- Vi neniam persvados min.

- Ĉu vi tiam volas veti ?

- Tio estas preni vian monon en via poŝo, ĉar mi scias tion kion mi diras kaj mi certas esti prava; sed mi volonte vetus sterlingon⁽³⁾, estus nur por lernigi vin ne esti obstina.

La komercisto rigidmiene rikanis.

2 Aŭ, hodiaŭ en 2019, inter 15 kaj 20€.

3 Aŭ, hodiaŭ en 2019, proksimume 100€.

- Alportu al mi la librojn, Vilĉjo, li diras.

La juna knabo alportis du librojn : iun malgranda tre maldika kaj alian pli ampleksan kun dorso grasa; li dismetis ilin sur la vendotablon sub la gaslampo.

- Nu ! Sinjoro obstinulo, diras la komercisto, mi kredis ne plu havi anserojn en mia butikoj, sed post momento mi pruvos al vi ke estas unu antaŭ mi. Vi vidas ĉi tiun libreton ?

- Nu !

- Ĝi enhavas liston da homoj ĉe kiuj mi aĉetas miajn kortobirdaĵojn. Ĉu vi komprenas ? Poste, sur ĉi tiu paĝo, estas la listo da homoj de la kamparo kaj la numeroj post iliaj nomoj indikas la paĝon de ilia konto sur la granda libro. Nun vi vidas ĉi tiun alian paĝon skribitan per ruĝa krajono ? Ĝi estas la listo da miaj provizistoj de la urbo. Rigardu la trian nomon, legu ĝin laŭtege, bonvolu.

- S^{ino} Aŭskoto, 117, vojo Brikstono, - 249, legis Holms.

- Perfekte, konsultu nun la grandan libron.

Holms malfermis sur la indikita paĝo.

- Jen ni, S^{ino} Aŭskoto, 117, vojo Brikstono, komercistino pri ovoj kaj kortobirdoj.

- Kio estas la lasta liverado ?

- 22^a de decembro. Dudek kvar anseroj por sep ŝilingoj ses pencoj⁽⁴⁾.

- Perfekte, vi komprenas kaj suben ?

- Venditaj al S^{ro} Vindigato de la Alfa por dek du ŝilingoj⁽⁴⁾.

- Kion vi havas por diri nun ?

Ŝerloko Holms mienis profundege afliktita. Li elprenis sterlingon el sia poŝo kaj ĵetis ĝin sur la marmoran tablon, elirante kun la ŝajno de viro tro furioza por paroli. Kelkajn metrojn plu for li haltis sub stratlanterno por ridi laŭ sia tuta plaĉo sed silente laŭ sia kutimo.

- Kiam vi renkontas viron kun tiu tondado de vangharoj kaj

4 Aŭ, hodiaŭ en 2019, aĉetitaj ĉiujn por 62,5€ kaj venditaj ĉiun por 100€.

en lia poŝo granda kvadratita naztuko, vi ĉiam povas eltiri tion kion vi volas per veto, li diras al mi. Mi estas persvadita ke se mi metintus cent sterlingojn sub la okulojn de tiu viro, li ne donus al mi informojn tiel kompletajn kiel tiujn kiujn mi eltordis de li kiam li kredis fari veton. Nu ! Nun, Watsono, mi kredas ke ni proksimiĝas al la fino de nia enketo kaj la sola afero kiu restas por determini estas ĉu ni devas iri ĉe tiun S^{inon} Aŭskotoⁿ ĉi-vespere, aŭ ĉu ni devas rezervi tiun viziton por morgaŭ. Estas klare, laŭ tiu malagrabla individuo, ke aliaj homoj interesiĝas pri ĉi tiu afero kaj mi ŝatus...

Lia pripenso estis subite interrompata de forta bruego devenanta de la butikoj kiun ni ĵus forlasis. Turninte nin, ni vidis la sekvan spektaklon; Brekinriĝo, kadrita de la pordo, furioze montris la pugnon al malgrandstatura individuo kies la vizaĝo de foino estis malbone lumigita per la flaveta lumo de la pendanta lampo.

- Mi estas incitegita de vi kaj de viaj anseroj, li kriis. Iru diablen ! Kaj se vi daŭrigas tedi min, mi metos mian hundon ĉe viaj kalkanoj. Alkonduku do S^{inon} Aŭskotoⁿ kaj mi scios respondi al ŝi; sed pri kio tio koncernas vin, finfine ? Ĉu estas ĉe vi kiun mi aĉetis la anserojn ?

- Ne, sed tamen estis unu kiu apartenis al mi, ĝemis la vireto.

- Nu ! Postulu ĝin al S^{ino} Aŭskoto.

- Ŝi diris al mi peti ĝin al vi.

- Nu ! Petu ĝin al la reĝo de Prusio, por tio kion tio povas fari al mi. Mi havas sufiĉe. Foren.

Kaj li furioze antaŭeniris al sia interparolanto kiu malaperis en la mallumon.

- Ho ! Ho ! Ĉi tio povas evitigi al ni viziton al vojo Brikstono, murmuris Holms. Sekvu min, kaj ni tuj vidos tion kio estas por eltiri el tiu individuo.

Englitiĝante per grandaj paŝadoj tra la grupoj de

gapvaguloj, mia kunulo rapide kuniĝis kun la vireto kaj tuŝis lin sur la ŝultron. Tiu ĉi rapide turniĝis ĉirkaŭ si kaj mi rimarkis ke li fariĝis palega.

- Kiu vi do estas, kaj kion vi volas de mi ? li demandis per tremanta voĉo.

- Vi pardonos min, mielvoĉe diris Holmso, sed mi ne sukcesis retenigi min aŭdi la demandojn kiujn vi antaŭ momento faris al la vendisto de anseroj. Mi kredas povi informi vin.

- Vi ! Kiu vi estas, kaj kiel vi povas scii ion ajn pri ĉi tiu afero ?

- Mi nomiĝas Ŝerloko Holmso kaj se mi scias tion kion aliaj nescias, tio ne koncernas vin.

- Sed vi scias nenion pri ĉi tio.

- Pardonu min, mi scias ĉion. Vi serĉas kiel retrovi tion kio fariĝis kelkaj anseroj venditaj de S^{ino} Aŭskoto de la vojo Brikstono, al komercisto nomata Brekinriĝo, de li poste al S^{ro} Vindigato de la Alfa, kaj de li, siavice, al la komitato kies aniĝis S^{ro} Henriko Bakisto.

- Ho ! Sinjoro ! Vi estas precize la individuo kiun mi serĉas, ekkriis la vireto febre svingante la manojn. Mi ne kapablas diri al vi kiom gravas ĉi tiu afero treege tuŝas min.

Ŝerloko Holmso vokis la fiakron kiu pasis.

- En tiu kazo, ni pli bone faros diskuti en bona komforta ĉambro, prefere ol en ĉi tiu merkato malfermita al ĉiuj ventoj, eligis Ŝerloko Holmso. Sed, bonvolu, diru al mi, antaŭ ol iri plu for, kiu mi havas la plezuron informi ?

La viro hezitis momenton.

- Mi nomiĝas Ĵano Robinsono, li respondis, ekrigardante flanken.

- Ne, ne, via vera nomo, diris Holmso afable. Ĉiam estas embarasa prizorgi aferon sub falsa nomo.

La sango alfluis al la palegajn vangojn de la fremdulo.

- Nu ! Do, li diras, mia vera nomo estas Ĵakvo Ridero.

- Precize, unua ĉefservisto ĉe la hotelo Kosmopolito.

Eniru en la fiakron, mi petegas vin, kaj mi baldaŭ diros al vi ĉion kion vi deziras scii.

La vireto estis tie senmova, strabe turnanta la rigardon al ĉiu el ni per okuloj en kiuj oni povis alterne legi timegon kaj esperon. Li ŝajnis al mi kiel iu kiu ne scias ĉu li devas atendi bonŝancon, aŭ katastrofon. Li finfine decidiĝis eniri en la fiakron. Duonhoron poste ni estis revenantaj en la salonon de la strato Bakisto. Ni ne eligis parolon dum la veturo; sed la brua malprofunda spirado de nia nova kunulo, kaj la maniero per kiu li interplektis kaj malplektis siajn manojn, pruvis kiel liaj nervoj estis streĉita.

- Jen ni alvenintaj, diris Holmso gaje, kiam ni eniris en la salonon. La fajro ja estas bonvena hodiaŭ. Vi ŝajnas frostigita, S^{ro} Ridero. Mi petegas vin, prenu ĉi tiun vimenan seĝon. Mi tuj, se vi permesas tion, metos miajn pantoflojn antaŭ ol zorgi pri vian etan aferon... Nu, mi nun revenas al vi. Ĉu vi volas scii tion kio okazis al la anseroj ?

- Jes, sinjoro.

- Aŭ pli ĝuste, mi supozas, tiu ansero. Mi pensas ke vi aparte interesiĝas pri unu el tiuj kortobirdoj : blanka ansero kun nigra linio laŭlarĝe sur la voston.

Ridero tremetis pro emocio.

- Ho ! Sinjoro, li kriis, ĉu vi povas diri al mi tion kion ĝi fariĝis ?

- Mi havas ĝin ĉi tie mem.

- Ĉi tie ?

- Jes. Ĝi estis cetere ansero el la plej rimarkindaj, kaj mi ne miras ke vi tute speciale interesiĝas pri ĝi. Ĝi demetis, post sia morto, la plej beletan, la plej brilegan oveton bluan kiun oni neniam vidis. Mi metis ĝin tie en mia muzeo.

Nia vizitanto ŝanceliĝis sur siaj piedoj kaj kroĉiĝis per la

dekstra mano ĉe la kameno.

Holmso malfermis sian kiraskeston kaj elmontris la bluan grenaton kiu flagretis per mil brilaj flamoj.

Ridero staris tie, kun kuntirita vizaĝo, streĉanta la rigardon al la juvelon kaj ne scianta ĉu li devis postuli ĝin aŭ ne.

- Estas sufiĉe da komedio, Ridero, diris Holmso trankvile. Nu, restarigu vin, aŭ vi falos en la kamenon. Helpu lin residiĝi, Vatsono. Li ne ankoraŭ estas sufiĉe koruptita por senhonte fari krimon. Donu al li kelkajn gutojn da brando por revigligi lin. Bone. Nun li ŝajnas iom pli viro. Vere, kia molulo !

Nia heroo efektive estis baldaŭ svenonta, sed la brando remetis iom da koloro al liaj vangoj kaj li sidiĝis rigardanta sian interparolanton kun konsternitaj okuloj.

- Mi konas la sinsekvon de tiu ĉi afero kaj ĉiujn pravigajn pruvojn, tiel ke restas al vi malmulte da aferoj por sciigi al mi, daŭrigis Holmso. Malgraŭ tio, estus bone ke vi finus klarigi min, por kompletigi mian enketon. Vi konas, Ridero, la ekziston de ĉi tiu blua ŝtono de la grafino de Morkaro !

- Estas Katerina Kusako kiu parolis al mi pri tio, li diris per raŭka voĉo.

- Mi komprenas, la ĉambristino de la grafino. Do vi ne sukcesis malcedi al la tento riĉiĝi per unu fojo kaj tiel facile; cetere vi havas tion komune kun multaj homoj kiuj valoras pli bone ol vi. Sed vi ne estis tre skrupula pri la rimedoj kiujn vi uzis. Ŝajnas al mi, Ridero, ke estas en vi kompetenteco de perfekta fripono. Vi sciis ke ĉi tiu plumbisto, Hornero, jam estis kompromitita en tia afero, kaj ke la suspektoj direktus pli facile al li. Kion vi faris tiam ? Vi difektis ion en la ĉambro de la damo, vi kaj via komplicino Kusako, kaj vi aranĝis vin por ke oni sendu serĉi ĝuste tiun ĉi viron. Poste, kiam li estis foririnta, vi priŝtelis la juvelkeston; vi poste

sonorigis alarmon kaj arestigis tiun kompatindulon. Tiam... vi estis...

Ridero subite sin ĵetis planken kaj ekprenante la genuojn de mia amiko :

- Pro la Di-amo, kompatu min ! li kriis. Pensu pri mia patro, pri mia patrino. Tio rompus al ili la koron. Mi ankoraŭ neniam malbonfaris. Mi ĵuras al vi ne rekomenci. Mi ĵuras tion per la biblio. Mi petegas vin, ne vokigu min antaŭ tribunalon. Pro la amo de Kristo, ne faru tion.

- Residiĝu, diris Holmso severe. Konvenas al vi subite fari la humilulo, kaj rampi, kiam vi ne havis penson pri tiu kompatinda Hornero kiu estas ĉe la benko de la akuzitoj pro krimo pri kiu li tute ne kulpas.

- Mi forkuros, sinjoro Holmso. Mi eliros el la lando. Tiam la akuzado metita kontraŭ li mem falos.

- Hm ! Ni reparolos pri tio. Kaj nun mi volas aŭdi la veran rakonton de la jena fakto. Kiel la ŝtono estis englutita de ansero ? Kaj kiel ĉi tiu ansero estis alportita al la merkato ? Diru la veron, tio estas via sola savtabulo.

Ridero pasigis la langon sur siajn sekiĝintajn lipojn.

- Mi tuj rakontos al vi la aferon tiel kiel ĝi okazis, sinjoro, li diris.

"Kiam Hornero estis arestita, ŝajnis al mi preferinde tuj senigi min je la ŝtono, ĉar mi ne sciis je kiu momento la polico havus la ideon enketi pri mi kaj en mia ĉambro. Estis neniu senriska loko en la hotelo. Mi eliris kun la preteksto plenumi komision kaj iris ĉe mian fratinon. Ŝi edziniĝis kun viro nomata Aŭskoto" kaj loĝas en la vojo Brikstono kie ŝi grasigas anserojn por vendi ilin ĉe la merkato. Sur la tuta vojo, la homoj kiujn mi renkontis, ŝajnis al mi policanoj aŭ detektivoj, kaj kvankam la nokto estis malvarma, ŝvitgutoj perlis sur mia fronto. Mia fratino demandis al mi, kial mi estis tiel pala; mi diris al ŝi ke mi estis konfuzita de

juvelŝtelo en la hotelo. Poste mi iris en la korton malantaŭ la domo kaj, fumante pipon, mi serĉis kion decidi.

"Mi iam havis amikon nomatan Modslejo", kiu ekde tiam deflankiĝis kaj ĵus eliris el malliberejo de Pentonvilo. Iam mi renkontis lin kaj ni hazarde parolis pri la ruzaĵoj de friponoj kaj pri la maniero kies ili kapablas sin senigi je tio kion ili ŝtelis. Mi sciis ke mi povis fidi al li, ĉar mi estis informita pri unu aŭ du el liaj aferoj; mi do decidis iri trovi lin ĉe li, en Hilburno kaj peti al li konsilon, konvinkita ke li diros al mi la rimedon por fari monon per ĉi tiu multvalora juvelo. Sed kiel alveni ĉe li sen embaraso ? Ĉar finfine, mi sange ŝvitis por veni de la hotelo ĉe mia fratino. Ĉiumomente mi povus esti kaptita de la polico kaj priserĉita. Nu la ŝtono troviĝis en la poŝo de mia veŝto ! Mi estis en tiu momento de miaj pripensoj, apoganta kontraŭ la muro kaj malatente rigardanta la anserojn kiuj anaspaŝadis ĉirkaŭ mi kiam subite venis al mi ideo kiu devis ebligi min venki la plej bonan detektivon.

"Mia fratino diris al mi antaŭ kelkaj semajnoj, ke mi povis elekti por mi anseron por Kristnasko, inter ŝiaj, kaj mi sciis ke ŝi ĉiam plenumis sian promeson. Mi do devis nur preni mian anseron nun kaj englutigante al ĝi mian ŝtonon, mi povus sekure iri al Hilburno.

"Estis malgranda ŝirmejo en la korto, malantaŭ kiu mi alkondukis unu el la kortobirdoj kiun mi elektis inter la plej dikaj. Ĝi estis blanka kun vosto trastrekata de nigra strio. Mi ekkaptis ĝin kaj malfermante al ĝi la bekon, mi enigis la ŝtonon en la glutejon tiel profunde kiel mia fingro povis atingi. La birdo eksaltis kaj mi sentis la ŝtonon kiu malsupreniris en ĝian kropon; sed tiumomente la besto komencis bati la flugilojn kaj mia fratino, altirata de la bruo, alvenis en la korton. Mi turnis min por paroli al ŝi, kaj dum tiu momento, la

ansero eskapis min kaj sin miksis kun la aliaj.

- Kion do vi faris al ĉi tiu besto, Ĵakvo ? Ŝi diris.

- Ĉu vi ne promesis al mi anseron por Kristnasko ? Mi palpas ilin por provi elekti la plej dikan.

- Ho ! Ŝi respondis, ni flankenmetis vian : ni nomas ĝin la birdon Ĵakvo". Estas la dika blankulo kiun vi vidas tien. Estas dudek ses : unu por vi, unu por ni kaj du dekduoj por la merkato.

- Dankon, Margareta, mi diris, sed se tio ne gravas al vi, mi preferus havi tiun kiun mi antaŭ momento tenis.

- La alia pezas almenaŭ tri funtojn plie; ni grasigis ĝin intence por vi.

- Ne gravas, mi volas la alian kaj mi deziras kunpreni ĝin nun, mi diris.

- Laŭ via plaĉo, ŝi rebatis kolere. Kiun vi do volas ?

- Ĉi tiu blanka kiu havas voston trastrekatan de streko kaj kiu estas tien meze de la grego.

- Ho ! Tre bone, mortigu ĝin kaj forprenu ĝin.

"Mi bonvole akceptis, sinjoro Holms, kaj kunprenis la birdon al Hilburno. Mi rakontis al mia komplico tion kion mi faris, ĉar li estis homo kiu atente aŭskultis rakonton kiel tian. Li ridegis pri tio ĝis larmoj; ni prenis tranĉilon kaj malfermis la anseron. Sed mia sango malfluidiĝis en miaj vejnoj kiam mi ne trovis spuron de ŝtono en la interno de la besto. Mi do faris teruran eraron.

"Mi kiel eble plej rapide reiris ĉe mian fratinon kaj kuregis al la malantaŭkorto. Ne plu restis iu sola ansero !

- Kien do ili iris, Margareta ? mi ekkriis.

- Ili estas ĉe la komercisto.

- Kiu komercisto ?

- Brekinriĝo, de Kovento Ĝardeno.

- Sed ĉu estis alia kun la vosto trastrekata ?

- Jes, Ĵakvo, kaj mi neniam kapablis distingi ilin unu

de la alia.

"Tiam mi ĉion komprenis kaj kuris, tiel rapide kiel miaj piedoj povis porti min, ĉe tiun Brekinriĝo"; sed li ope vendis ĉion kaj li rifuzis diri al mi al kiu. Vi mem aŭdis tion ĉi-nokte. Nu ! Li ĉiam respondis al mi tiel afable. Mia fratino pensas ke mi freneziĝas. Kelkfoje ankaŭ mi mem kredas tion. Kaj nun jen mi kvalifikita ŝtelisto sen eĉ ĝui la riĉaĵon, por kiu mi oferis mian honoron. Dio kompatu min !"

Li ekploreĝis kaj kaŝis sian vizaĝon en siaj manoj.

Longa silento sekvis tiun rakonton, silento nur hakata de la anhelanta spirado de nia interparolanto kaj la regula frapetado de la fingroj de Holmso sur la rando de la tablo. Poste, mia amiko sin levis kaj malfermis la pordon.

- Eliru, li diris.

- Kio, sinjoro ? La ĉielo benu vin !

- Ne pli da vorto. Eliru.

Estis neniuj parolo : Eksalto, rulfalo, pordo forte fermata, rapidaj paŝoj sur la pavimo; poste ĉio refariĝis silenta.

- Finfine Watsono, diris Holmso, prenante sian pipon el tero. Mi ne estas dungita de la polico por kompensi lian mankon. Se Hornero estus en danĝero, estus alia afero, sed tiu individuo ne prezentos sin kontraŭ li, kaj la akuzo devas mem fali. Kaj supozante ke mi favoras krimulon, mi eble savas animon. Ĉi tiu viro ne plu faros ŝtelon. Li estis tro timigita. Se li estus nun kondamnita al la punlaborejo, li pli poste fariĝus pendumindulo. Plie, estas la pardontempo. Hazardo metis sur nia vojo problemon el la plej maloftaj kaj el la plej kapricaj, kaj la sola fakto esti solvinta ĝin estas kontenteco. Se vi bonvolas sonorigi, doktoro, ni tuj komencos novan esploron en kiu birdo ankaŭ aperas kiel ĉefa aganto.

La Aventuro de la Punktita Bendo.

Trale tante miajn notojn pri la sepdek kuriozaj kaŭzoj, tra kiuj mi studis dum ok jaroj la manieron procedi de mia amiko Ŝerloko Holms^o, mi trovas inter ili multe da tragikaj, kelke da komikaj, multnombre da simple strangaj; sed ne unu estas banala, kaj tio rezultas el tio ke, laboranta plivole por la art-amo ol por gajni monon, li neniam komencis enketon kiu ne sentis la strangecon kaj eĉ la fantaston. El ĉiuj ĉi diversaj aferoj, mi tamen trovas neniun kiu prezentas pli da originaleco ol tiu kiu tuŝas tre konatan familion de [Surejo](#) : la Rojloto^j, de Stokmorano.

La okazaĵoj kiujn mi tuj raportos ĉi tie, okazis de la komenco de mia intimeco kun Holms^o, kiam, ambaŭ fraŭloj, ni kune loĝis en la strato Bakisto. Mi povintus eldoni ilin pli frue, se mi ne promesis sekreton, kaj mi estis liberigita de mia parolo nur la pasintan monaton pro la neatendita morto de tiu al kiu mi donis ĝin. La tempo estas veninta por konigi tiujn faktojn, ĉar mi eksciis per certa fonto, ke disvastiĝis pri la morto de doktoro Grimesbi Rojloto, klaĉoj kiuj emus aŭdigi la aferon ankoraŭ pli gravan ol ĝi reale estis.

Estis komence de aprilo 1883 kiam, vekiĝante matenon, mi trovis Ŝerlokoⁿ Holms^o tute vestita apud mia lito. Li kutime ne estis fruleviĝema, kaj ĉar la horloĝo sur la kamenbreto montris nur la sepa kaj kvarono, mi mire rigardis lin kun kiel malmulte da kolero, pro esti ĝeninta min dum mia dormo, min, maniulon.

- Tre malgaja veki vin, Vatsono, li diris, sed ni ĉiuj estas ĉi-matene en tiu situacio; S^{ino} Hudson impulsis kaj estinta subite ellitigata, ŝi venĝis al mi, kaj mi al vi.

- Kio do estas ? Ĉu fajro ?

- Ne, klientino, iu junulino kiu sin prezentis hejmen en ekstreme ekscitiĝa stato, kaj kiu insistas por vidi min. Ŝi atendas en la salono. Nu kiam junulinoj trakuras la metropolon je ĉi tiu horo, kaj ellitigas homojn kiuj estas ankoraŭ dormemaj, mi konkludas el tio ke ili havas ion tre urĝan por komuniki. Se ŝi alportus al ni interesan aferon por esplori, vi volus, mi certas, sekvi ĝin ekde la komenco. Mi do havis la ideon veki vin, por ne lasi vin perdi ĉi tiun okazon.

- Kara mia, mi bedaŭrus maltrafi ĝin.

Nenio pasiigis min pli multe ol sekvi Holmsⁿ en liaj profesiaj esploradoj, kaj admiri la rapidajn deduktojn, kaj tiel intuiciajn kiel rapidajn, per kiuj li malimplikis la problemojn kiuj estis submetitaj al li. Mi rapide vestis min, kaj post kelkaj minutoj mi kuniĝis kun mia amiko en la salono.

Ni troviĝis en ĉeesto de virino, nigre vestita, kun dika vualo sur ŝia vizaĝo; vidante nin ŝi stariĝis el la seĝo kiun ŝi elektis apud la fenestro.

- Bonan matenon, sinjorino, diris elkore Holmsⁿ, mi nomiĝas Ŝerloko Holmsⁿ, kaj jen doktoro Vatsonⁿ, mia proksima amiko kaj mia asociito, antaŭ kiu vi povas paroli tiel libere kiel antaŭ mi. Ha ! Mi estas plenkontenta vidi ke S^{ino} Hudson havis la saĝecon fari fajron. Bonvolu alproksimiĝi al ĝi, kaj mi mendos por vi tason da varma kafo, ĉar mi vidas ke vi frostotremas.

- Ne estas pro malvarmo ke mi tremetas, diris la virino mallaŭte, ŝanĝante lokon.

- Pro kio do ?

- Estas pro timo, sinjoro Holmsⁿ, mi eĉ diros pro timo.

Je ĉi tiuj vortoj ŝi levis sian vualon, kaj ni povis vidi ke fakte ŝi estis en kompatinda ekscitiĝa stato : ŝiaj trajtoj estis streĉitaj, ŝia haŭto palega, ŝiaj okuloj malkvietaj,

timigitaj, konfuzitaj kiel tiuj de ĉassekvata besto. Ŝia ekstero estis tiu de tridekjara virino, sed kun antaŭtempaj grizaj haroj, kaj esprimo de granda laceco. Ŝerloko vidis ĉion ĉi per iu el siaj rapidaj kaj akraj ekrigardoj.

- Ne timu, li diris per tenera tono, sin klinante al ŝi kaj tuŝante al ŝi la brakon; ni rapide klarigos ĉi tion, mi certas pri tio. Ŝajnas al mi ke vi venis per trajno.

- Ĉu vi do konas min ?

- Ne, sed mi vidas vian reirbileton en via maldekstra ganto. Vi devis foriri frumatene, kaj vi faris longan vojaĝon per kariolo tra malbonaj vojoj antaŭ ol alveni al la stacio.

Ŝi eksaltis kaj, konsternita, rigardis mian kunulon.

- Estas neniu mistero en ĝi, kara sinjorino, li diris ridetante. La maldekstra maniko de via ĵaketo estas makulita per koto en sep lokoj; la spuroj estas ankoraŭ freŝaj; estas nur kariolo por tiamaniere ŝprucmakuli; ĉefe kiam oni sidas maldekstre de la veturigisto.

- Kia ajn estas via rezonmetodo, vi bone trafis, ŝi diris. Mi forlasis la domon antaŭ la sesa, alvenis en Kapledoⁿ je la sesa kaj dudek, kaj en Vaterloⁿ per la unua trajno. Sinjoro, mi ne plu kapablas elteni, mi freneziĝus se tio daŭrus. Mi havas neniun al kiu turni min, absolute neniun, kaj la sola kiu interesiĝas pri mi, iu junulo, povas esti por mi nur malforta helpo. Mi aŭdis paroli pri vi, sinjoro Holmso, de S^{ino} Farintoŝo, kiun vi helpis en malfacila cirkonstanco. Estas de ŝi ke mi ricevis vian adreson. Ho ! Sinjoro, ĉu vi pensas ke vi povu helpi min, ankaŭ min, kaj almenaŭ ĵeti iom da lumo en la ĥaoson kiu ĉirkaŭas min ? Nune, mi ne kapablus laborpagi vin pro viaj servoj, sed post unu aŭ du monatoj mi estos edzinigita, mi povos disponi pri mia riĉaĵo kaj tiam vi vidos ke mi ne estas sendankulino.

Holmso turnis sin al sia skribotablo kaj eltiris el ĝi notlibron kiun li konsultis.

- Farintoŝo, li diris. Ha ! Jes, mi memoras pri la aferon; temis pri cidaro de opaloj. Mi kredas ke ĝi ne estis viatempe, Vatsono. Mi povas certigi al vi, sinjorino, ke mi estos feliĉa dediĉi min al via afero kiel mi faris por tiu de via amikino. Ni ne parolu pri honorario, mi petegas vin, mia profesio portas kun si sian rekompencan; mi lasas vin libera rekompenci min pri la elspezoj kiujn mi povintus faris, kiam tio konvenos al vi. Kaj nun, mi petas vin prezenti vian aferon sen preterlasi iujn ajn detalojn kiuj povu instrui nin.

- Bedaŭrinde ! respondis nia vizitantino, la hororo de mia situacio devenas de tio ke miaj timoj estas tiel malprecizaj, kaj miaj suspektoj apogitaj sur bazoj tiel malfortaj, mi eĉ diros tiel infanaj, ke tiu mem al kiu mi rajtas peti helpon kaj konsilon, konsideras ilin kiel imagaĵojn de nervozaj virinoj. Li ne diras tion, sed mi divenas tion per liaj konsentemaj respondoj kaj liaj kompatoplenaj rigardoj. Sed oni diris al mi, sinjoro Holms, ke vi povas legi funde de la homa koro; vi eble povas doni al mi konsilon en la ĉeesto de la danĝeroj kiuj minacas min.

- Mi estas tute atenta, sinjorino.

- Mi nomiĝas Helena Stonero, kaj mi vivas ĉe mia bopatro, la lasta ido de unu el la plej malnovaj saksaj familioj de Anglio, la Rojlotoj, de Stokmorano, familio lokita ĉe la okcidentaj limoj de Surejo.

Holms signis per la kapo. "La nomo estas konata de mi," li diris.

- Ĉi tiu familio estis dum momento inter la plej riĉaj de Anglio, kaj ĝiaj posedaĵoj etendiĝis ĝis Berkŝiro norden kaj Hampŝiro okcidenten. Sed, dum la pasinta jarcento, sinsekvis kvar generacioj de malŝparuloj kaj de diboĉuloj, kaj la ruiniĝo de la familio estis plenumita de vetludanto sub la regentado. Restis nenio pri iliaj bienoj, krom kelkaj aroj da tereno kaj la domo, malnova de ducentjaroj, kiu mem

estas hipotekita tiom kiom ĝi povas esti. La lasta posedanto trenis tie sian malesperan ekziston de ruinigita nobelo; sed lia ununura filo, mia bopatro, ekkomprenis ke necesis tiri sin el tio, akiris de parenco monhelpo, por fari al medicinaj lernadoj, kaj foriris al Kalkuto, kie dank'al sia profesia lerteco kaj sia forto de karaktero, li kreis al si belan klientaron. En ia kolermovo, kaŭzita de ŝtelo kiu estis farita ĉe li, li svenbatis sian hindan ĉefserviston kaj li preskaŭ estis mortkondamnita. Li pasigis plurajn jarojn en malliberejo kaj revenis en Anglio, malgaja kaj disreviĝinta.

...Dum doktoro Rojloto estis en Hindio, li edzinigis mian patrino, S^{ino} Stonero, la ankoraŭ juna vidvino de la majoro generalo Stonero de la Bengala artilerio. Mia fratino Julia kaj mi, ni estis ĝemelaj, kaj ni estis nur dujaraĝaj ĉe tiu dua geedziĝo de mia patrino. Ŝi estis riĉa, mil sterlingojn⁽⁵⁾ de rento, kaj ŝi heredigis sian riĉaĵon al doktoro Rojloto, por ke li gardu nin hejme, kaj kondiĉe ke li faru al ĉiu el ni, en okazo de geedziĝo, renton kiun ŝi determinis. Malmulte da tempo post nia reveno en Anglio, mia patrino mortis, mortigita en fervoja akcidento apud Kreŭo antaŭ ĉirkaŭ ok jaroj de nun. Ekde tiu momento doktoro Rojloto ne plu faris iun penadon por krei al si klientaron en Londono, kaj li alkondukis nin kun si en la malnovan domon de Stokmorano. La riĉaĵo kiun mia patrino lasis, plene sufiĉis por ĉiuj niaj bezonoj, kaj ne ŝajnis ke povu esti malhelpo al nia feliĉo.

...Sed subite la karaktero de nia bopatro terure ŝanĝis. Anstataŭ amikiĝi kaj interŝanĝi vizitojn kun niaj najbaroj kiuj estis unue kontentegaj vidi iun Rojlotoⁿ de Stokmorano denove instalita en la malnovan familian loĝejon, li enfermis sin hejme kaj malmulte eliris nur por sovaĝe kvereli kun iu ajn kiu troviĝis sur lia vojo. Ia sovaĝeco de karaktero proksima de la frenezo cetere estis hereda afero ĉe la

5 Aŭ, hodiaŭ en 2019, proksimume 100.000€.

viroj de lia familio, kaj ĉe mia bopatro ĉi tiu inklino estis, mi pensas, pliigita pro lia longa restado en la tropiklandoj. Okazis bedaŭrindaj interbatiĝoj kiuj vokigis lin dufoje antaŭ la deliktpuna policejo; li fariĝis teruro de la vilaĝo, kaj la homoj fuĝis je lia alproksimiĝo, ĉar li estas treege forta kaj ne plu sin regas kiam li koleras.

...Pasintan semajnon li ĵetis la forĝiston super parapeto en la riveron, kaj mi sukcesis eviti publikan skandalon nur donante al la viktimo la tutan monon kiun mi povis kolekti. Li havas neniun amikon krom la ciganoj : li permesas al tiuj vojuloj tendumi sur la kelkaj aroj de grundo kovrita de rubusoj kiuj estas la sola proprietaĵo de la familio, kaj kompanse akceptas la gastamecon sub iliaj tendoj, eĉ vojaĝante kun ili dum tutaj semajnoj. Li ankaŭ havas pasion al iaj hindaj bestoj kiuj estas senditaj al li de korespondanto, kaj li havas en ĉi tiu momento panteron kaj pavianon kiuj libere promenas, kaj estas timegitaj de la vilaĝanoj preskaŭ tiom kiom ilia mastro.

...Vi juĝos per ĉio ĉi ke mia kompatinda fratino Julia kaj mi ne havis multan ĝuon en la vivo. Ni povis gardi neniun serviston, kaj longatempe ni devis servi nin mem. Mia fratino estis nur tridekjara kiam ŝi mortis, kaj tamen ŝiaj haroj komencis blankiĝi, tute same kiel la miaj.

- Via fratino mortis ?

- Jes, antaŭ ĝuste du jaroj de nun, kaj estas pri ŝia morto kiun mi volas paroli al vi. Vi komprenas ke, ricevante la vivon kiun mi priskribis al vi, estiĝis malmulte da okazoj vidi homojn de nia aĝo kaj de nia mondo. Ni tamen havis onklinon, ne edziĝintan fratinon de nia patrino, F^{ino} Honoria Ŭesfalo, kiu loĝas proksime de Erpilo, kaj ni ricevis de tempo al tempo permeson mallonge viziti ŝin. Julia pasigis tie la kristnaskajn festojn antaŭ du jaroj, kaj tie renkontis duontempan kapitanon de korveto kun kiu ŝi fianĉiniĝis. Mia

bopatro eksciis pri ĉi tiu promeso ĉe la reveno de mia fratino, kaj ne metis proteston kontraŭ la geedziĝo; sed dusemajne antaŭ la decidita tago de la ceremonio, okazis la terura dramo kiu senigis min de mia sola kunulino.

Ŝerloko Holmsio restis apoginta sin sur la dorsapogilo de sia seĝo, kun la okuloj fermitaj kaj la kapo klinita sur kuseno; sed ĉe tiu momento li malfermetis la okulojn kaj ekrigardis al sia kliento.

- Estu sufiĉe kleriga por doni tre precizajn detalojn, li diris.

- Tio estas facila al mi, ĉar ĉiu minuto de ĉi tiu terura nokto estas gravurita en mia memoro. La loĝejo estas, kiel mi diris, tre malnova, kaj nur unu el la aloj estas loĝata. La dormĉambroj troviĝas sur la teretaĝo, la salonoj en la centra pavilono. La unua ĉambro estas tiu de doktoro Rojloto, la dua estis tiu de mia fratino, la tria estas mia. Ili ne komunikiĝas, sed ĉiuj eliras al la sama koridoro. Ĉu mi bone komprenigas min ?

- Perfekte.

- La fenestroj de ĉi tiuj tri ĉambroj rigardas sur la gazono. En tiu fatala nokto kiam mortis mia fratino, doktoro Rojloto frue izoliĝis, sed sen enlitiĝi, ĉar Julia estis subite ĝenita de laodoro de la fortaj hindaj cigaroj kiujn li kutimis fumi. Ŝi do forlasis sian ĉambron kaj venis ĉe mi kie ŝi restis dum iom da tempo por babili kun mi pri sia geedziĝo. Je la deknua, ŝi stariĝis por foriri, sed haltante ĉe la pordo :

...- Nu, Helena, ŝi diris al mi, ĉu vi neniam aŭdis fajfi meze de la nokto ?

...- Neniam, mi respondis.

...- Mi supozas ke ne eblus al vi fajfi dormante, ĉu ne ?

...- Certe ja, sed kial ?

...- Ĉar ĉi tiujn lastajn noktojn, mi ĉiam, ĉirkaŭ la tria

matene, aŭdis mallaŭtan fajfadon, kaj tamen aŭdebla. Mi estas facile vekebla, kaj tio vekis min. Mi ne kapablas ekkonscii pri de kie tio venas, de la apuda ĉambro aŭ de la gazono ? Mi volis scii ĉu ankaŭ vi aŭdis ĝin, tiun fajfadon.

...- Ne. Estas probable tiuj malbenitaj ciganoj en la parko.

...- Tio povus esti. Kaj tamen, se tio estas sur la gazono, estas mirinde ke vi ne sensis ĉi tiun bruon kiel mi.

...- Ha ! Sed mi ne tiel delikate dormas kiel vi.

...- Ho ! Cetere tio tute ne gravas, ŝi aldonis ridetante. Poste ŝi forlasis min, kaj momenton poste mi aŭdis ŝin fermi ŝian pordon per ŝlosilo.

- Vere, diris Holms, ĉu vi kutimis tiel nokte fermi vian pordon ?

- Ĉiam.

- Kaj kial ?

- Mi kredas esti dirinta al vi ke la doktoro havis panteron kaj pavianon; konsekvence ni sentis nin sekuraj nur kiam niaj pordoj estis ŝlositaj.

- Tio estas komprenebla. Daŭrigu, mi petegas vin.

- Mi ne sukcesis dormi tiun nokton. La malpreciza antaŭsento de malfeliĉo premis min. Mia fratino kaj mi, vi memoras, estis ĝemelinoj kaj vi scias, kiel subtilaj estas la ligoj kunigantaj du animojn kiuj staras tiel proksimaj. Eksteren, la vetero estis malbelega. La vento blovis per skualoj kaj fortega pluvo venis rompiĝi kontraŭ la fenestrojn. Subite, meze de la bruego de la ŝtormo, mi aŭdis senesperan krion de terurigita virino kaj mi rekonis la voĉon de mia fratino. Mi elsaltis el mia lito, envolvis min en ŝalon kaj kuregis al la koridoro. Ĉe la momento kiam mi malfermis la pordon, ŝajnis al mi aŭdi apenaŭan fajfon el la speco de tiu priskribita de mia fratino, kaj post momento mi distingis sonoran bruon kvazaŭ tiu de amaso da metalo

kiu falintus grunden. Poste la pordo de mia fratino malrapide malfermiĝis. Terurigita, mi haltis, ne scianta kio tuj okazos. Ĉe la lumo de la koridora lampo, mi vidis aperi en la aperturo mian fratinon mem, kun vizaĝo pala pro teruro, gestantan kiel por petegi helpon, kaj stumblantan kiel ebria viro. Mi kuris al ŝi, premis ŝin en miaj brakoj, sed la kruroj ne tenis ŝin kaj ŝi sinkis planken. Ŝi tordiĝis kiel en teruraj suferoj kaj ĉiuj ŝiaj membroj estis kruele konvulsiitaj. Unue mi kredis ke ŝi ne rekonis min, sed kiam mi klinis min super ŝi, ŝi kriis per voĉo kiun mi neniam forgesos : "Ho ! Dio, Helena ! Estis la bendo ! La punktita bendo !". Estis ankoraŭ io alia kiun ŝi volintus diri, kaj ŝia etendita fingro ŝajnis voli trapiki la muron de la ĉambro de la doktoro, sed nova konvulsio kaptis ŝin, kaj malebligis ŝin paroli. Mi impetis en la koridoron, vokante mian bopatron, kaj mi renkontis lin en noktosurtuto, haste elirantan el sia ĉambro. Kiam ni alvenis apud mia fratino, ŝi estis senkonscia. La doktoro verŝis al ŝi konjakon inter la lipoj, sendis serĉi la vilaĝan kuraciston, sed ĉiuj niaj streboj estis vanaj: la vivo iom post iom lasis ŝin, kaj ŝi mortis sen rekonsciiĝi. Tia estis la terura fino de mia kara fratino.

- Momenton, diris Holms, ĉu vi estas tre certa esti aŭdanta tiun fajfon, kaj tiun metalan bruon ? Ĉu vi povus ĵuri tion per via honoro ?

- Estas tio kion la enketisto de la graflando demandis al mi dum la enketo. Mi estas konvinkita esti aŭdanta ĝin, kaj tamen meze de tiu ŝtormo kaj de la ĝemadoj de la malnova domo, mi povas esti eraranta.

- Ĉu via fratino estis vestita ?

- Ne, ŝi estis en la nokta vesto. Oni trovis en ŝia dekstra mano la stumpon de alumeto kiu estis brulinta, kaj en ŝia maldekstra mano la skatolon mem da alumetoj.

- Tio kiu pravas ke ŝi strebis por lumigi kaj rigardi ĉirkaŭ

ŝi. Ĉi tio estas grava. Kio estis la rezulto de la enketo ?

- La afero estis detalege esplorita, ĉar la konduto de la doktoro Rojloto estis tre konata en la graflando, tamen oni ne sukcesis malkovri ian kredeblan kialon de morto. Mia atesto pruis ke la pordo estis interne fermita; rilate al la fenestroj, ili estis provizitaj per tiuj malnovaj ŝutroj kun feraj stangoj, kiujn ni alfortikigis ĉiun vesperon. La muroj estis zorge esploritaj kaj ĉie trovitaj netuŝitaj, kaj la planko ankaŭ estis elekzamenita, kun tiom malmulte da sukceso. La kameno estas larĝa, sed fermita je certa alteco per kvar fortaj stangoj. Estas do certe ke mia fratino estis tute sola, dum la evento kiu kaŭzis ŝian morton. Cetere ŝia korpo surhavis nenian spuron de perfortoj.

- Kaj la veneno ?

- La kuracistoj ekzamenis ŝin de ĉi tiu vidpunkto, sen iu ajn rezulto.

- Al kio vi do atribuas la morton de ĉi tiu bedaŭrinda junulino ?

- Mi estas persvadita ke ŝi mortis nur pro timo kaj pro nervoza skuo; sed kio timigis ŝin, mi ne sukcesas imagi ĝin.

- Ĉu estis tiam ciganoj en la parko ?

- Jes, ili ĉeestas preskaŭ ĉiam.

- Ha ! Kaj kia ideo sugestis al vi tiun aludon al bendo, punktita bendo ?

- Mi unue pensis ke ĝi estas simpla delira efiko, ĉar ĝi povis esti bando da homoj, eble tiuj ciganoj en la parko. Mi demandis al mi ĉu la koloraj poŝtukoj kiujn multe el ili surhavas sur la kapo, ne sugestis al ŝi la strangan adjektivon kiun ŝi uzis.

Holmso skuis la kapon kun la mieno de homo kiu estas for de esti kontenta.

- Tio ŝajnas al mi tre mistera ! li diris. Daŭrigu vian

rakonton, mi petegas vin.

- Du jaroj pasis de tiam, kaj mia vivo estis ĝis ĉi tiuj lastaj tagoj pli soleca ol neniam. Tamen, antaŭ ĉirkaŭ unu monato, amiko kiun mi havas ekde jaroj, faris al mi la honoron edziniĝopeti min. Li nomiĝas Armitage, Percio Armitage, li estas la dua filo de S^{ro} Armitage, de Akvoprenejo, apud Lego. Mia bopatro metis neniun proteston kontraŭ ĉi tiun projekton, kaj ni devas geedziĝi printempe. Antaŭ du tagoj ni komencis riparlaboradojn en la okcidenta alo de la konstruaĵo, kaj la muro de mia ĉambro estis truita; mi devis do transloĝiĝi kaj iri loki min en la ĉambron kie mia fratino mortis, kaj dormi en la lito mem kie ŝi dormis. Imagu tiam kiu estis mia ekstremo de hororo kiam lastnokte, ne dormante kaj pensante pri ŝia malgaja sorto, subite mi aŭdis, en la nokta silento, la apenaŭ percepteblan fajfadon kiu estis la signalo de ŝia morto. Mi saltleviĝis kaj eklumigis la lampon, sed mi vidis nenion en la ĉambro. Tamen tro emociita por reenlitiĝi, mi vestis min kaj ekde kiam tagiĝis, mi elŝoviĝis eksteren; mi donigis al mi kariolon ĉe la gastejo de la Krono, kiu estas antaŭ la domo, kaj mi tiel atingis Kapledon, de kie mi alvenis ĉi-matene, kun la sola celo vidi vin kaj peti de vi konsilon.

- Vi bone faris, respondis mia amiko. Sed ĉu vi diris ĉion al mi ?

- Jes, ĉio.

- Fraŭlino Rojloto, tio ne estas ĝusta; vi domaĝas vian bopatron.

- Kio ? Kion vi volas diri ?

Anstataŭ ĉia respondo, Holmsø, kuspante la nigran punton de la maniko, malkovris la manon kiun nia vizitantino lasis ripozi sur siaj genuoj.

- Li brutale traktis vin, diris Holmsø.

La junulino profunde ruĝiĝis kaj kaŝante sian dolorigitan

manartikon :

- Li estas brutala viro, ŝi diris, kaj eble li ne konscias pri sia propra forto.

Estis longa silento, dum kiam Holmso, kun la mentono apogita sur siaj manoj, fikse rigardis la fajron kiu kraketis en la kameno.

- Estas tre obskura afero, li fine diris. Estas mil detaloj kiujn mi ŝatus koni antaŭ ol decidi nian agrimedon. Sed ni ne havas momenton por perdi. Se ni irus al Stokmorano, hodiaŭ mem, ĉu eblus al ni viziti ĉi tiujn ĉambrojn sen tio ke via bopatro sciu tion ?

- Ĝuste, li parolis por veni hodiaŭ en la urbon por tre grava afero. Estas probable ke li estos ekstere dum la tuta tago, kaj ke nenio venos ĝeni vin. Ni nun havas mastrumistinon, sed ŝi estas maljuna kaj stulta, kaj mi povos facile forsendi ŝin.

- Perfekte. Ĉu vi havas ion por diri kontraŭ ĉi tiu ekskurso, Watsono ?

- Absolute nenion.

- Nu ! Ni iros kune. Kion vi tuj faros, vi mem ?

- Unu aŭ du butikumadojn, ĉar mi estas en urbo. Mi reeniros per la tagmeza trajno, tiel ke mi estos tien ĝustatempe por ricevi vin.

- Kaj vi povas kalkuli je ni frue dum la posttagmezo. Mi mem havas kelkajn aferojn por rapide plenumi. Ĉu vi ne volas resti por tagmanĝi ?

- Ne, necesas ke mi foriru. Mia koro estas bone malŝarĝita, nun kiam mi konfidis al vi mian doloron. Ĝis baldaŭ do.

Ŝi mallevis sian dikan vualon sur sian vizaĝon kaj eliris per malpeza paŝado.

- Kion vi pensas pri ĉio ĉi, Watsono ? demandis Holmso, sidigante sin sur sia seĝo.

- Ĉi tio ŝajnas al mi esti tre malklara kaj malbonaŭgura afero.

- Enigma jes, kaj malbonaŭgura ankaŭ.

- Tamen, se tio kion ŝi diras, estas vera, se la planko kaj la muroj estas netuŝitaj, kaj la pordo, la fenestro kaj la kameno netransireblaj, ŝia fratino estis tutcerte sola ĉe la momento de sia morto.

- Kion vi tiam faras pri ĉi tiuj noktaj fajfadoj kaj la strangaj paroloj de la mortiĝanto ?

- Mi ne scias kion pensi.

- Se vi faras komparon inter ĉi tiuj fajfadoj de la nokto kaj la ĉeesto de bando de ciganoj intime ligita kun ĉi tiu maljuna kuracisto, la fortaj probablecoj ke tiu ĉi estas preta por malebligi la geedziĝon de sia bofilino, la aludo de la mortiĝanto pri bendo, kaj finfine la fakto ke fraŭlino Helena Stonero aŭdis metalan ekbaton kiu povintus esti kaŭzita de la movado de unu el la feraj stangoj de la ŝutroj, ŝajnas al mi ke necesas serĉi ĉi-tiuflanke la klarigo de la mistero.

- Sed tiam kion faris tiuj ciganoj ?

- Mi absolute nenion scias pri tio.

- Mi ne trovas vian rezonadon tre konvinka.

- Ankaŭ mi ne, kaj ĝuste estas pro tio ke ni hodiaŭ iros al Stokmorano. Mi volas vidi ĉu la obĵetoj kiuj sin prezentas al mia menso, estas nesupereblaj, aŭ ĉu ili povas esti refutataj. Sed kia diablo !...

Ĉi tiu ekkrio estis ŝirita de mia kunulo pro la subita malfermo de la pordo, ĉe la apero de altastatura viro. Lia kostumo estis bizara miksaĵo de kiel deca viro kaj de terkulturisto, ĉar li surhavis cilindran ĉapelon, longan redingoton, kaj paron da tre altaj gamaŝoj; li enmane tenis ĉasvipon. Li estis tiel alta ke lia ĉapelo tuŝis la pordokadron, kaj tiel larĝa ke li ŝajnis plenigi tutplene la

aperturon.

Lia larĝa vizaĝo, sulkita de mil faldoj, brunigita de la suno, portis la spuron de plej malnoblaj pasioj; lia rigardo alterne haltis sur ĉiu el ni; liaj okuloj kavaj, galo-plenaj, kaj lia nazo hoka kaj senkarna, aspektigis lin kiel maljunan rabobirdon.

- Kiu el vi estas Holmso ? demandis tiu stranga persono.

- Estas mi, sinjoro, sed mi ŝatus scii al kiu mi havas la honoron paroli, diris mia kunulo sen emociiĝi.

- Mi estas doktoro Grimesbi Rojlooto, de Stokmorano.

- Vere, doktoro, diris Holmso per miela tono; bonvolu sidiĝi, mi petegas vin.

- Certe ne. Mia bofilino venis ĉi tien. Mi sekvis ŝian spuraron. Kion ŝi rakontis al vi ?

- La vetero estas malvarmega por la sezono, diris Holmso.

- Kion ŝi diris al vi ? kriis la furioza maljunulo.

- Sed mi aŭdis diri ke la krokusoj estus belaj ĉi tiun jaron, daŭrigis mia amiko sen deturni sin.

- Ha ! Ha ! Ĉu vi ne volas respondi al mi ? diris nia vizitanto, antaŭenirante de unu paŝo kaj svingante sian vipon. Mi konas vin, speco de fripono ! Mi jam aŭdis paroli pri vi. Vi estas Holmso.

Mia amiko iomete ridetis.

- Holmso, la viro kiu enmiksiĝas en tio kio ne koncernas lin.

Mia amiko vere ridetis.

- Holmso, la ŝupurigisto⁽⁶⁾ de la [Metropola Polico](#).

Holmso, ĉifoje, bonkore ridis.

- Vi interesas min. Mi nur petas vin kiam vi foriros, bonvoli fermi la pordon, ĉar vi lasis nin meze de aerblovo.

- Mi foriros kiam mi estos elverŝinta mian tutan koron. Mi malpermesas al vi enmiksiĝi en miaj aferoj. Mi scias ke

6 Franca esprimo signifanta "lakean flatulon".

fraŭlino Stonero venis ĉi tien. Mi gvatsekvis ŝin ! Mi estas danĝera viro por iu ajn kiu rezistas al mi. Prefere rigardu !

Li vigle antaŭeniris, ekkaptis per sia larĝa bruna mano la fajrostangon, kaj duige faldis ĝin.

- Staru do vin tute flanke, li blekis, kaj ĵetante la torditan fajrostangon en la fajron, li grandpaŝe eliris.

- Li ŝajnas al mi tre afabla viro, diris Holmso ridante. Mi ne estas tiel fortika kiel li, sed se li restintus pli longe, mi povintus vidigi al li ke mia pugnoforto valoras lian.

Post kio, reprenante la fajrostangon el ŝtalo, li rerekigis ĝin per unu fojo.

- Vi vidas ĉi tiun malrespekton konfuzi min kun la polico de sekureco ! Ĉi tiu incidento metas plian ĉarmon al nia enketo : mi esperas nur ke nia juna amikino ne devos suferi pro sia nesingardeco lasante sin postsekvi. Kaj nun, Watsono, ni tuj mendos la tagmanĝon, poste mi iros al la Mastra Sindikato de Kuracistoj, kie mi esperas trovi kelkajn utilajn informojn.

Estis preskaŭ la unua kiam Ŝerloko Holmso revenis de sia komisiono. Li tenis enmane bluan paperon kovrita de notoj kaj ciferoj.

- Mi vidis la testamenton de la mortinta edzino, li diris. Necesas por bone kompreni ĝin kalkuli la nunan valoron de la investaĵoj pri kio ĝi temas. La tuta enspezo, kiu ĉe la momento de la morto estis preskaŭ dek unu cent sterlingoj⁽⁷⁾, estas nun pro la malkariĝo de la agrikulturaj produktoj, nur 750 sterlingoj⁽⁷⁾. Ĉiu knabino geedziĝante rajtas al rento de 250 sterlingoj⁽⁷⁾. Estas do evidente ke se ili ambaŭ edziniĝus, la kara viro estus reduktata al malabunda porcio; eĉ la edziniĝo de unu sola farus konsiderindan truon en lia enspezo. Mia matena esplorado ne estis do senutila, ĉar ĝi pruvas ĝis la evidenteco ke la

7 Aŭ, hodiaŭ en 2019, proksimume 110.000€; 75.000€; 25.000€.

doktoro Rojloto havas la plej bonajn kialojn de la mondo kontraŭi tian projekton. Kaj nun, Vatsono, ĉi tio fariĝas tro grava por maldiligenti, des pli ĉar la maljuna bonulo scias ke ni interesiĝas pri liaj aferoj. Do, se vi estas preta, ni tuj veturos per fiakro kaj iros al la stacio de Vaterlo. Mi estos dankema al vi enŝovi vian revolveron en vian poŝon. Iu Elej n^{ro} 2 estas perfekta argumento kontraŭ individuoj kiuj kapablas duige faldi ŝtalan fajrostangon. Aldonu al ĝi dentobroson, kaj jen ni ekipataj.



En Vaterlo, ni havis la ŝancon trovi trajnon tuj forirontan al **Ledokapo**, kie ni luprenis ĉe la gastejo de la stacio veturilon kiu promenigis nin dum spaco de kvar aŭ kvin mejloj ($\pm 7Km$), tra la ĉarmaj vojoj de Surejo. Estis agrablega printempa tago, gajigita de bela suno, kiun de tempo al tempo vualis kelkaj flokaj nuboj. La arboj kaj la heĝoj de la rando de la vojo komencis burĝoni kaj la aero estis saturita de tiu bonaodoro de malseka tero. Kia stranga kontrasto inter la vekiĝo de la naturo tiom riĉa de espero kaj la malĝoja tasko en kiu ni estis enŝovitaj. Mia kunulo, sidanta sur la antaŭo de la veturilo, havis siajn brakojn krucitajn, kun la ĉapelo sur la okuloj kaj la mentono klinita sur la brusto; li ŝajnis perdinta en siaj pensoj. Subite li ekstrems, frapis min sur la ŝultron, kaj etendante la fingron al la herbejoj :

- Rigardu, li diris.

Mi ekvidis densan parkon leviĝantan per malkruta deklivo ĝis bosketo. Inter la branĉoj aperis la grizaj gabloj kaj la alta firsto de tre malnova loĝejo.

- Ĉu Stokmorano ? li diris.

- Jes, s'njoro, estas la domo de doktoro Grimesbi Rojloto, respondis la koĉero.

- Oni faras laborojn tie, diris Holmso; estas tie kien ni iras.

- Jen la vilaĝo, diris la kondukisto, montrante aron de tegmentoj je kelka distanco al la maldekstra; sed se vi volas iri al la domo, estos pli mallonge por vi transpasi tiun barieron kaj sekvi la padon tra la kampoj, tien kie la sinjorino promenas.

- Kaj tiu sinjorino estas, mi pensas, fraŭlino Stonero, rimarkis Holms, ŝirmante siajn okulojn per la mano por pli bone vidi. Jes, ŝajnas al mi ke via ideo estas bonega.

Ni elveturiĝis post esti paginta la veturon, kaj nia veturilo reeniris al Kapledo.

- Mi opiniis preferinda, diris Holms transsaltante la barieron, lasi kredi ĉi tiun knabon ke ni venis ĉi tie kiel arkitektoj kaj por difinita laboro. Tio malpli klaĉigos. Bonan vesperon, fraŭlino Stonero. Vi vidas ke ni estas fidelaj al nia parolo.

Nia klientino diligentis veni al nia renkonto kun feliĉa vizaĝo.

- Mi atendis vin kun tiom da senpacienco ! Ŝi kriis varme premante al ni la manon. Ĉio admirinde iras bone. Doktoro Rojloto iris al urbo kaj ne estas probable ke li revenu antaŭ ĉi tiu vespero.

- Ni recevis la plezuron konatiĝi kun li, diris Holms.

Kaj per kelkaj vortoj, li rakontis la intervidiĝon. Fraŭlino Stonero fariĝis palega.

- Granda Dio ! Ŝi kriis, ĉu li do postsekvis min ?

- Kompreneble.

- Li estas tiel ruza ke mi neniam certas pri io ajn. Kion li diros ĉe sia reveno ?

- Li devos nur bone kondukti, ĉar li povus trovi pli ruzan ol li. Necesas ŝlosi vian pordon ĉi tiun nokton. Se li volas uzi perforton, ni kondukos vin ĉe via onklino en Erpilo. Nun, ni ne malŝparu nian tempon, kaj tuj montru al ni la ĉambrojn kiujn ni devas ekzameni.

La konstruaĵo estis el griza ŝtono, makulita per likeno, kun alta centra pavilono, kaj ambaŭflanke du duoncirklaĵoj. En unu el tiuj aloj la fenestroj estis malbonstataj kaj ŝtopitaj per tabuloj, kaj la tegmento, parte disfalta, donis al ĉi tiu angulo la aspekton de ruino. La centra parto apenaŭ estis en pli bona stato, sed la dekstra alo ŝajnis relative moderna; la kurtenoj ĉe la fenestroj, la blua fumo eliranta el la kamentoj indikis ke ĉi tiu angulo estas loĝata. Estis skafaldo kontraŭ la gablomuro, kaj la muro mem estis tratruita, tamen neniuj laboristoj tie laboris. Holmsø tien kaj reen promenadis sur la gazono, cetere nebone prizorgita, kaj plej atentegaj ekzamenis la eksterajn aperturojn.

- Jen, mi opinias, la fenestro de via ĉambro; poste, en la mezo, tiu de la ĉambro de via fratino, kaj la plej proksima al la centra pavilono estas tiu de la ĉambro de doktoro Rojloto.

- Precize. Sed mi nuntempe loĝas en la meza ĉambro.

- Dum la laboroj, mi kredas. Pri tio, ne ŝajnas al mi ke ĉi tiu muro bezonu riparojn, ĉu ?

- Absolute ne; tio ŝajnas al mi esti tutsimple preteksto por ŝanĝigi al mi ĉambron.

- Ha ! Ĉi tio estas sufiĉe sugesta. Nun, la alia flanko de ĉi tiu alo estas okupita de koridoro al kiu rigardas ĉiuj ĉi ĉambroj. Estas fenestrojn, mi supozas ?

- Jes, sed tre malgrandaj, tro mallargaj eĉ por ke oni povu trapasi tra ĝi.

- Ĉiuokaze, ĉar vi ambaŭ ŝlosis viajn pordojn nokte, tiu flanko ne estis alirebla. Ĉu vi bonvolas iri en vian ĉambron, kaj fermi viajn ŝutrojn interne ?

Fraŭlino Stonero obeis, kaj Holmsø, post esti zorge ekzameninta la malfermitan fenestron, provis ĉiujn eblajn rimedojn cedi la ŝutrojn, sen sukcesi tion. Ne estis fendo

tra kie oni povu enŝovi eĉ tranĉilon por levi la fermostangon. Provizita de sia lupeo li rigardis de proksime la pordhokojn, sed ili estis el dika fero kaj firme kunigitaj en la masonaĵo.

- Hum, li diris kun sendecida mieno, gratante al si la mentonon, mia rezonado estas fundamente malĝusta. Neniu povis trapasi de ĉi tie kiam tiuj ŝutroj estis fermitaj. Ni vidu ĉu ekzameno interne de la ĉambro ne donos al ni ian indicon.

Malgranda pordo donis aliron al la kalkita koridoro sur kiu eliris la tri ĉambroj. Holmsø rifuzis ekzameni la trian, kaj ni tuj pasis al la dua, tiu en kiu nun loĝis F^{ino} Stonero, kaj kie ŝia fratino mortis. Ĝi estis beleta ĉambro, kun plafono iom malalta, kaj granda kameno, kiel oni ofte trovas ĝin en malnovaj domoj. En iu angulo, komodo el malhela koloro, en alia, mallarĝa lito, blanke farbita, kaj maldekstre de la fenestro, tualettablo. Ĉi tiuj tri mebloj, du malgrandaj vimenseĝoj, kaj peco de tapiŝo **Viltono** konsistigis la tutan meblaron de la ĉambro.

La muroj estis kovritaj de lignotegaĵoj el bruniĝinta kverko, vermopikitaj, tiel malnovaj kaj tiel senkolorigitaj de la tempo, ke ili devis datiĝi de la konstruado mem. Holmsø puŝis unu el la seĝoj en angulon, kaj sidiĝis sur ĝi, gardante absolutan silenton kaj trarigardante ĉiun angulojn kaj anguletojn de la ĉambro por fiksi ĉiun detalon en sia menso.

- Kie iras ĉi tiu sonorilo ? li fine demandis, montrante ŝnuron pendantan ĉe la kapo de la lito kaj kies la kvasto kuŝis sur la kapkusenon.

- Ĝi komunikas kun la ĉambro de la mastrumistino.
- Ĉi tiu ŝnuro ŝajnas pli nova ol la resto de la meblaro.
- Jes, oni tie metis ĝin nur antaŭ ĉirkaŭ du jaroj.
- Mi supozas ke estas via fratino kiu petis ĝin.
- Ne, mi ne kredas ke ŝi iam uzis ĝin. Ni kutimiĝis neuzi servistojn.

- Tiam, tio apenaŭ valoris meti ĉi tie tiel beletan ŝnuron de sonorilo. Nun mi tuj petos al vi la permeson ekzameni la plankon.

Li ĵetis sin ventralteren kaj provizita de sia lupeo, detaleme esploris la fendojn inter la lamenoj de la planko. Li same ekzamenis la lignotegaĵojn de la muroj. Poste li proksimiĝis al la lito, kaj rigardis ĝin ĉiudirekte tiel kiel la muron kontraŭ kiu ĝi estis apogita. Finfine li ekprenis la sonorilan ŝnuron kaj forte tiris ĝin.

- Hej ! Kio, ĉu ĝi estas falsa ?

- Kiel ? Ĉu ĝi ne sonoras ?

- Ne, ĝi eĉ ne estas ligita al fera drato. Ho ! Sed ĉi tio fariĝas tre interesa. Jen, rigardu, la ŝnuro estas ligita al hoko, ĝuste super la aer-aperturo.

- Sed estas sensenca ! Mi neniam rimarkis tion.

- Stranga, stranga ! flustris Holmso tirante la ŝnuron. Estas unu aŭ du aferoj tre apartaj en ĉi tiu ĉambro. Ekzemple, kiu estas la stulta arkitekto kiu estigis aeran aperturon inter du ĉambroj, kiam estis tiel simpla fari ĝin sur la ekstera muro ?

- Ankaŭ tio estas novdata, la junulino diris.

- Ĉu tio devus datiĝi de ĉirkaŭ la sama epoko kiel la ŝnuro de la sonorilo ? aldonis Holmso.

- Jes, ni faris plurajn malgravajn laborojn tiumomente.

- Ili estis sufiĉe eksterordinaraj : falsa ŝnuro de sonorilo, kaj aer-aperturo ne aerumanta. Kun via permeso, fraŭlino Stonero, ni tuj daŭrigos niajn esploradojn en la alia ĉambro.

La ĉambro de doktoro Grimesbi Rojloto estis pli granda ol tiu de sia bofilino, sed meblita laŭ la sama simpleco. Iu tendolito, malgranda bretaro plena de libroj, plejparte sciencaj libroj, fotelo apud la lito, seĝo el ligno kontraŭ la muro, ronda tablo kaj granda kiraskesto estis la ĉefaj

mebloj de ĉi tiu ĉambro, kies Holmso faris malrapide la rondiron, ekzamenante ĉiun objekton per la plej zorga atento.

- Kio estas ĉi enen ? li demandis, frapante sur la kiraskeston.

- Komercaj paperoj de mia bopatro.

- Ha !... Ĉu vi vidis ilin ?

- Nur unufoje, antaŭ kelkaj jaroj. Mi memoras ke ĝi estis plena de paperaĉoj.

- Ne estus hazarde kato ene !

- Ne. Kia ridiga ideo !

- Sed vidu do tion !

Li montris etan subtason, plenan de lakto, kiu estis metita sur la kesto.

- Ne, ni ne havas katon ĉi tie. Sed ni havas panteron kaj pavianon.

- Ho ! Jes; kompreneble ! La pantero, fakte, estas nur dika specimeno de la kateca specio. Sed subtasado da lakto ne povus sufiĉi por li, mi imagas. Tie estas io pri kio mi volus certigi min.

Li kaŭris sin antaŭ la seĝo el ligno, kaj ekzamenis la seĝon per la plej alta atento.

- Dankon. Ne plu estas dubo, li diris, restariĝante kaj remetante sian lupeon en sian poŝon. Nu ! Jen interesa objekto !

Kaj li montris malgrandan ĉasvapon pendigitan apud la lito. La vipŝnuro tamen estis nodita, tiel ke ĝi formis ŝovnodon.

- Kion vi pensas pri tio, Vatsono ?

- Ĝi estas vipo kiel ĉiuj vipoj. Nur mi ne scias kial la vipŝnuro estas tiel nodita.

- Ĉi tio jam ne estas ordinara, ŝajnas al mi ? Ha ! Miaj kompatindaj amikoj, la mondo estas tre malbona, kaj kiam homo metas sian inteligentecon al la servo de krimo, oni

povas antaŭvidi la plej malbonan malnoblaĵon. Mi kredas ke mi sufiĉe vidis, fraŭlino Stonero, kaj kun via permeso ni tuj eliros nun antaŭ la domo.

Mi neniam vidis la frunton de mia amiko tiel maltrankviligita kiel dum la momento kiam ni forlasis kun li lian esplorkampon. Ni, fraŭlino Stonero kaj mi, plurfoje paŝegis la gazonon sen aŭdaci interrompi liajn pripensadojn, kiam li mem rompis la silenton.

- Estas esenca, fraŭlino Stonero, li diris, ke vi ekzakte sekvu miajn instrukciojn ĝis en la plej malgrandaj detaloj.

- Mi certe ne preterlasos ilin.

- La afero estas tro grava por ke vi hezitu. Via vivo estas metota al risko.

- Mi tute fidas al vi.

- Unue, mia amiko kaj mi, ni devas tranokti en via ĉambro. La mirego de fraŭlino Stonero egalas mian.

- Jes, tio nepras. Mi tuj diros al vi kial ! Ĉu fakte estas la vilaĝa gastejo kiun ni vidas tien ?

- Jes, la gastejo de la Krono.

- Tre bone. Oni devas vidi viajn fenestrojn de tie ?

- Certe.

- Vi enŝlosos vin ĉe vi sub preteksto de migreno, kiam via bopatro reeniros. Poste kiam li retiriĝos al sia ĉambro por la nokto, vi malfermos la ŝutrojn, vi puŝos vian fenestron sen meti la hokon; vi metos vian lampon malantaŭen por ke ĝi servu al ni kiel signalon, kaj vi retiriĝos al via malnova ĉambro, kun ĉio kion vi povos bezoni por vi enlitiĝi. Mi ne dubas ke, malgraŭ la laboroj, vi ne povu enloĝiĝi tien dum unu nokto.

- Ho ! Jes, facile.

- La cetero koncernas nin.

- Sed kion vi estas farontaj ?

- Ni pasigos la nokton en via ĉambro, por malkovri la

kaŭzon de la bruo kiu tiom timigis vin.

- Mi kredas, sinjoro Holms, ke vi jam scias, diris fraŭlino Stonero, metante la manon sur lian brakon.

- Eble.

- Tiam, per la nomo de la ĉielo, diru al mi, kio estis kaŭzo de la morto de mia fratino ?

- Mi preferas havi pli certajn pruvojn antaŭ ol paroli.

- Vi povas almenaŭ diri al mi ĉu mi pravas kredi ke ŝi mortis pro timego.

- Mi ne pensas tion kaj kredas al pli konkreta kaŭzo.

Nun, fraŭlino Stonero, necesas ke ni forlasu vin, ĉar se doktoro Rojloto revenus kaj trovus nin ĉi tie, nia afero fiaskus. Adiaŭ, kaj estu kuraĝa, ĉar se vi faros tion kion mi diris al vi, vi baldaŭ ne plu riskos nenian danĝeron.

Ni facile trovis, Ŝerloko Holms kaj mi, du ĉambrojn ĉe la gastejo de la Krono. Ili estis sur la unua etaĝo, kaj de niaj fenestroj ni povis vidi la kradon de la enirejo kaj la loĝatan alon de la sinjordomo de Stokmorano. Je la noktiĝo ni vidis preterveturi doktoron Grimesbiⁿ Rojlotoⁿ; li ŝajnis dispremi per sia forta korpulenteco, la grumon kun la nefortaj ampleksoj kiu kondukis. La knabo havis kelkan malfacilaĵon por malfermi la pezajn kradojn; tio senpaciencigis la doktoron, li eksterigis tion per voĉeksplodoj kiuj alvenis ĝis ni kaj kiujn li akompanis per minacaj gestoj.

Kelkajn minutojn post kiam la veturilo estis enirinta en la parkon, lumo kiu aperis al ni inter la arboj, pruvis al ni ke la proprietulo de la malnova sinjordomo sidis en unu el la salonoj.

Ĉirkaŭ ni la mallumo fariĝis pli kaj pli profunda.

- Ĉu vi scias, Vatsono, Holms subite diris al mi, mi vere sentas skrupulon kuntiri vin ĉi-nokte. Nia entrepreno ne estas sen danĝero.

- Ĉu mi estos utila al vi ?
- Pli ol utila.
- Tiam mi akompanos vin.
- Mi estas tre danka al vi.
- Sed vi parolas pri danĝero ? Vi evidente elprenis de nia vizito en tiu domo pli da informoj ol mi.
- Ne, sed mi imagas ke mi pli rezonadis. Ĉio kion mi vidis, ankaŭ vi vidis tion.
- Mi vidis nenion rimarkindan krom tiun ŝnuron de sonorilo, kaj mi ne sukcesas ekkapti la celon de tio.
- Ĉu vi ankaŭ vidis la aer-aperturon ?
- Jes, sed tia komunikejo inter du ĉambroj ne ŝajnas al mi tiom eksterordinara afero; ĝi cetere estas tiom malgranda ke rato havus penon por trapasi ĝin.
- Mi ja pensis, eĉ antaŭ eniri en la domon, trovi tie ĉi tiun aer-aperturon.
- Nu do !
- Certe. Vi memoras ke en sia rakonto fraŭino Stonero diras al ni ke ŝia fratino odoris je la cigaro de doktoro Rojloto. Nature, ĉi tio implicis la ideon de ia ajn komunikiĝo inter la du ĉambroj, komunikiĝo kiu povis nur esti malgrandega, ĉar la esploro de la enketisto ne menciis ĝin. Mi do konkludis ke devis tie ekzisti aer-aperturo.
- Kaj kian ĝenaĵon vi trovas al ĝi ?
- kompreneble, almenaŭ estas en tio stranga koincido de faktoj. Oni starigas aer-aperturon, oni alpendigas ŝnuron kaj virino kiu dormas en ĉi tiu lito, mortas pro stranga morto : ĉu vi ne estas trafita de tio ?
- Mi vidas neniun rilaton inter ĉio ĉi.
- Ĉu vi rimarkis ion tre apartan pri ĉi tiu lito ?
- Ne.
- Ĝi estas fiksita sur la planko. Ĉu estas la kutimo tiel fiksi liton ?

- Mi ne kredas.

- Tiel la junulino ne povis movigi sian liton. Ŝi estis devigita ĉiam lasi ĝin trafeblan de la aer-aperturo kaj de la ŝnuro, ĉar ni povas tiel nomi ĝin, ĉar neniam estis sonorilo.

- Holmso ! mi ekkriis, mi komencas konfuze kompreni vian ideon. Ni alvenas ĝustatempe por malhelpi abomenan kaj malkrudan krimon.

- Tre abomena kaj tre malkruda. Kiam kuracisto deflankiĝas, li fariĝas la plej granda el la krimuloj, ĉar li havas por li flegmon kaj sciadon. [Palmero](#) kaj [Pritĉardo](#) estis la unuaj el sia profesio. Ĉi tiu viro celas ankoraŭ pli alten, sed mi kredas, Watsono, ke ni estos pli lertaj ol li. Atendante konstati ĉiujn tiujn hororaĵojn, kviete ni fumu pipon, kaj ni provu pensi dum kelkaj horoj pri aferoj malpli malgajaj.

Ĉirkaŭ la naŭa, la lumo kiu brilis tra la arboj estingiĝis, kaj ĉio refariĝis malluma direkte al la sinjordomo. Du longaj horoj fluus. Ĉe la horbato de la dekunua, hela lumo trapenetris la mallumon ĝuste antaŭ ni.

- Jen nia signalo, diris Holmso, salte stariĝante; ĝi fakte venas de la meza fenestro.

Forirante, li interŝanĝis kelkajn parolojn kun la tavernestro por klarigi al li ke ni iras viziti amikon kaj ke ni eble pasigos la nokton tien. Post momento, ni estis sur la vojo kun la vizaĝo vipita de glacia vento, paŝante al la lumo kiu gvidis nin en nia sinistra ekspedicio.

Ni ne havis malfacilaĵon por eniri en la parkon, kies muroj havis multnombrajn breĉojn. Ni jam atingis la gazonon, kaj transirinte ĝin, ni pretigis nin grimpi tra la fenestron kiam, de bosketo de laŭroj, pafiĝis speco de malbelega kaj kripla nano kiu ĵetis sin sur la gazono tordante siajn membrojn, poste fuĝis kaj malaperis en la mallumo.

- Granda Dio ! mi flustris; ĉu vi vidis ?

Holmso unue estis tiel surprizita kiel mi, kaj li nerveze premis al mi la manon. Poste li ekridis tamen silente, kaj flustris al mia orelo :

- Ĉarma domo : ĝi estis la paviano !

Mi forgesis la favoratojn de la doktoro. Li ankaŭ havis panteron; eble ni tre baldaŭ sentus ĝin sur niaj ŝultroj. Mi konfesas ke mi estis pli trankvila kiam, sekve de Holmso, kaj post esti demetinta miajn ŝuojn, mi troviĝis interne de la ĉambro. Mia kunulo senbrue fermis la ŝutojn, metis la lampon sur la tablon kaj rigardis ĉirkaŭ li. Ĉio estis kiel ni plentage vidis tion. Tiam senhaste proksimiĝante al mi, kaj farante paroltubon per sia mano, li murmuris al la orelo, per tiom mallaŭta tono ke mi apenaŭ povis distingi liajn vortojn :

- La plej malgranda bruo estus fatala por nia plano.

Mi signis ke mi aŭdis.

- Ni ne devas gardi lumon. Li vidus ĝin tra la aer-aperturo.

Mi respondis per gesto.

- Ne endormiĝu. Tio povus kosti al vi la vivon. Havu vian revolveron sub la mano, en okazo de bezono; mi tuj sidiĝos sur la liton; vi loku vin sur tiun seĝon.

Mi metis mian revolveron sur la angulon de la tablo. Holmso kunportis longan kaj maldikan vergon kiun li metis sur la liton apud li. Li apude metis alumetskatolon kaj pecon de kandelo; poste li estingis la lampon, kaj ni troviĝis en la mallumo.

Mi neniam forgesos ĉi tiun impresan maldormadon. Mi ne aŭdis sonon, eĉ ne spirbruon, kaj mi tamen sciis ke mia kunulo estis tie tute proksime, sidanta kun la okuloj malfermitaj, en la sama stato de nerva streĉiĝo kiel mi. La ŝutoj lasis trapasi neniun lumradion kaj ni estis en la plej densa mallumo. De ekstere alvenis kelkfoje al ni la blekadon de nokta birdo, kaj unufoje tute kontraŭ la

fenestro, longa miaŭo sciigis al ni ke la pantero estis ja libera. Malproksime ni aŭdis la obtuzajn notojn de la paroka horloĝo, sonantaj la kvaronojn je intervaloj kiuj ŝajnis al ni senfinaj. Noktomezo sonis, poste la unua, la dua, la tria, kaj ni estis ankoraŭ sidintaj silente, kun la espero de ebla evento.

Subite aperis en la direkto de la aer-aperturo lumeton kiu tuj svenis, sed post kiu sekvis fortaodoro de oleo kaj de varmigita metalo. Estis evidente ke oni lumigis en la apuda ĉambro ŝtellanternon. Mi aŭdis mallaŭtan bruon, poste ĉiu refalis en la silento, kvankam laodoro fariĝis pli forta. Dum ankoraŭ iu duonhorom restis senmova, kun la orelo streĉita. Subite alia sono aŭdiĝis, tre milda kaj karesa, kiel la bruo de vaporŝpruco eliranta el boligilo. Ĉe la momento kiam ĝi okazis, Holmsio saltis el la lito, ekbruligis alumeton, kaj komencis frapegi per la vergo laŭ ĉiuj siaj fortoj, la sonorilan ŝnuron.

- Ĉu vi vidas lin, Vatsono? li kriis. Ĉu vi vidas lin?

Mi absolute vidis nenion. Ĉe la momento kiam Holmsio lumigis, mi aŭdis obtuzan fajfon, kvankam distingeblan, sed la brilo de la lumo malhelpis miajn lacajn okulojn vidi sur kio mia amiko tiel kolere frapis. Mi tamen distingis lian vizaĝon subite fariĝintan morte palegan, kaj plenan de hororo kaj naŭzo.

Li estis ĉesinta frapadi, kaj rigardis la aer-aperturon, kiam subite eksplodis en la silento de la nokto, la plej abomenan krion kiun mi iam aŭdis. Ĝi ŝanĝiĝis al hurlado elŝirita samtempe per la sufero, la timo kaj la kolero. Oni diras ke en la vilaĝo, kaj eĉ en la pastrejo, ankoraŭ pli for, ĉi tiu krio vekis ĉiujn dormantojn; ĝi glaciigis al mi la koron, kaj mi restis tie ŝtonigata, kun miaj okuloj fiksitaĵal Holmsio; li ankaŭ rigardis min, kiam ĉio resentiĝis.

- Kio okazis? mi ekkriis ekkonsternita.

- Estas finite, respondis Holmso, kaj estas finfine la plej bona solvo. Prenu vian revolveron, ni tuj eniros ĉe doktoron Rojlotoⁿ.

Kun serioza vizaĝo, li ekflamigis la lampon kaj unue eliris en la koridoron. Li dufoje frapis sur la pordo sen ricevi respondon. Tiam li turnis la butonon, kaj eniris antaŭante min, kun la revolvero en la pugno.

Stranga spektaklo sin prezentis al niaj okuloj. Ŝtellarternu kuŝanta sur la tablo lumigis la kiraskeston kies la pordo estis duonmalfermita. Apud ĉi tiu tablo, sur la ligna seĝo, doktoro Grimesbi Rojloto, vestita per griza noktosurtuto, kun la piedoj nudaj surmetitaj per turkaj babuŝoj. Sur liaj genuoj, la vipo kun longa vipŝnuro kiun ni rimarkis dum la tago. Li havis la kapon malantaŭen klinitan, kaj liaj okuloj fikse rigardis angulon de la plafono. Sur la frunto, li havis specialan harbendon, flavan brune punktitan, kiu ŝajnis streĉa ĉirkaŭ lia kapo. Ĉe nia eniro li faris nenian movon.

- La bendo; la punktita bendo ! murmuris Holmso.

Mi faris paŝon antaŭen. Ĉe la sama momento, ĉi tiu stranga hararanĝo moviĝis, kaj la plata triangula kapo de malbelega serpento sin turnis al ni.

- Ĝi estas **vipuro de la marĉoj** ! kriis Holmso, la plej venena serpento de Hindio. La doktoro mortis dek sekundojn post esti mordita. Okulon pro okulo, denton pro dento. Ni reĵetu ĉi tiun estulon en ĝian kaŝejon, ni elkonduku fraŭlinon Stoneroⁿ sub ian alian gastaman tegmenton kaj ni sciigu la policon de la graflando pri tio kio okazis.

Parolante, li prenis la vipon sur la genuoj de la kadavro, poste ĵetante la ŝovnodon sur la rampulon, li eltiris ĝin de ĝia abomena portilo kaj portis ĝin per etendata brako ĝis la kiraskesto en kiu li ĵetis ĝin, kaj kies li refermis la pordon.

Tiel mortis doktoro Grimesbi Rojloto, de Stokmorano. Ne necesas plilongigi rakonton jam tro longan, rakontante kiel, post esti sciiginta la veron al la junulino, ni alkondukis ŝin per la matena trajno al ŝia kara onklino de Erpilo. La oficiala enketo pruvis ke la doktoro trovis la morton nesingarde ludante kun danĝera rampulo. Holmsio finis klarigi min pri ĉi tiu sinistra afero revenante al Londono dum la morgaŭo.

- Miaj unuaj konkludoj estis tute eraraj, tio kio montras, kara Watsono mia, kiom estas danĝere rezoni ekde nesufiĉaj donitaĵoj. La ĉeesto de la ciganoj, kaj la uzo de la vorto "bendo" de la kompatinda knabino por klarigi tion kion ŝi konfuze vidis per la brileto de ŝia alumeto, sufiĉis por ĵeti min sur malĝustan spuraron. Mi havis nur unu meriton, tiun ke mi *ŝanĝis miajn pilojn*⁽⁸⁾ ekde kiam estis evidente al mi ke la danĝero per kiu la loĝanto de ĉi tiu ĉambro povis esti minacita, ne povis veni aŭ tra la fenestro aŭ tra la pordo. Mia atento rapide estis altirita, kiel mi jam diris al vi, de la aer-aperturo kaj la ŝnuro de sonorilo pendigita super la lito. La malkovro ke ĉi tiu ŝnuro estis falsa, kaj ke la lito estis fiksita sur la planko, tuj suspektigis min ke la ŝnuro devis servi al objekto kiu trapasinte tra la truo malsupreniris al la lito. La ideo de serpento venis do nature al la menso, kaj kiam mi kunigis ĝin kun la fakto ke la doktoro ricevis bestojn el Hindio, mi sentis min sur la bona spuraro. La ideo uzi venenon kemie malvideblan devis veni al viro instruita kaj sen konscienco, kiu vivis en la Ekstremoriento.

La rapideco, per kiu ĉi tiu veneno agas, estis ankoraŭ avantaĝo, laŭ lia vidpunkto. Necesintus al la enketisto tre akran okulon por rekoni la du malgrandajn pikojn kaŭzitajn de la venenaj hokdentoj. Mi ankaŭ memoris pri la fajfadon. La doktoro kompreneble devis revenigi la serpenton antaŭ ol

8 Franca esprimo signifanta "*ŝanĝi mian ag-manieron*".

taglumo vidigis ĝin de lia viktimo. Li dresis ĝin, probable per la lakto kiun ni vidis, por reveni ĉe lia alvoko. Li trapasigis ĝin tra la aer-aperturo je la horo kiun li juĝis taŭga, certa ke la besto rampus laŭ la ŝnuro kaj malsuprenirus sur la liton. Pluraj noktoj povis pasi sen tio ke la viktimo estu mordita, sed pli-malpli frue ŝi devis morti.

Mi alvenis al ĉi tiu konkludo eĉ antaŭ ol eniri en la ĉambron de la doktoro. La ekzameno de lia seĝo pruvis al ni ke li kutimis grimpi sur ĝin, tio kio estis necesa por ke li kapablu atingi la aer-aperturon. La vido de la kiraskesto, la subtasoj da lakto kaj la ŝovnodo malaperigis la lastajn dubojn kiuj povis resti al mi. La metala bruo aŭdita de fraŭlino Stonero evidente devenis de la hasta fermo de la kiraskesto. Tuj post mia konvinko farita, vi scias la faritan aranĝon por akiri la definitivan pruvon. Vi aŭdis kiel mi fajfi al la rampulo : mi tuj faris lumon, kaj atakis ĝin sen perdi momenton.

- Tio kio rezultigis revenigi ĝin tra kien li venis.

- Kaj ankaŭ fari ĝin ataki ĝian mastron. Kelkaj el miaj batoj certe trafis ĝin kaj kolerigis ĝin tiel ke li ĵetis sin sur la unuan personon kiun li renkontis. Mi tiel estas nerekte respondeca pri la morto de doktoro Grimesbi Rojloto, sed mi ne povas diri ke ĉi tiu respondeco multe pezas sur mia konscienco.

La Dikfingro de la Inĝeniero.

Inter ĉiuj problemoj submetitaj al mia amiko S^{ro} Ŝerloko Holmso dum la jaroj de nia intimeco, nur du estis menciitaj al li de mi : tiu kiu rilatis al la dikfingro de S^{ro} Haterlejo, kaj tiu de la frenezo de la kolonelo Varburtono. La lasta sendube estas la plej interesa por tiel observema menso kiel lia; tamen la alia estas tiel stranga en ĝia komenco, tiel drama en ĝiaj detaloj, ke ĝi valoras esti rakontita, kvankam mia amiko ne havis la okazon uzi en ĝi ĉiujn siajn mirindajn analizajn kapablojn. La rakonto estis reproduktita pli ol unufoje en la gazetoj; sed, kiel ĉiam, simpla artikoleto malpli impresas la leganton ol la serio de faktoj disvolvantaj antaŭ liaj okuloj kaj iom post iom malkaŝante la misteron kiu ĉirkaŭas ilin. La detaloj de ĉi tiu afero tiam profunde impresis min, kaj du elpasintaj jaroj de tiam apenaŭ malpliigis la efekton.

Estis dum la somero de 1.889, malmute da tempo post mia geedziĝo. Mi estis reveninta al mia civila klientaro, kaj estis finfine forlasinta Holmsoⁿ kiu ankoraŭ loĝis en la strato Bakisto, kie mi ofte vizitis lin; mi eĉ sukcesis perdigi al li iom da siaj kutimoj de nesociulo, ĝis li foje venis ĉe ni. Mia klientaro konstante kreskis, kaj ĉar mi loĝis apud la stacio de [Padafarmo](#), mi havis kelkajn klientojn inter la fervojaj dungitoj. Unu el ĉi tiuj, kiun mi resanigis de longa kaj dolora malsano, ne laciĝis kantadi miajn laŭdojn kaj provis sendi al mi ĉiujn malsanulojn sur kiuj li povis havi ian influon.

Iun matenon, iom antaŭ la sepa, mi estis vekata de la servistino frapante sur mia pordo por diri al mi ke du viroj de la stacio de Padafarmo atendis min en la konsultejo. Mi

haste vestis min ĉar mi proprasperte sciis ke la vundoj de la laboristoj ofte estis tre gravaj. Ĉe la momento kiam mi malsupreniris la ŝtuparon, mia malnova amiko, la trajnestro, eliris el mia konsultejo, zorge refermante la pordon malantaŭ li.

- Li estas tien, li murmuris indikante per la fingro la ĉambron kiun li ĵus forlasis, li ne forkuros.

- Kiu estas ? mi demandis, ĉar la konduto de mia interparolanto ŝajnis montri misteron.

- Li estas nova paciento, li murmuris. Mi volis mem alkonduki lin, tiel estis pli certa. Li estas tien, nenio estas timenda. Necesas ke mi iru nun, doktoro; mi havas mian laboron, tute kiel vi.

Kaj li foriris, la bonkora alpelanto, sen eĉ doni al mi tempon por danki lin.

Mi eniris en mian kabineton kaj trovis tie viron sidantan apud la tablo. Li estis simple vestita per erik-kolora kompleto, lia kaskedo el drapo estis metita sur miaj libroj; unu el liaj manoj estis envolvita en nazituko tute makulita de sango. Kiel aĝo, dudek kvin jaroj maksimume, kun vizaĝo tre vireca kaj velkinta vizaĝkoloro, kiu donis al mi la impreson de viro kiu estus sub la influo de tre fortega emocio.

- Mi bedaŭras ĝeni vin tiel frue, doktoro, li diris al mi. Sed mi ĉi-nokte suferis tre gravan akcidenton. Mi ĵus alvenis per la matena trajno, kaj informiĝinte pri kuracisto en Padafarmo, bravulo komplezeme alkondukis min ĉi tien. Mi donis mian karton al la servistino, sed mi vidas ke ŝi lasis ĝin sur la tablo.

Mi prenis ĝin kaj legis : S^{ro} Viktoro Haterlejo, Inĝeniero Hidraŭlikisto, 16A strato Viktoria (3^a etaĝo).

- Mi bedaŭras esti atendiginta vin, mi diris, sidiĝante. Vi ĵus nokte vojaĝis, okupo sufiĉe monotona, ĉu ne ?

- Ho ! Mi tamen ne povas diri ke mia nokto estis

monotona, li respondis ridante per nerva rido kiu tute konvulsigis lin.

Volante ĉesigi krizon kiun mi vidis veni :

- Kviete ! Mi kriis. Trankviligu vin ! Kaj mi pretigis por li glason da akvo.

Sed ĉio estis senutila. Mi ne sukcesis haltigi fortegan nervozan atakon, unu el tiuj atakoj kiujn la plej energiaj naturoj povas suferi post granda emocio. Finfine li trankviliĝis, sed restis elĉerpita kaj iom honta.

- Pardonu min, li diris anhelanta.

- Tute ne. Trinku !

Mi metis kelkajn gutojn da konjako en akvo kaj tuj vidis reveni iom de koloro sur liajn sensangajn vangojn.

- Mi plibonfartas ! li diris. Kaj nun, doktoro, ĉu vi bonvolas flegi mian dikfingron aŭ plivole la lokon kie estis mia dikfingro.

Mi demetis la poŝtukon, malkovris lian manon, kaj ĉe la vido de la vundo mi ektremis malgraŭ la memrego kiun longa praktikado donis al mi. Restis nur kvar fingroj, kaj anstataŭ la dikfingro estis ruĝa kaj spongeca surfaco, abomena por vidi. La dikfingro estis fortranĉita aŭ forŝirita, precize ĉe ĝia naskiĝo.

- Granda Dio ! Mi ekkriis, ĝi estas terura vundo. Vi verŝajne multe sangis ?

- Jes, multe. Mi eĉ svenis ĉe la momento mem; kaj mi kredas ke mi restis sufiĉe longe sen konscio. Kiam mi rekonsciiĝis, mi ankoraŭ sangis, tiam mi streĉe ligis mian poŝtukon ĉirkaŭ mia pojno, kaj alfiksis ĝin per pinglo.

- Perfekte ! Vi meritis esti kirurgo.

- Mi lernis tion dum miaj inĝenieraj studoj; tio koncernas mian fakon.

- Ĉi tiu vundo laŭaspekte estis farita de tre peza kaj tre tranĉa instrumento ? mi diris post ekzamenado de la vundo.

- Jes, de instrumento simila al tranĉilego.
- Akcidento, mi pensas ?
- Tute ne.
- Kio, atenco ?
- Precize.
- Sed tio estas terura !

Mi viŝis la vundon, purigis ĝin, bandaĝis ĝin; kaj fine kovris ĝin per vato kaj per fenolhavaĵaj bandaĝoj. Mia paciento restis dum la tuta tempo dorsapogita sur sia seĝo, sengrumbles, sed mi rimarkis, ke li ofte mordis al si la lipojn.

- kiel vi fartas ? mi demandis kiam mi finis.

- Tre bone. Via konjako kaj via pansaĵo faris de mi alian homon. Mi sentis min tre malforta alvenante, sed estas ankaŭ ke mi travivis kruelajn elprovojn !

- Ni ne parolu pri tio por ne eksciti viajn nervojn.

- Jen ili pli trankvilaj. Cetere necesos ke mi rakontu mian historion al la polico. Mi tamen konfesos al vi ke, se ne estis la evidenta atesto de mia vundo, ili ne kredus al mia depozicio, tiom ĝi estas eksterordinara kaj malprovizita de pruvoj. Kaj en la okazo, se oni volus fari enketon, la indikoj, kiujn mi havas por doni, estas tiel malprecizaj ke estas dubinde ke justeco povu esti farita.

- Ha ! mi ekkriis, se tie estus problemo kiun vi deziras vidi solvita, mi forte rekomendus al vi veni kun mi ĉe mian amikon S^{ro} Ŝerloko Holms, antaŭ ol alparoli al la oficiala polico.

- Mi jam aŭdis paroli pri ĉi tiu sinjoro, kaj mi estus tre feliĉa konfidi al li mian aferon, kvankam kompreneble mi ankaŭ devas turni min al la polico. Ĉu vi bonvolas doni al mi prezentleteron por li ?

- Mi faros pli bone. Mi mem alkondukos vin tien.
- Kaj mi tre dankos vin.
- Ni veturu per fiakro kaj ni iru kune. Ni alvenos

ĝustatempe por tagmanĝi ĉe li. Ĉu vi volas ?

- Jes, mi kvietiĝos nur kiam mi estos rakontinta mian aventuron.

- Nu ! Mia servantino iras voki fiakron : mi estos al vi post momento.

Mi supreniris hejme, mallonge klarigis la aferon al mia edzino, kaj kvin minutojn poste mi estis en fiakro, veturante kun mia nova kliento al strato Bakisto.

Ŝerloko Holmsio estis, kiel mi antaŭvidis tion, maldiligentanta en sia salono, en noktosurtuto, leganta la kolumnon de la anoncoj de *La Tempoj*, kaj fumanta sian pipon de antaŭ la tagmanĝo, pipon kiu konsistis el ĉiuj stumpoj kaj restaĵoj de la antaŭtago, zorgeme sekigitaj kaj kolektitaj sur la angulo de la kamenbreto. Li ricevis nin laŭ sia kutima afableco, mendis aldonon da krastrotaĵoj kaj ovojn, kaj grandapetite manĝis kun ni. Kiam tio finiĝis, li sidigis nian gaston sur sofion, metis kusenon sub lian kapon, kaj glason da akvo miksitaj kun konjako permane traflebla.

- Mi vidas ke via aventuro ne estis banala, sinjoro Haterlejo, li diris. Etendiĝu tie, kaj faru kiel hejme. Parolu, se vi havas la forton, sed ĉesu ĉiufoje kiam vi sentos vin laca, kaj subtenu viajn fortojn helpe de ĉi tiu stimulilo.

- Dankon, diris la paciento, mi sentas min tute alia de kiam la kuracisto bandaĝis min, kaj mi kredas ke via tagmanĝo kompletigis la kuracadon. Mi volas kiel eble malplej troigi pri via tempo, tiom grava, kaj mi tuj komencas.

Holmsio sidiĝis en grandan fotelon, duone fermis la okulojn kaj ekprenis tiun lacecan sintenon kiu kontrastis tiel forte kun lia naturo vigla, movoplenta; mi sidiĝis antaŭ lin kaj ni aŭskultis silente la strangan rakonton kiun faris al ni nia vizitanto :

- Necesas ke vi sciigu ke mi estas orfo kaj fraŭlo, mi loĝas

sole, en Londono, en meblita apartamento. Profesie, mi estas inĝeniero hidraŭlikisto, kaj mi akiris multan sperton dum la sep provjaroj kiujn mi faris ĉe Venero kaj Matesono, la tre famkonata domo de Grenviĉo. Mi ĵus finis ĝin, antaŭ du jaroj, kiam la morto de mia patro sidigis min sur malgranda riĉaĵo kiu ebligis min aranĝi mian propran mastraĵon : mi tiucele luprenis oficejon en la strato Viktorino.

...Ĉiu komenco de negoco estas peniga, sed mi certe ja havis pli da malfacilaĵoj ol alia. Dum du tutaj jaroj, mi ricevis nur tri konsultojn kaj malgrandan laboron por fari. Jen ĉio kion mia profesio gajnigis al mi. Dum ĉi tiu tempospaco, mia malneta enspezo atingis dudek sep kaj duono sterlingoj. Ĉiutage, de la naŭa matene ĝis la kvara vespere, mi vane atendis en mia malgranda loĝejo vizitantojn kiuj ne venis kaj mi komencis malpacientiĝi kaj kredi ke mi neniam havos klientaron.

...Hieraŭ, tamen, ĝuste ĉe la momento kiam mi preparis min por forlasi la oficejon, mia helpisto eniris por diri al mi ke viro volas vidi min. Li prezentis al mi karton kiu surhavis la nomon de la kolonelo Lisandro Starko kaj preskaŭ samtempe mi vidis eniri la kolonelon mem. Li estis viro kun staturo super la averaĝo, sed kun tia malgraseco ke mi kredas esti neniam vidinta similan. Lia nazo kaj lia mentono elstaris sur lia vizaĝo simila al klingo de tranĉilo, kaj la haŭto de liaj vangoj estis streĉita sur liaj tre distingaj zigomoj. Ĉi tiu ekstrema maldikeco ŝajnis esti lia natura stato, kaj ne la efiko de malsano, ĉar lia okulo estis brila, lia paŝado rapida, lia sinteno memfida. Li estis simple sed taŭge vestita, kaj ŝajnis proksimiĝi la kvardekjaraĝo.

..."Sinjoro Haterlejo, li diris, kun ia germana akĉento. Oni rekomendis vin al mi, ne nur pro viaj inĝenieraj kapabloj, sed ankaŭ pro via elprovita diskreteco.

...Mi kliniĝis, sufiĉe flatita de ĉi tiu komplemento.

...Ĉu mi povas scii kiu donis al vi ĉi tiun bonegajn informojn ? mi demandis al li.

..."Be, eble pli bone valoras ne tuj diri tion al vi. Mi sciiĝis el la sama fonto ke vi estas orfo kaj fraŭlo kaj ke vi vivas sole en Londono.

..."Tio estas perfekte vera, mi respondis, sed mi ne bone vidas kian rilaton tio povas havi kun miaj profesiaj kvalitoj; mi kredis ke vi venis konsulti min pri profesia afero.

..."Sen iu ajn dubo. Tamen ĉi tiu antaŭparolo estis necesa, ĉar se mi bezonas homon el via profesio, necesas ankaŭ ke ĉi tiu homo estu absolute diskreta, absolute, vi bone aŭdas min. Nu ĉi tiu kvalito renkontiĝas pli ofte ĉe fraŭlo ol ĉe viro kiu vivas meze de sia familio.

..."Se mi donas mian parolon, konservi la sekreton, mi diris, vi povas absolute kalkuli kun mi.

...Li fikse rigardis min dum mi parolis, kaj mi ne kredas esti neniam vidinta okulon tiel suspekteman kaj ekzamenan.

...Ĉu vi do promesas ? li fine diris.

..."Jes, mi promesas.

..."Absolutan kaj kompletan silenton, antaŭ, dum kaj poste ? Neniun aludon al la afero, nek parole, nek skribe ?

..."Mi jam donis al vi mian parolon.

..."Bonege.

...Li abrupte stariĝis, trairis la ĉambron kiel fulmo kaj malfermis la pordon. La koridoro estis dezerta.

..."Estas perfekte, li diris revenante. Mi scias ke la helpistoj estas ofte scivolemaj pri la aferoj de siaj mastroj. Nun ni povas sekure interparoli.

...Li alproksimigis sian seĝon tute proksime al la mia, kaj rekomencis ekzameni min per la sama demando kaj pensema rigardo. Subite mi sentis senton de mallogo kaj eĉ de teruro antaŭ la strangaj manieroj de ĉi tiu malgrasega viro.

Eĉ la timo perdi klienton ne sukcesis deteni min de montri mian malpaciencon.

..."Bonvolu klarigi al mi vian aferon, sinjoro, mi diris, mia tempo estas grava.

...Ĉielo pardonu al mi ĉi tiun lastan frazon, kiu estis nur banala mensogo; mi ne povis bridi ĝin sur miaj lipoj.

..."Ĉu vi akceptus kvindek gineojn⁽⁹⁾ por nokta laboro ?

..."Perfekte.

..."Mi diras nokton de laboro, mi devus diri horon. Mi nur bezonas vian opinion pri hidraŭlika premaŝino kiu funkcias malbone. Se vi vidigos al ni pro kio ĝi lamas, ni mem kapablos ripari ĝin. Kion vi pensas pri tia laboro ?

..."La laboro ŝajnas facila kaj la salajro bonega.

..."Estas tio kio ŝajnas al mi. Ĉu vi povas veni ĉi-vespere per la lasta trajno.

..."Kien ?

..."En Ejfordo, en Berkŝiro. Ĝi estas malgranda loko situanta ĉe la limo de Oksfordŝero, kaj ĉirkaŭ sep mejlojn de Legado. Estas en Padafarmo trajno kiu kondukos vin tien je ĉirkaŭ la dekunua kaj dekkvin.

..."Bonege.

..."Mi venos serĉi vin per veturilo.

..."Ah ! Ĉu ĝi estas do sufiĉe for de la stacidomo ?

..."Jes, nia vilaĝeto estas ververe en la kamparo. Ĝi estas je almenaŭ sep mejloj de la stacidomo de Ejfordo.

..."Ni do ne alvenos tien antaŭ noktomezo, kaj mi supozas ke mi ne trovos trajnon por rekonduki min ĉi tien. Necesos ke mi pasigos la nokton tie ?

..."Jes, ni loĝos vin facile.

..."Tio estas tre embarasa. Ĉu mi ne povus veni je pli konvena horo ?

..."Ne, kaj estas ĝuste por kompensi al vi ĉi tiun noktan

9 Unu gineo valoris 21 ŝilingojn, do hodiaŭ en 2019, proksimume 2.100€.

ĝenon ke ni donas al vi mem, juna kaj nekonata homo, honorarion egalan al tiu kiun povus postuli unu el la famuloj de via profesio. Tamen, se vi preferas rezigni la aferon, kompreneble, nenio estas farita.

...Mi pensis pri la kvindek gineoj kiuj tiel oportune venis.

..."Antaŭ ĉio, mi diris, mi estos tre feliĉa konformiĝi al viaj deziroj. Mi tamen ŝatus kompreni iom pli klare tion kion vi petas al mi.

..."Evidente. Estas tute nature ke la promeso kiun ni ricevis de vi, ekscitis vian scivolon. Mi volas ke vi agu plene konante la aferon. Ĉu vi tute certas ke neniu aŭskultas ?

..."Tute certa.

..."Nu ! Jen. Vi sendube scias ke la fulargilo estas valora produkto, kaj ke oni trovas ĝin en Anglio nur sur unu aŭ du lokoj.

..."Efektive.

..."Antaŭ kelka tempo mi aĉetis malgrandan teron, tre malmulte gravan, je ĉirkaŭ dek mejloj de Legado, kaj mi havis ŝancon malkovri tavolon de fulargilo en unu el miaj kampoj. Post ekzameno, mi konstatis ke ĉi tiu tavolo daŭris ĉe niaj najbaroj dekstre kaj maldekstre, kaj troviĝis ĉe ili multe pli grava ol ĉe mi. Ĉi tiuj bravuloj tute ne sciis ke ilia bieno enhavis produkton tiel altvaloran kiel oron, kaj nature estis mia intereso aĉeti al ili terenon antaŭ ol ili malkovru ĝian valoron. Bedaŭrinde mi ne havis sufiĉan kapitalon por fari tiun akiron. Mi konfidis ĉi tiun sekreton al kelkaj amikoj, kaj ili konsilis al mi sekrete ekspluati la malgrandan tavolon kiu estis ĉe mi kaj realigi per tiu rimedo la necesan sumon por la aĉeto de la najbaraj terenoj. Estas tion kion ni faris kaj por faciligi niajn operaciojn, ni aĉetis hidraŭlikan premaŝinon. Ĉi tiu premaŝino, kiel mi jam klarigis al vi, difektiĝis, kaj ni deziras havi vian opinion pri tio. Sed ni tre zorge tenas nian sekreton, ĉar se oni

sukcesis scii ke specialistoj pri hidraŭliko venas ĉe ni, tio estigus viglecon; vi komprenas ke tuj kiam la vero estas konata, adiaŭ nian ŝancon aĉeti tiujn terenojn kaj plenumi nian projekton. Jen kial mi promesis vin diri al neniu ke vi iras al Ejfordo ĉi-vespere. Mi esperas ke vi bone komprenis min ?

..."Perfekte. La sola afero kiun mi ne tre bone komprenas, estas al kio utilas hidraŭlika premaŝino por eltiri la fulargilon kiun oni trovas tute simple fosante.

..."Ha ! li diris kun senĝena mieno, ni havas procedon de ni. Ni kunpremas la teron al briketojn, por povi transporti ĝin sen ke oni sciu tion kio ĝi estas. Sed ne gravas ĉi tiu demando pri detaloj. Mi nun diris ĉion al vi, sinjoro Haterlejo, vi sentas kian fidon mi havas en vi.

...Li parolante stariĝis.

..."Mi do atendas vin en Ejfordo je la dekunua kaj duono.

..."Mi ne maltrafos la rendevuon.

..."Kaj ne unu vorto al iu ajn vivantulo.

...Li fikse rigardis min per lasta kaj longa rigardo plene da malfido, kaj premante al mi la manon per malvarma kaj ŝviteta teno, li rapide eliris.

...Kiam mi reakiris mian memregadon kaj ke mi bone pripensis pri ĉio ĉi, mi trovis tre stranga la specon de laboro kiun oni tiel proponis al mi. Unuflanke, mi estis sufiĉe kontenta, ĉar la honorario estis dekoble pli alta ol tiuj kiujn mi povintus peti, kaj ĉi tiu mendo povis okazigi al mi aliajn. Sed aliflanke, la vizaĝo kaj la agmanieroj de mia kliento faris sur mi malbonan impreson, kaj mi ne kapablis trovi en lia rakonto pri fulargilo sufiĉan klarigon nek por nokta vojaĝo nek por tiel absoluta sekreto. Fine mi flankenmetis miajn antaŭtimojn; mi bonapetite tagmanĝis, kaj mi enbrajnis al Padafarmo, sen malkaŝi ion ajn de mia sekreto.

...En Legado, mi devis ŝanĝi ne nur de veturilo, sed ankaŭ de stacio. Mi grimpis en la lastan trajnon direktiĝonta al Ejfordo kaj alvenis en tiu malbone lumigata eta stacidomo je la preterpasita dekunua. Mi estis la sola vojaĝanto ironta al Ejfordo kaj mi vidis neniun sur la kajo, krom servisto dormetanta apud sia lanterno. Sed, ĉe la eliro, mi trovis mian klienton kiu atendis min en la mallumo; sen diri unu vorton, li prenis min per la brako kaj enveturigis min en kaleŝon kies la pordo estis malfermata. Li relevis ambaŭflanke la fenestrajn vitrojn, frapis kontraŭ la vando kaj la ĉevalo grandtrote ekiris.

- Estis nur unu ĉevalo ? interrompis Holmso.

- Jes, nur unu.

- Ĉu vi vidis kia koloro ĝi estis ?

- Jes, per la lumo de la lanternoj, mi vidis ke ĝi estis alzano.

- Ĉu li ŝajnis laca, aŭ vigla ?

- Ho ! Vigla kaj li havis brilajn harojn.

- Dankon. Pardonu esti interrompanta vin. Daŭrigu, mi petegas, vian tiom interesan rakonton.

- Ni do foriris kaj ni veturis dum almenaŭ unu horo. La kolonelo Lisandro Starko diris al mi ke estis je sep mejloj, sed mi kredas, pro la rapido laŭ kiu ni iradis kaj la tempo kiu fluis inter foriro kaj alveno, ke estis prefere dek du mejloj ol ok. Mia kunulo ne parolis kaj mi sentis lian rigardon fiksita sur mi. La vojo devis esti malbona, laŭ juĝo de la skuadoj de la veturilo. Mi provis rigardi tra la fenestrojn, sed ili estis el diafana vitro, kaj mi povis nur malprecize vidi la brilon de la lumoj kiuj renkontpasis nin. De tempo al tempo mi hazardis rimarkon por rompi la monotonecon de la vojaĝo, sed la kolonelo respondis nur per unusilabaĵoj, kaj la konversacio tuj falis. Finfine la skuoj de la vojo estis anstataŭigitaj de pli milda veturado sur sablita aleo, kaj la

veturilo haltis. La kolonelo Lisandro Starko unue elsaltis teren, kaj ĉar mi sekvis lin, li vigle enirigis min tra malfermita pordo antaŭ ni. Tiele mi faris, por tiel diri, nur salton de la kaleŝo al la antaŭĉambro, kaj tial mi ne povis havi la plej etan ekvidon de la fasado de la domo. Tuj kiam mi transpaŝis la sojlon, la pordo peze malfermiĝis, kaj mi aŭdis la ruliĝadon de la veturilo kiu malproksimiĝis.

...Estis mallume kiel en forno en la interno, kaj la kolonelo palpe serĉis alumetojn, grumblante mallaŭte. Subite pordo malfermiĝis ĉe la alia flanko de la koridoro, kaj longa lumradio alvenis ĝis ni. Poste aperis virino tenanta lampon super sia kapo kaj klinanta la korpon antaŭen por videti nin. Ŝi ŝajnis al mi tre beleta, vestita de riĉa ŝtofo, tiom kiom mi povis juĝi tion per la rebriloj de tiu ŝtofo en la lumo. Ŝi eldiris kelkajn vortojn en fremda lingvo, laŭ demanda tono; mia kunulo respondis per kruda kaj seka vorto, kiu ekremigis ŝin tiel ke la lampo preskaŭ elglitis el ŝiaj manoj. La kolonelo Starko alproksimiĝis al ŝi, flustris ion en ŝian orelon, kaj poste pelante ŝin en la ĉambron de kie ŝi eliris, revenis al mi kun la lampo en la mano.

..."Ĉu vi bonvolos atendi ĉi tie dum kelkaj minutoj, li diris malfermante alian pordon.

...La ĉambro en kiu mi troviĝis, estis sobre meblita : meze, ronda tablo sur kiu dise kuŝis germanaj libroj, apud la pordo, harmoniumo sur kiu la kolonelo Starko metis la lampon.

..."Mi petas al vi nur momenton, li diris, kaj li foriris en la mallumon.

...Mi rigardis la librojn kaj malgraŭ mia nescio de la germana, mi konstatis ke du el ili estas sciencaj traktaĵoj, kaj la aliaj poezilibroj. Mi iris al la fenestro, esperante vidi la kamparon, sed la fenestro estis fermita de kverka ŝutro, alfortikigita helpe de forta fera stango. Ĉi tiu domo estis

mirinde silenta. Ekster la tiktakado de malnova horloĝo en la koridoro, ĉio ŝajnis morta en ĉi tiu loĝejo. Konfuza sento de ĝenateco komencis invadi min. Kiuj estis tiuj germanoj, kaj kion ili faris en ĉi tiu stranga izolita loko ? Kie estis ĉi tiu loko ? Mi estis je dek mejloj, aŭ proksimume, de Ejfordo, estas ĉio kion mi sciis, sed norden, suden, orienten, okcidenten ? Neeble ĝuste taksi tion. Por trankviligi min, mi diris al mi ke Legado, kaj eble aliaj grandaj urboj, troviĝis en la ĉirkaŭaĵoj kaj ke fine la loko povis ja ne esti tiel izolita kiel mi unuatempe kredis tion. Tamen laŭ la ĉirkaŭa kvieteco, estis tute certe ke ni estis meze de kamparo. Mi tien kaj reen trapaŝadis la ĉambron, zumkantante melodion por doni al mi kuraĝon, kaj trovante ke mi bone gajnis miajn kvindek gineojn.

...Subite, sen tio ke mi aŭdis la plej etan bruon kaj meze de la plej absoluta silento, la pordo malrapide malfermiĝis. La virino kiun mi jam vidis, aperis en la aperturo, enkadrita en ombro; ŝia bela, inteligenta vizaĝo plene lumigita de la lumo de la lampo, vidigis fortan ektimon kiun ŝi komunikis al mi. Ŝi gestis al mi per tremanta fingro por ne brui, poste ŝi flustris en mian orelon kelkajn vortojn el malbona angla, senĉese turnante la okulojn al la malfermita pordo malantaŭ ŝi, kiel postĉasata besto.

..."Sur via loko, mi forirus, ŝi diris provante ne tremigi sian voĉon; mi certe ne restus ĉi tie, vi ne estas farita por la tasko kiu atendas vin.

..."Sed, sinjorino, mi diris, mi ankoraŭ ne plenumis mian taskon. Mi ne povas foriri sen esti vidinta la maŝinon.

..."Kredu min, ŝi daŭrigis, ne atendu. Vi povas pasi ĉi tie; estas neniu.

...Kaj tiam, vidante ke mi ridetis skuante la kapon, ŝi maltimiĝis kaj faris paŝon antaŭen, tordiĝante la manojn.

..."Pro la ĉielamo, ŝi murmuris, foriru antaŭ ol tio estu tro

malfrua !

...Mi bedaŭrinde estas nature obstina kaj ju pli inklina por riski min en afero, des pli mi renkontas obstaklojn. Mi pensis pri miaj kvindek gineoj, pri la enuiga vojaĝo kiun mi ĵus faris, pri la malagrabla nokto kiu probable atendis min. Mi do farintus ĉion ĉi por nenio ? Kial mi finfine forkurus sen esti plenuminta mian komision kaj sen ricevi la laborpagon al kiu mi rajtis ? Ĉi tiu individuo povis esti freneza ! Kion mi sciis pri tio ? Mi do rezolute kapneis, kvankam la agmaniero de tiu virino emociis min pli ol mi volis konfesi, kaj mi klare deklaris mian intencon resti kie mi estis. Ŝi estis tuj ripetonta siajn admonojn kiam mi aŭdis fermi pordon sur la unua etaĝo kaj malsupreniri la ŝtuparon. Ŝi momente aŭskultis, senespere levis la manojn al ĉielo kaj malaperis tiel rapide kaj silente kiel ŝi venis.

...La novaj alvenantoj estis la kolonelo Lisandro Starko kaj dika vireto kun griziĝanta barbo kiu eliris el la faldoj de sia duobla mentono; ĉi lasta estis prezentita al mi kiel estanta sinjoro Ferguson.

...Li estas mia sekretario kaj mia administranto, diris la kolonelo. Sed, tamen, ŝajnas al mi ke mi fermis ĉi tiun pordon forirante ? Mi timas ke vi estis en aerblovo.

..."Kontraŭe, mi diris, mi malfermiĝis ĉar mi sentis varmecon.

...Li ĵetis al mi malfideman ekrigardon.

..."Se ni parolus pri nia afero, li diris. Ni tuj, sinjoro Ferguson kaj mi, alkondukos vin por vidi la maŝinon.

..."Ĉu mi devas preni mian ĉapelon ?

..."Ho ! Ne, estas en la domo.

..."Kio, vi eltiras vian fulargilon el la domo ?

..."Ne, ne. Ni nur premas ĝin ĉi tie. Sed ni ne zorgu pri tio. Ĉio kion ni deziras, estas ke vi ekzamenu la maŝinon kaj ke vi diru al ni tion kio estas rompita aŭ misfunkcianta.

...Ni supreniris kune, la kolonelo malfermante la paŝadon, kun lampo en la mano, la dika administranto kaj mi sekvante lin de proksime. Tiu malnova domo estis vera labirinto, kun koridoroj, mallarĝaj pasejoj, helicaĵoj ŝtuparoj, malaltaj pordetoj kies la sojloj estis eluzitaj de la antaŭaj generacioj. Estis nek tapiŝoj nek ia ajn meblaro ekster la teretaĝo, kaj la gipso falis de la muroj kiujn la malsekeco kovris per verdaj kaj malsanaj makuloj. Mi provis montri indiferentan mienon, sed mi ne sukcesis tute forgesi la averton de la virino, kvankam mi ne volis aŭskulti ilin, kaj mi ne perdis miajn du kunulojn el la okulo. Ferguson ŝajnis malgaja kaj silenta homo, sed per la malmultaj vortoj kiujn li diras, mi ekkomprenis ke li estis almenaŭ samlandano.

...La kolonelo Lisandro Starko fine haltis antaŭ malalta pordo kiun li malfermis. Ĝi eliris sur malgranda kvadrata ĉambro kie ni povintus apenaŭ stari ĉiujn tri. Ferguson restis ekstere, la kolonelo eniris min kun li.

..."Ni estas, li diris, en hidraŭlika premaŝino, kaj estus aparte malagrabla por ni, se iu funkciigus ĝin. La plafono de ĉi tiu malgranda ĉambro fakte estas la prempaŝto kiu venas frapi ĉi tiun metalan plankon per forto de pluraj tunoj. Estas ekstere malgrandaj flankaj kolumnoj kiuj enhavas akvon, ili ricevas la forton kaj komunikas ĝin obligitan, kiel vi devas scii tion. La maŝino ankoraŭ funkcias, sed ĝi ŝajnas ricevi ian reziston, kaj ĝi perdis iom de sia forton. Ĉu vi bonvolas ekzameni ĝin kaj diri al ni tion kio estus por fari ?

...Mi prenis la lampon el liaj manoj kaj komencis detaleman ekzamenon. Ĝi estis mekanismo giganta kaj kapabla disvolvi grandegan premon. Mi poste iris eksteren kaj mallevis la regstangojn. Mi tuj rekonis per la sono, ke estis malforta liko, tra kiu la akvo eskapis. Mi ankaŭ malkovris ke la kaŭĉuka garnaĵo de piŝtostango ŝrumpis kaj ne plu plenigis la spacon kiun ĝi devis ŝtopi. Tie certe estis

la kaŭzo de la fortoperdo, kaj mi sciigis ĝin al miaj kunuloj kiuj aŭskultis min kun la plej granda atento kaj metis al mi kelkajn teknikajn demandojn pri la maniero por plenumi la riparadon. Kiam mi bone klarigis ĉion al ili, mi revenis al la ĉambro de la piŝto por denove kontentigi mian scivolemon. Estis okulfrape ke la rakonto de fulargilo estis nura fabelo (estintus fakte sence uzi maŝinon kun potenco tiom misproportia al ĉi tiu celo). La vandoj de la ĉambro estis el ligno, sed mi rimarkis ke la planko, iu fera trogo, estis kovrita de metala plato. Mi kaŭriĝis kaj jam ungogratis ĝin por rekoni ĝian ecaron kiam mi aŭdis surdan germanan ekkron, kaj vidis la kadavrecan vizaĝon de la kolonelo klinita al min.

..."Kion vi faras ? li demandis.

...Mi estis furioza pro lasi min tiel stulte esti kaptita.

..."Mi admiris vian fulargilon, mi diris al li, ŝajnas al mi ke mi povintus doni al vi pli efikajn konsilojn se mi sciintus la veran destinton de via maŝino.

...Mi ne eldiris ĉi tiujn vortojn ke mi jam ekkonsciis pri mia malsaĝaĵo. La vizaĝo de mia interparolanto fariĝis kruelega kaj danĝera flamo brilis en liaj grizaj okuloj.

..."Ho ! Tre bone, li diris, vi estas scionta ĉion.

...Li retroiris unu paŝon, abrupte fermis la pordon kaj turnis la ŝlosilon. Mi ekĵetis min al la butono, sed neniu el miaj klopodoj eĉ sukcesis ŝanceli ĝin.

..."Hola ! Mi kriegis. Hola ! Kolonelo ! Malfermu al mi !

...Kaj tiam, subite, en la noktosilento, mi aŭdis bruon kiu *malfluidigis al mi la sangon en la vejnoj*⁽¹⁰⁾ ! Ĝi estis la knarado de la regstangoj, kaj la starto de la cilindro al kiu mi malkovris likon; la kolonelo ekfunkciigis maŝinon ! La lampo ankoraŭ estis sur la planko kie mi metis ĝin por ekzameni la trogon. Per ĝia lumo, mi vidis la malhelan

10 Franca esprimo signifanta afliktiĝi.

plafonon malrapide malsupreniri al mi, laŭ sinsekvaj skuadoj, sed - neniu povis scii tion pli bone ol mi - kun forto kiu devis en unu minuto redukti min al la stato de senforma pulpo. Mi ĵetis min kontraŭ la pordon, alvokante helpon, mi ŝiris al mi la fingrojn sur la seruro, mi plorpetis la kolonelon lasi min eliri; sed la senkompata klikado de la regstangoj sufokis mian voĉon. La plafono nun estis nur je unu futo aŭ du super mia kapo kaj levante la manon mi jam kapablis tuŝi ĝian malmolan kaj malglatan surfacon. Tiam ĉar la morto estis neevitebla, necesis preni pozicion kiu igis ĝin kiel eble malplej doloran. Se mi kuŝus ventraltere, la pezo unue trafus la spinon ! kaj mi ekstremis pro la ideo de la terura rompo kiu rezultus. Aliflanke, se mi kuŝus surdorse, ĉu mi kuraĝus rigardi malsupreniri al mi ĉi tiun mortigan ombron ? Jam mi ne plu povis teni min stare kiam mi havis ekvidon, kiu donis al mi iomete da espero.

...Mi diris ke la plafono kaj la planko estas el fero kaj la vandoj el ligno. Ĵetante lastan kaj rapidan rigardon ĉirkaŭ mi, mi vidis maldikan strion da lumo inter du tabuloj; kaj baldaŭ malgrandan tabulon kiu malfermiĝis. Unu sekundon de hezito, tempon por certiĝi ke ĝi ja estis pordo de savo kaj mi ĵetis min kiel frenezulo en tiun aperturon kaj falis duonsvenanta ĉe la alia flanko de la vando. La tabulo refermiĝis malantaŭ mi; kelkajn momentojn poste, la bruo kaj de la frakasata lampo kaj de la du amasoj da metalo kuniĝantaj pruvis al mi kiom mi ĵus eskapis el danĝero !

...Mi reakiris konscion per intensa premo sur la pojno; mi malfermis la okulojn : mi estis etendita sur la planko en mallarĝa koridoro kaj virino kiu tenis kandelon, estis kliniĝinta super mi, strebante trejni min per la mano kiu restis libera al ŝi. Mi rekonis en ŝi tiun saman bonfaran feinon kies konsilojn mi tiel freneze malakceptis.

..."Venu ! Venu ! ŝi kriis ekster si mem. Ili

antaŭmomente estos ĉi tie. Ili vidos ke vi ne estas tie kie ili lasis vin. Ho ! Ne perdu tiel utilan tempon, ekvenu !

...Ĉi-foje almenaŭ mi ne plus malestimis ŝian opinion. Mi pene restariĝis kaj kuris kun ŝi al la fino de la koridoro kie troviĝis helica ŝtuparo kiu kondukis nin al pli larĝa pasejo. Ĉe la moment kiam ni atingis ĝin, ni aŭdis rapidajn paŝojn kaj la kriojn de du homoj respondantaj unu la alian de iu etaĝo al alia. Mia gvidistino haltis senkonsila, poste abrupte malfermis pordon kondukantan en ĉambron, kies la fenestro spegulis la radiojn de la luno.

..."Tie estas via savo, ŝi diris. Estas alte, sed mi kredas, ke vi povos salti.

...Sammomente brileto ekaperis ĉe la fino de la koridoro, lumigante la longan kaj maldikan silueton de la kolonelo Lisandro Starke kiu, kun lanterno enmane, kuris svingante ian tranĉilegon de viandisto. Mi ekkuris al la fenestro, ĝin perforte malfermis kaj rigardis eksteren. Kiel ĉio estis kvietaj kaj paca en ĉi tiu ĝardeno lumigita de la luno ! Mi ne estis je pli ol tridek futojn alte : mi interkrurigis la fenestrojlon, sed ne volis salti antaŭ ol aŭdi tion kio okazos inter mia savantino kaj la aĉulo kiu persekutis min. Se li mistraktus ŝin, mi estis decidita maltimi ĉion kaj iri al ŝia helpo. Mi apenaŭ havis tempon ekpreni tiun decidon ke mia turmentisto jam estis ĉe la pordo, forpuŝante la virinon por perforte trapasi, dum tiu ĉi ĵetis al li siajn brakojn ĉirkaŭ lian korpon, kaj provis haltigi lin.

..."Fredĉjo, Fredĉjo, ŝi kriis angle, memoru vian promeson de la lasta fojo, neniam, neniam rekomenci. Li diros nenion, Ho ! Li diros nenion ! Mi estas certa pri tio.

..."Vi estas freneza, Eliza ! li diris, provante liberigi sin. Vi do volas perdi nin ĉiujn. Li vidis tro multe. Lasu min pasi !

...Li bruske forpuŝis ŝin, kaj pelante sin al fenestro, donis

al mi frapon per sia armilo. Mi elfalinte retenis min per etenditaj brakoj kaj pendis ekstere, alkroĉita al la fenestrosojlo. Mi sentis akran doloron, mi cedis kaj falis en la ĝardenon.

...Mi estis konsternata, sed ne vundata de mia falo, mi releviĝis kaj kuris per mia tuta forto tra la arbedotufoj, ĉar mi ja sentis ke mi ne ankoraŭ estis el danĝero. Sed subite, la kuraĝo ekmarkis al mi, mi rigardis mian manon kie mi sentis dolorajn lancinadojn; mi tiam ekrimarkis ke mia dikfingro estis fortranĉita kaj ke la sango abunde elfluis el la vundo. Mi provis bandaĝi min per mia naztuko, sed miaj oreloj komencis zumi kaj mi svenis meze de la rozujoj.

...Mi ne kapablus diri kiom da tempo mi restis senkonscia. Tio povis esti tre longa, ĉar la luno malaperis kaj la tago komencis eklumi kiam mi rekonsciigis. Miaj vestoj estis malsekaj pro roso, kaj mia maniko trempita de sango. La doloro de mia vundo rapidege memorigis al mi pri ĉiuj incidentoj de la nokto, kaj mi salte restariĝis je la penso ke mi ankoraŭ povus esti persekutata. Sed kia estis mia miro, ĉirkaŭrigardante min, ne plu vidi aŭ domon aŭ ĝardenon. Mi estis ĉe la angulo de heĝo, apud la ĉefvojo, kaj tutproksime troviĝis longa konstruaĵo kiun mi rekonis, proksimiĝante, kiel estanta la stacio mem kie mi eltrajniĝis la antaŭan nokton. Sen mia malbona vundo, ĉio kio okazis dum ĉi tiuj teruraj horoj povintus esti nur malbona sonĝo.

...Tute senatenta, mi eniris la stacidomon kaj informiĝis pri la horo de la trajnoj. Estis unu direktoanta al Legado post malpli ol unu horo. Mi rekonis la dungiton pro vidi lin ĉe la alveno. Mi demandis al li ĉu li aŭdis paroli pri la kolonelo Lisandro Starko ? Ĉi tiu nomo estis tute nekonata de li. Ĉu li rimarkis veturilon kiu venis atendi min la lastan nokton ? Ne, li rimarkis nenion. Mi tiam informiĝis pri policejo ? Estis unu je tri mejloj, oni respondis al mi.

...Sed estis tro malproksime por mi, pro la stato de malforteco en kiu mi troviĝis. Mi do devis atendi mian revenon al la urbo por depozicii. Estis iom pli ol la sesa kiam mi alvenis tien. Mia unua zorgo estis pansigi min, poste la kuracisto bonvolis alkonduki min ĉi tie. Mi konfidas al vi mian sorton kaj faros ekzakte tion kion vi diros al mi.

Ni restis dum kelka momento silentaj post ĉi tiu eksterordinara rakonto. Poste Ŝerloko Holmso eltiris el la biblioteko unu el la grandegaj registroj en kiuj li lokis siajn gazetajn eltranĉaĵojn.

- Jen anonco kiu interesos vin, li diris. Ĝi aperis en ĉiuj gazetoj antaŭ ĉirkaŭ unu jaro. Aŭskultu : "Malaperis la 9an, kurantan, Jeremio Hejlingo, dudeksesjaraĝa hidraŭlika inĝeniero. Foririnta el sia loĝejo je la deka vespere. Neniu novaĵoj de tiam. Estis vestita, ktp". Ha ! Ĉi tio reprezentas, mi imagas, la lastan fojon kiun la kolonelo bezonis riparojn al sia premaŝino.

- Granda Dio ! ekkriis mia paciento. Sed tio klarigas tion kion diris tiu virino !

- Sen iu ajn dubo. Certas ke la kolonelo estas senemocia kaj rezoluta viro kiun nenio haltigas. Li estas absolute decidita neniam lasi kontraŭi siajn planojn, kiel tiuj piratoj kiuj lasas neniun postvivi sur la kaptitaj ŝipoj. Nu ! Ĉiu el niaj momentoj estas grava; se do vi sentas al vi la forton, ni tuj iros al Metropola Polico kaj de tie al Ejfordo.

Ĉirkaŭ tri horojn poste ni ĉiuj estis en la trajno kiu, de Legado devis alkonduki nin al la malgranda vilaĝo Berkŝiro, kiu estis la okazejo de la koncerna dramo, ĉiuj, tio estas Ŝerloko Holmso, la mekanikisto, la inspektoro Larĝstrato de la Metropola Polico, iu senuniforma policano kaj mi mem. Larĝstrato estis etendinta armean mapon de la graflando sur siajn genuojn, kaj estis desegninta per cirkelo rondon havanta Ejfordoⁿ kiel centron.

- Jen, li diris. Ĉi tiu rondo havas dek mejlojn en la radiuso. La loko kiun ni serĉas, devas esti ie en ĝi. Ĉu vi fakte diris dek mejlojn, sinjoro ?
- Mi diris : almenaŭ unu horon de veturilo.
- Kaj vi pensas ke oni refarigis al vi ĉi tiun tutan vojiron dum vi estis senkonscia ?
- Tio ja necesas. Mi cetere havas malklaran memoron pri esti levita kaj transportita.
- Tio kion mi ne povas kompreni, mi diras, estas ke ili domaĝis vin kiam ili trovis vin sveninta en la ĝardeno. Eble la aĉulo lasis sin kortuŝita de tiu virino !
- Tio ne ŝajnas al mi pruvita. Mi neniam vidis pli senindulgan vizaĝon.
- Ho ! Ni baldaŭ klarigos ĉion ĉi, diras Larĝstrato. Nu vidu ! Jen mia rondo, kaj mi ja ŝatus scii kie troviĝas en ĉi tiu spaco la homoj kiujn ni serĉas.
- Mi kredas ke mi kapablos indiki al vi la lokon, diris trankvile Holmsso.
- Vere ! ekkriis la inspektoro, ĉu vi jam havas opinion pri ĉi tiu afero ? Ni tuj vidos kiu el ni estos en akordo kun vi. Mi diras ke ĝi estas suden, ĉar tien la lando estas malpli loĝata.
- Mi estas por la oriento, diris mia paciento.
- Mi opinias por la okcidento, diris la senuniforma viro. Estas multe da izolitaj loĝejoj ĉi-tiuflanke.
- Kaj mi, mi estas por la nordo, mi diris miavice; ĉar ĝi estas la flanko de la ebenaĵo kaj nia amiko asertis ke li supreniris neniun deklivon.
- Nu ! ekkriis la inspektoro ridante. Jen beleta diverseco de opinioj. Ni dividis la kvar ĉefpunktojn inter ni. Al kiu vi donas vian voĉon, sinjoro Holmsso ?
- Vi ĉiuj malpravas.
- Sed ni ĉiuj ne povas malpravati.

- Ho ! Jes, perfekte. Jen mia punkto al mi, kaj li metis sian fingron en la centron de la rondo. Estas tie kie ni trovos ilin.

- Sed la kurso de dek du mejloj ? diris Haterlejo.

- Ses por iri kaj ses por reveni. Nenio estas pli simpla. Vi diris ke la ĉevalo estis vigla. Kiel ĝi povintus esti tia, se ĝi jam faris dek du mejlojn laŭ malbonaj vojoj ?

- Certe, tio estas tre verŝajna ruzaĵo, rimarkigis penseme Larĝstrato. Kompreneble, ne povas esti dubo pri la naturo de ĉi tiu bando.

- Neniu, diris Holmsio. Ili estas grandskale falsaj monfaristoj kaj la premmaŝino utilas al ili por fabrikii la amalgamon kiu anstataŭas la arĝenton.

- Ni sciis ekde kelka tempo ke ekzistis tre lerta bando, kiu fabrikis falsan moneron. Ili milope stampis duonkronojn. Ni sekvis ilian spuron ĝis Legado, sed ne plu. Ĉar ili implikis la spurarojn laŭ maniero kiu montras ke tio estas malnovaj kutimoj. Nun, danke al ĉi tiu feliĉa koincido, mi kredas ke ni tenas ilin.

La inspektoro eraris. Ĉi tiuj krimuloj ne devis fali inter la manojn de justico. Alvenante al Ejfordo ni vidis grandegan kolumon de fumo kiu leviĝis super bosketo en la najbarejo, kiu sternaĝis super la pejzaĝo kiel longega strutplumo.

- Domo kiu brulas ? Larĝstrato demandis al la staciestro, ĉe la momento kiam la trajno reforiris.

- Jes, sinjoro.

- Kiam tio komenciĝis ?

- Mi aŭdis diri ĉi tiun nokton, sinjoro, sed tio plimalboniĝis, kaj nun ĉio flamas.

- Al kiu la domo apartenas ?

- Al doktoro Beŝero.

- Diru al mi, interrompis la mekanikisto, ĉu doktoro

Beŝero estas tre maldika germano kun longa pinta nazo ?

La staciestro ekridis : "Ne, sinjoro, doktoro Beŝero estas anglo, kaj ne estas en la tuta paroĥo pli grasa homo. Sed li havas kun li sinjoron, malsanulon, mi kredas, kiu estas fremdulo, kaj al kiu iom da bona bovaĵo de Berkŝiro ne farus malbonon".

Li ne finis paroli, ke ni estis paŝantaj en la direkto al la brulo. La vojo suriris malgrandan monteton, kaj ni videtis antaŭ ni grandan blankan domon elĵetan fajron tra ĉiu fenestro, kaj ĉiu fendo, dum tri pumpiloj taktike aranĝitaj en la ĝardeno kontraŭbatalis la brulegon, sed sen multa rezulto.

- Estas tio ! ekkriis Haterlejo, ĉe la apogeo de ekscitiĝo. Jen la sablita aleo kaj la rozuoj kie mi falis, kaj estas tiu fenestro sur la dua etaĝo de kie mi saltis.

- Nu ! diris Holmsio, almenaŭ jen vi venĝita. Ne estas dubinda ke estas via lampo frakasita de la premaŝino kiu ekbruligis la lignajn vandojn, kaj ke ili ne ekrimarkis tion en la diligenteco por la ĉasado kiun ili okazigis al vi. Bone rigardu en ĉi tiun homamason, ĉu viaj amikoj de la nokto ne troviĝas : sed mi timas ke ili jam estas almenaŭ centkelke da mejloj de ĉi tie.

La timoj de Holmsio devis realiĝi, ĉar de tiu tago neniu aŭdis paroli pri la beleta virino de la sinistra germano, aŭ de la malĝoja anglo. Kamparano frumatene renkontpasis tiun matenon ĉareton enhavantan plurajn homojn, kaj grandajn kestoj, rapide veturantan al Legado; sed tie, ĉiu spuro de la fuĝantoj malaperis kaj la sagaceco mem de Holmsio neniam sukcesis malkovri la plej etan indicon kiu metis lin sur ilian spuron.

La fajrestingistoj estis tre mirigitaj de la strangaj internaj aranĝoj de ĉi tiu domo, kaj ankoraŭ pli de la eltrovo sur la fenestro de la dua etaĝo de homa dikfingro freŝe

tranĉita. Ĉirkaŭ la vespero, fine, iliaj klopodoj estis kronata de sukceso kaj oni mastris la brulegon : sed la tegmento disfalis, kaj kelkaj feraj tuboj estis ĉio kio restis el tiu mekanismo kiu multe kostis al nia amiko. Oni trovis grandajn kvantojn da nikelo kaj stano, stokitajn en staplo apud la domo; neniun moneron, tio kio klarigas la ĉeeston de grandaj kestoj pri kiuj ni ĵus parolis.

Bone konservita postsigno venis malkaŝi al ni kiel la vundito estis transportata de la ĝardeno al la loko kie li reakiris la konscion. Li evidente estis portata de du personoj kies unu havis la piedon rimarkinde malgrandan, kaj la alia, male, el eksesa amplekso. Ŝajnas do probable ke la silenta Anglo, malpli aŭdaca aŭ malpli kruela ol lia kunulo, helpis la virinon por transporti la svenintan viron ekster danĝeron.

- Nu ! diris nia mekanikisto malgaje, relokante sin en la trajnon, estis por mi beleta afero en tio ! Mi perdis mian dikfingron kaj miajn kvindek gineojn ?

- Vi akiris sperton, diris Holmso ridante. Kaj nerekte, tio havas alian avantaĝon : ĉar ĉie kie vi rakontos ĉi tiun aventuron, vi faros al vi la reputacion de la plej interesa rakontisto en la mondo.

La Fraŭla Aristokrato.

La geedziĝo de lordo Sankta Simono kaj lia stranga elnodiĝo, de longe ĉesis esti objekto de interesiĝo en la aristokrata medio kiu formas la ĉirkaŭularon de la malfeliĉa edziĝinto. Novaj skandaloj ombrigis ĝin, kaj iliaj pli spicaj detaloj ŝanĝis la temon de la konversacioj el ĉi tiu jam kvarjara dramo. Sed la faktoj kiuj sin alligas al ĝi, neniam estis bone konataj de la publiko; plie, mia amiko Ŝerloko Holmso multe partoprenis en la solvo de la problemo, kaj publikigante ĉi tiujn memoraĵojn, mi kredus malplenumi mian taskon ne raportante ĉi tiun strangan epizodon.

Kelkajn semajnojn antaŭ mia geedziĝo, dum la tempo kiam mi loĝis kun Holmso en la strato Bakisto, mia amiko, reveninta de promeno, trovis leteron sur la tablo de la salono. Mi ne eliris dum la tago; la vetero iĝis pluva kaj venta; mi suferis pro la kuglo kies mi estis trafita de la **Ĝezailo** dum mia kampanjo en Afganio, kaj kiu ne povis esti eltirita. Do ripozinta sur seĝo, kun kruroj krucitaj, mi ĉirkaŭis min per amason da gazetoj. Kiam mi estis leginta kaj disĵetinta ĉiujn ĉirkaŭ mi, mi pigre restis etendita, sen pensi pri io ajn, tamen demandante al mi de kiu povis veni la leteron kies la blazonitan sigelon mi havis antaŭ la okuloj.

- Vi havas tie tre elegantan leteron, mi diris al Holmso kiam li revenis. Tio kontrastas kun viaj ĉi-matenaj leteroj kiuj, se mi ne eraras, estis skribitaj de fiŝkomercisto kaj de doganisto.

- Jes, mia korespondado certe havas la ĉarmon de la varieco, li respondis al mi ridetante, kaj la plej malfieraj sendaĵoj ofte estas la plej interesaj. Ĉi tiu tute ŝajnas al mi kvazaŭ el tiuj malbonvenaj kunvokoj por tedi vin, aŭ por

mensogi.

Li rompis la sigelon, kaj tralegis la leteron.

- Ho ! Sed jen kiu ja povus ne esti banala.

- Nenio ceremonia, do ?

- Ne, ne, ĝi estas tute profesia.

- Kaj tio devenas de membro de la aristokrataro ?

- De unu el la unuaj de Anglio.

- Kara amiko mia, mi gratulas vin.

- Mi certigas al vi, Watsono, kaj tio sen la plej malgranda ŝajnigo, ke la socia pozicio de kliento estas tute indiferenta al mi; mi ĉiam konsideras nur la plej aŭ la malplej da intereso de lia afero, kaj eblas ke ĉi tiu prezentas certan dozon de ĝi. Vi lastatempe legis regule la gazetojn, ĉu ne ?

- Prefere, mi melankolie diris, montrante per la fingro grandegan amason da gazetoj kiuj kuŝis en angulo, mi ne havas ion alian por fari.

- Tio estas tre feliĉa, ĉar eble vi povos informi min. Mi ĉiam legis nur la tribunalajn novaĵojn kaj la personajn korespondojn : ĉi tiuj ĉiam estas instruaj. Sed se vi estas bone informita pri la novaĵoj, vi devas koni la historion de lordo Sankta Simono kaj pri lia geedzeco ?

- Ho! Jes, mi sekvis tion per la plej granda intereso.

- Ĉio bone glatas. Ĉi tiu letero precize estas de lordo sankta Simono. Mi tuj legos ĝin al vi, kaj interŝanĝe vi serĉos por mi en tiuj gazetoj ĉion kio rilatas al ĉi tiu temo. Jen tio kion li diras :

"Mia kara sinjoro Ŝerloko Holmsó,

"Lordo Urbetaĉo asertas al mi ke mi povas tute fidi al via juĝkapableco kaj via diskreteco. Do mi decidis veni vidi vin, kaj konsulti vin pri la tiel dolora incidento kiu okazis dum mia geedziĝo. 5^o Lapodio, de la Metropola Polico, jam klopodas pri la afero, sed li certigas al mi ke li vidas nenian ĝenadon pri via

kunlaboro, ke li eĉ taksas ĝin tre utila. Mi pasos ĉe vi je la kvara posttagmeze, kaj se vi havis alian ajn devoligon je tiu horo, mi esperas ke vi bonvolos liberigi vin, ĉar mi venas paroli kun vi pri io el la plej alta graveco.

Sincere al vi.

Roberto Sankta Simono".

- Ĝi estas datita de Grovenoro-Kasteloj, ĝi estas skribita per anserplumo, kaj la nobla lordo malbonŝance makulis per inko la eksteran randon de la eta fingro de lia dekstra mano, rimarkigis Holmso, refaldante la leteron.

Li diras je la kvara. Estas la tria. Li konsekvence estos ĉi tie post unu horo.

Mi do havas precize la tempon, kun via helpo, por sciiĝi. Trarigardu ĉi tiujn gazetojn, kaj aranĝu por mi la artikolojn laŭ datordigo, dum mi iras vidi kiu estas nia kliento.

Li prenis ruĝan volumon en serio da jarlibroj, apud la kameno.

- Jen li, li diris sidiĝante kaj malfermante la libron sur siaj genuoj : Roberto [Valsingamo](#) de Vere Sankta Simono, dua filo de la duko de [Balmoral](#)... Hm ! Blazono : lazura, kun fronte tri maltaj krucoj kaj kun sablokolora trabo. Naskita en 1846. Li havas kvardek unu jarojn, tio kiu estas matura aĝo por edziĝi. Li estis subprotokolisto al la kolonioj en la lasta ministraro. La duko, lia patro, estis dum momento ministro pri eksteraj aferoj. Ili rektlinie devenas de [Plantaĝenetoj](#), kaj [Tudoroj](#) tra la edzinoj.

Ha ! Mi vidas nenion tre instruan en ĉio ĉi. Mi kredas ke mi turnos min al vi, Watsono, por ricevi pli seriozajn informojn.

- Estas tre facile, mi diris, ĉar la faktoj estas tute freŝdataj, kaj aparte impresis min. Mi ne parolis al vi pri tio ĉar vi jam havis kurantan enketon, kaj ke vi ne ŝatas en tiuj kazoj esti deturnata de via celo.

- Ho ! Vi volas paroli pri la malgranda problemo de la transloĝiga veturilo de la skvaro Grovenoro; ĝi estas tute klarigita nun, kaj la solvo cetere estis okulfrapa ekde la komenco. Nu, donu al mi resumon de viaj gazetaj artikoloj.

- Jen la unua mencio pri ĉi tiu afero; mi trovas ĝin en la kolumno de la *Matena Afiŝo* titolata "Personaĵo" kaj la artikolo datumas de kelkaj semajnoj : "Oni anoncas la gefianĉiĝon kaj la sekvontan geedziĝon de lordo Roberto Sankta Simono, dua filo de la duko de Balmoral, kun fraŭlino Hatia Dorano, ununura filino de Alojzio Dorano, Eskviro, de San-Francisko, Kalifornio, Usono". Unu punkto, estas ĉio.

- Preciza kaj konciza, Holmsø rimarkigis proksimiĝante al la fajro por revarmigi al si la krurojn.

- Mi kredis ke mi vidis pli detalan artikoleton en unu el la societaj folioj de la sama semajno. Ha ! Jen ĝi :

"Baldaŭ necesos apliki la protektismon al nia geedzeca merkato, ĉar la nunaj principoj de liberkomercismo ŝajnas danĝeraj por niaj naciaj produktoj. Unu post la alia, la famaj familioj de Britio edzoliĝas kun niaj belaj kuzinoj ĉe la alia flanko de Atlantiko.

"La listo de premioj gajnitaj de ĉi tiuj ĉarmaj invadantinoj ankoraŭ plilongigis la pasintan semajnon. Lordo Sankta Simono kiu sin montris ribelan dum dudek jaroj, oficiale ĵus anoncis sian gefianĉiĝon kun fraŭlino Hatia Dorano, la alloga filino de kalifornia milionulo. Fraŭlino Dorano, kies la gracia aspekto kaj la ĉarmaj trajtoj intense altiris la atenton dum la festoj de Uestoburgo Hotelo, estas ununura filino, kaj oni plejofte diras ke ŝia doto estos esprimita de pli ol ses ciferoj, kun esperitaĵoj en la mondo por la estonteco.

"Estas konata de ĉiuj ke la duko de Balmoral devis vendi siajn pentraĵojn, antaŭ kelkaj jaroj, kaj ĉar lordo Sankta Simono ne havas alian teron krom tiun

malmulte gravan de Birŝmoro, estas evidente ke la kalifornia heredantino ne estas la sola por trovi avantaĝojn en interkonsento kiu, facila kaj ofta afero nuntempe, transformos respublikanino al grava angla sinjorino".

- Nenio alia ? Demandis Holmso oscedante.

- Pardonu min, mi daŭrigas. Ankoraŭ en la *Matena Afiŝo* mi trovas artikolon dirantan ke la geedziĝo fariĝos en la plej strikta privateco, ke ĝi okazos en la hotelo Sankta Georgo, skvaro Hanovro, ke nur duondekduo da amikoj estos alvokitaj, kaj ke post la ceremonio ili iros al la domo de [Lankastero Pordego](#), kiun luprenis tute meblitan S^{ro} Alojzio Dorano. Du tagojn poste, tio estas lasta merkredo, oni rakontas ke la geedziĝo okazis, kaj ke la edziĝovojaĝo okazos ĉe lordo Urbetaĉo, proksime al [Petrokampo](#). Jen ĉio kio estis publikigita antaŭ la artikolo anoncanta la malaperon de la novedzino.

- Antaŭ kio ? Demandis Holmso, saltante sur sia seĝo.

- La malapero de la novedzino.

- Kiam ŝi malaperis ?

- Dum la tagmanĝo, post la ceremonio.

- Vere ! Sed tio estas multe pli interesa ol mi komence kredis tio; tio eĉ estas tre drama.

- Jes; tio ŝajnas al mi eksterordinara.

- Mi ofte vidis malaperojn antaŭ la ceremonio, kaj kelkfoje dum la mielmonato; sed mi ne konas ekzemplon de tiel rapida fuĝo. Donu al mi ĉiujn detalojn, mi petegas vin.

- Mi avertas vin ke ili estas tre nekompletaj.

- Eble ni sukcesos ripari tion.

- Jen artikolo de matena ĵurnalo en kiu mi trovis ilin ĉiujn kondensitajn. Ĝi estas titolata : Aparta incidento en grava geedzeco.

"La familio de lordo Roberto Sankta Simono estas

*ĵetata en konfuzego de la strangaj kaj doloraj
incidentoj kiuj akompanis ĝian geedziĝon. La
ceremonio okazis hieraŭ, kiel la ĵurnaloj anoncis tion.
Sed estas nur hodiaŭ ke eblis al ni kontroli la strangajn
onidirojn kiuj disvastiĝis en tiu okazo. Malgraŭ la
klopodoj de la familiaj amikoj por silentigi la aferon, ĝi
fariĝis publika kaj ne plu estas ia intereso por
sekretigi eventon kiu nutras ĉiujn konversaciojn.*

*"La ceremonio, tre simpla, okazis en la hotelo
Sankta Georgo, skvaro Hanovro; ĉeestis nur la patro
de la novedzino, S^{ro} Alojzio Dorano, la dukino de
Balmoral, lordo Urbetaĉo, lordo Eŭstakio kaj lordino
Klaro Sankta Simono (frato kaj fratino de la novedzo)
kaj lordino Alica Vitingtono. Ĉiuj poste iris ĉe Alojzio
Dorano en Lankastero Pordego, kie tagmanĝo estis
preparita. Ŝajnas ke ĉe iu momento virino, kies nomo
oni ne sciiĝis, provis perforte eniri en la domon,
kredigante ke ŝi havas rajtojn sur lordo Sankta
Simono. Ĉi tio kaŭzis iom da emocio. Estas nur post
peniga kaj longdaŭra kverelo ke ŝi povis esti forpelita
eksteren de la ĉefservisto kaj la lakeo.*

*"La novedzino, kiu feliĉe alvenis antaŭ ĉi tiu
malagrabla incidento, altabliĝis kun ĉiuj. Sed sentante
sin subite malsaneta, ŝi revenis post kelkaj momentoj
en sian ĉambron. Ŝian foreston pluantan, ŝia patro iris
serĉi ŝin, kaj tiam eksciis de la ĉambristino ke ŝi venis
nur por preni mantelon kaj ĉapelon kaj remalspreniri.
Unu el la lakeoj sciigis esti vidinta sinjorinon foriri el
la domo, vestita de longa mantelo, sed ne esti povinta
kredi dum momento ke ŝi estis lordino Sankta Simono.*

*"Tuj kiam li eksciis ĉi tiun malaperon, sinjoro Alojzio
Dorano, akompanata de sia bofilo, tuj kontaktis la
policon, kaj metis plendon.*

*"La enketo, kiu daŭras ĉi-momente, rapide klarigos,
ni esperas tion, ĉi tiun apartan aferon. Tamen hieraŭ
vespere, je la lasta horo, oni havis neniun indicon pri la*

rifuĝo de la sinjorino. Oni timas krimon kaj oni diras ke la polico arestis la virinon kiu volis perforte eniri en la domon. Oni supozas ke, aŭ pro ĵaluzo, aŭ pro kelke alia kialo, ĉi tiu virino plenumis taskon en la afero".

- Kaj ĉu estas ĉio ?

- Ankoraŭ iu artikoleto en alia matena gazeto, sed sugesta, tiu ĉi.

- Ĝi diras ?

- Ke tiu fraŭlino Flora Milaro, la priparolata virino, estas tenata malantaŭ seruro kaj riglilo. Ŝajnas ke ŝi estis dancistino ĉe la Alegro, kaj ke ŝi konis la novedzon ekde pluraj jaroj. Neniu aliaj detaloj. Jen vi nun informita pri ĉio kiu estis publikigita pri ĉi tiu geedziĝo.

- Tio estas tre interesa. Mi neniel volus maltrafi la okazon studi kaŭzon kiel ĉi tiun. Sed oni sonigas, Vatsono, kaj ĉar estas preskaŭ la kvara, mi ne dubas ke tio estas nia aristokrata kliento. Ne estu eksiĝonta; mi multege preferas havi atestanton, se nur por kontroli miajn proprajn memorojn.

"Lordo Roberto sankta Simono", anoncis la lakeo malfermante la pordon kaj lasante trairi ĝentlemanon kun agrabla kaj inteligenta vizaĝaspekto. Delikata paleco sterniĝis sur liaj trajtoj. Li havis longan nazon, firman buŝon, kvietan kaj sentiman okulon de homo kutimita komandi kaj esti obeita. Li havis lertecon en la movoj, sed lia dorso iom kurba kaj malgrava fleksiĝo de la genuo aspektigis lin pli aĝa ol li reale estis. Kiam li demetis sian ĉapelon kun tre suprenfalditaj randoj, ni vidis ke liaj haroj estis grizaj sur la tempioj kaj maloftaj sur la supro de la kapo. Lia vestomaniero estis el la plej eleganta, eĉ rafinita. Li surhavis altan kolumon, nigran redingoton kun blanka veŝto, flavajn gantojn, lakitajn botetojn kaj gamaŝojn el hela koloro. Li malrapide antaŭeniris en la ĉambron,

rigardante dekstren kaj maldekstren, kaj ludante per la dekstra mano kun la ŝnuro de sia nazumo ore ringita.

- Bonan tagon, lordo Sankta Simono, diris Holmso stariĝante por saluti. Bonvolu preni brakseĝon, kaj permesu al mi prezenti al vi mian amikon kaj kolegon, doktoro Watsono. Alproksimiĝu vin al la fajro, kaj elmetu al mi vian aferon.

- Iu afero el la plej dolora por mi, kiel vi povas imagi tion, sinjoro Holmso. Mi estis akre vundita. Ŝajnas al mi ke vi jam solvis plurajn delikatajn aferojn el tiu naturo, sed mi supozas ke la herooj ne estis mondumanoj.

- Mi devas konfesi al vi ke ĉi-foje, mi malaltigiĝas de unu grado.

- Kion vi diras ?

- Mia lasta kliento, pri simila kazo, estis suvereno.

- Ho ! Vere ! Mi ne suspektis tion. Kiu ?

- La reĝo de Skandinavio.

- Kio ! Ĉu li serĉis sian edzinon ?

- Vi komprenos, diris Holmso milde, ke mi alportas al la aferoj de miaj aliaj klientoj, la diskretecon al kiu mi min devontigas rilate al vi.

- Kompreneble ! Estas ĝuste ! Tre ĝuste ! Mi tute pardonpetas al vi. Pri tio kio koncernas min, mi estas preta provizi al vi ĉiujn informojn kiuj povus esti utilaj al vi.

- Dankon. Mi estas informita pri ĉio kio estis publikigita, nenio pli. Bonvolu diri al mi, ekzemple, se ĉi tiu artikolo kiu raportas la malaperon de la novedzino estas absolute ekzakta ?

Lordo Sankta Simono tralegis ĝin.

- Jes, ĉio ĉi estas vera.

- Sed tio ne sufiĉas al mi por fari al mi opinion. Mi pensas ke la plej facila rimedo estus pridemandi vin.

- Mi petas tion al vi.

- Kiam vi renkontis unuafoje fraŭlinon Hatiaⁿ Doranoⁿ ?
- En San-Francisko antaŭ unu jaro.
- Vi vojaĝis en Usono ?
- Jes.
- Ĉu vi tiam gefianĉiĝis ?
- Ne.
- Sed vi jam havis kun ŝi bonajn rilatojn de amikeco ?
- Mi trovis ŝin agrabla kaj amuza; ŝi certe ekkonsciis

tion.

- Lia patro estas tre riĉa ?
- Oni diras ke li estas la plej riĉa homo de la Pacifika marbordo.

- Kiel li riĉiĝis ?

- En la minejoj. Li estis sen groŝo en poŝo antaŭ kelkaj jaroj. Li trovis minvejon, faris bonajn investadojn, kaj riĉiĝis rapidege.

- Nun, kia estas via opinio pri la karaktero de la junulino... de via edzino ?

La ĝentlemano nervoze svingis sian nazumon kaj fikse rigardis la fajron.

- Komprenu, sinjoro Holmso, mia edzino estis dudekjaraĝa kiam ŝia patro fariĝis riĉulo. Ŝi kutimis kuri sola en barakaro de ministoj, vagi en la arbaroj kaj montoj, tiel ke ŝi memedukis antaŭ la naturo kaj ke oni neniam sin turnis por ŝi al instruistoj. Ŝi estas tiu kiun ni nomas en Anglio senzorgulino, kun forta konstitucio, sendependa kaj sendisciplina naturo, libera de ĉia tradicio. Ŝi estas impetega, vulkana, mi estis dironta, rapida en siaj decidoj kiujn ŝi plenumas sen zorgi pri la sekvoj. Sed mi ne donintus al ŝi la nomon kiun mi havas honoron porti (*jen li ektusis kaj mienis digna*), se mi ne kredus ŝin dotita de noblaj sentoj. Mi opinias ke ŝi kapablas plej heroajn sinoferojn kaj ke estus al ŝi neebla fari ion ajn malhonoran.

- Ĉu vi havas ŝian foton ?

- Mi kunportis ĉi tion.

Li malfermis medalionon, kaj montris al ni la portreton de rava virino. Ĝi ne estis foto, sed miniaturo sur eburo, kaj la artisto admire redonis la karbonigrajn harojn, la grandajn malhelajn okulojn, la ĉarmegan buŝon de la modelo. Holmso ekzamenis ĝin longe kaj atente. Poste li refermis la medalionon kaj redonis ĝin al lordo Sankta Simono.

- Tiam la junulino venis al Londono, kie vi ofte havis la okazon vidi ŝin ?

- Jes, ŝia patro alkondukis ŝin por la sezono. Mi renkontiĝis kun ŝi en la mondumo, ni gefianĉiĝis kaj fine mi edzinigis ŝin.

- Ŝi alportis al vi, mi kredas, konsiderindan doton ?

- Doto nur deca, kiel tiu kiun oni kutime alportas en mian familion.

- Kaj ĉi tiu doto, kompreneble, restas al vi, nun kiam la geedzeco estas fakto ?

- Mi devas konfesi al vi ke mi nenion tro scias kaj ke mi ne demandis tion.

- Ho ! Kompreneble. Ĉu vi vidis fraŭlinon Doranoⁿ, la antaŭtagon de la geedziĝo ?

- Jes.

- Ĉu ŝi estis gaja ?

- Pli ol neniam, kaj ŝi ne ĉesis plani pri nia hejma vivo.

- Vere. Tio estas interesoplena detalo. Kaj la mateno de la geedziĝo ?

- Ŝi estis kiel eble tiel gaja, almenaŭ ĝis post la ceremonio.

- Kaj vi tiam rimarkis ŝanĝiĝon ?

- Nu ! Por diri al vi la veron, ŝi tiam donis al mi antaŭguston de sia vigleco de karaktero. Sed la okazaĵo estas tro bagatela por paroli pri ĝi, ĝi ne povas havi ian ajn

gravecon.

- Tamen rakontu ĝin.

- Ho ! Ĝi estas infana. Irante al sakristio, ŝi lasis fali sian bukedon sur la unuan benkon. Okazis momenta halto en la procesio, sed la sinjoro kiu estis sur ĉi tiu benko levprenis ĝin por ŝi, kaj la floroj certe ne suferis pro ĉi tiu falo. Malgraŭ tio, ŝi bruske respondis al mi, kiam mi aludis la aferon, kaj en la kaleŝo, inter la preĝejo kaj la domo, ŝi ŝajnis al mi ridinde agitata. Agnosku ke la fakto estis tre sensignifa.

- Efektive. Vi parolas pri individuo kiu estis sur la benko. Ĉu do estis ĉeestantaro ?

- Ho, jes ! Ne eblas malebligi la publikon eniri kiam la preĝejo estas malfermita.

- Ĉu tiu sinjoro ne estis amiko de via edzino ?

- Ne, ne, ni nomas lin sinjoro, pro ĝentileco; li estis tre ordinara viro. Mi cetere apenaŭ rigardis lin. Sed ŝajnas al mi ke ni tre foriĝas de nia afero.

- Sinjorino Sankta Simono estis do en multe malpli feliĉa spiritostato revenante de la ceremonio ol irante tien. Kion ŝi faris enirante ĉe sia patro ?

- Mi vidis ŝin babili kun sia ĉambristino.

- Kiu estas ĉi tiu virino ?

- Ŝi nomiĝas Alico, ŝi estas usonanino, kaj ŝi venis el Kalifornio kun siaj mastroj.

- Ĉu ŝi estas fidinda persono ?

- Miaopinie, ŝi eliras el sia rolo kaj ŝia mastrino donas al ŝi tro multajn liberecojn. Sed jen ! En Ameriko, oni ne havas pri tio la saman manieron senti kiel ni.

- Kiom da tempo ŝi babilis kun ĉi tiu Alico ?

- Ho ! Kelkajn minutojn. Mi havis ion alian en la kapo kaj apenaŭ atentis pri tio.

- Ĉu vi ne aŭdis tion kion ili diris ?

- Fraŭlino Sankta Simono parolis pri forigi koncesiaĵon, kaj tio per slang-esprimo kies la ministoj uzas. Mi havas nenian ideon pri tio kion ŝi volis diri.

- La usona ĵargono foje estas tre esprimplena, kaj kion faris via edzino kiam ŝi finis babili kun sia ĉambristino ?

- Ŝi eniris en la manĝoĉambron.

- Ĉu ĉe via brako ?

- Ne, sola. Ŝi estas tre libera en la ordinaraj cirkonstancoj de la vivo. Post dek minutoj, proksimume, ŝi abrupte stariĝis, murmuris kelkajn pardonpetojn kaj eliris. Ŝi ne plu revenis ekde tiam.

- Sed ĉi tiu Alico rakontas, mi kredas, ke via edzino eniris en sian ĉambron, kaŝis sian edziniĝan robon sub longa surtuto, surmetis ĉapelon kaj eliris ?

- Estas ja tio. Ŝi poste vidis ŝin promenante en Hajdparko kun Flora Milaro, virino kiu nun estas arestita, kaj kiu matene iom bruadis ĉe la pordo de S^{ino} Dorano.

- Ho jes ! Necesus al mi kelkajn detalojn pri tiu sinjorino kaj pri viaj rilatoj kun ŝi.

Lordo Sankta Simono ŝultrolevis kaj kuntiris la brovon.

- Ni havis amikajn rilatojn, mi eĉ dirus tre amikajn dum kelkaj jaroj. Ŝi estis ĉe la Alegro. Mi plivole traktis ŝin malavare, kaj ŝi ne havas kialon por plendi pri mi; sed vi scias kiel estas virinoj, sinjoro Holms, Flora, kvankam ĉarma kaj tre ligita al mi, facile ekkoleras. Ŝi skribis al mi insultajn leterojn kiam ŝi eksciis mian gefianĉiĝon; kaj por diri la veron, se mi volis ke la ceremonio estu tiel simpla, estis ĉar mi timis skandalon en la preĝejo. Ŝi alvenis ĉe S^{ro} Dorano ĉe la momento kiam ni ĵus revenis, kaj provis trude trapasi la enirejon, uzante insultajn esprimojn al mia edzino kaj tre minacantaj al mi; sed mi antaŭvidis ĉi tiun eblecon kaj donis al la servistoj ordonon ĵeti ŝin eksteren. Ŝi kvietiĝis kiam ŝi vidis, ke ĉi tiu bruado estis senutila.

- Ĉu via edzino aŭdis ĉi tiun scenon ?
- Ne, dank' al la ĉielo.
- Kaj oni poste vidis ŝin promeni kun ĉi tiu sama virino ?
- Jes. Estas tio kion S^{ro} Lapodio de la Metropola Polico rigardas kiel tre serioza. Oni pensas ke Flora allogis mian edzinon eksteren por faligi ŝin en kelkan kaptilon.
- Estas kredeble.
- Ĉu vi havas ĉi tiun opinion ?
- Mi ne diris probable, sed kredeble; ĉu vi ne akceptas ĉi tiun hipotezon ?
- Ne, mi ne kredas Floraⁿ kapablan malutili muŝon.
- Tamen, ĵaluzo terure transformas la karakterojn. Kaj... kio estas via opinio pri tio kio okazis ?
- Efektive, mi venis ĉi tie por recevi tion kaj ne por prezenti la mian. Mi rakontis ĉion al vi. Sed ĉar vi volas scii tion kion mi pensas, mi diros al vi ke la emocioj de la ceremonio, la ideo pri la socia rango en kiu ŝi estis subite transportita, povis kaŭzi kelkan nervan perturbon en la cerbo de mia edzino.
- Tio estas ke ŝi freneziĝus ?
- Reale, kiam mi pensas ke ŝi turnis la dorson - mi ne diros al mi, sed al ĉio kion multaj aliaj enviis sen sukceso - mi apenaŭ kapablas trovi alian klarigon.
- Jes, certe ja ĝi estas hipotezo, diris Holmsa ridetante. Kaj nun, lordo sankta Simono, mi kreas ke mi estas bone informita. Ha ! Ĉu vi volas diri al mi ankoraŭ unu aferon ? Ĉu vi sidis ĉe la tablo tiel ke vi vidis la fenestron ?
- Ni estis antaŭe kaj ni povis vidi la alian flankon de la strato kaj la parkon.
- Tre bone. Nu, mi opinias esti senutile plue retenigi vin. Mi skribos al vi.
- Se vi estas sufiĉe feliĉa por solvi ĉi tiun problemon, diris nia kliento stariĝante.

- Mi solvis ĝin.
- He ! Kio ?
- Mi diras ke mi solvis ĝin.
- Tiam kie estas mia edzino ?
- Tio estas detalo kiun mi rapide konos.

Lordo Sankta Simono skuis la kapon. "Mi timas ke necesos homoj pli kapablaj ol vi aŭ mi por solvi tion", li rimarkigis, kaj salutante per digna kaj iom eksmoda maniero, li eliris.

- Lordo Sankta Simono faras al mi grandan honoron metante sian inteligentecon ĉe la sama nivelo kiel la mia, diris Ŝerloko Holmsø ridante. Mi kredas ke post ĉi tiu pridemandado mi estas regalonta min per sodakva viskio kaj fumonta cigaron.

Mia konvinko estis jam farita antaŭ ol nia kliento eniris.

- Nu, Holmsø ?

- Mi rimarkis plurajn analogajn kazojn, kun tiu diferenco tamen ke neniam la elnodiĝo estis tiel rapida kiel ĉi tiu. Mia enketo nur ŝanĝigis mian konjekton al certeco. La atestado per indukto foje estas tre konvinka, ĉefe kiam oni trovas truton en lakto, por citi la ekzemplon de [Torou](#).

- Sed mi aŭdis tiom multe kiom vi kaj mi ne estas pli progresinta.

- Ĉar vi ne konas la analogajn faktojn kiuj servis al mi kiel bazo. Simila afero okazis en [Aberdino](#) antaŭ kelkaj jaroj; iu alia el sama speco en Munkeno, dum la jaro kiu sekvis la francan-prusan militon. Tio estas unu el tiuj kazoj... sed jen Lapodio ! Saluton ! Prenu glason sur la telermeblo kaj cigaron en ĉi tiu skatolo.

La oficiala detektivo estis vestita de ŝipista jako kaj la kravato kiu kompletigis lian kostumon, elfaris doni al li tute marista aspekto, li mane portis sakon el nigra tolo. Li seke salutis, poste sidiĝis kaj ekbruligis la cigaron kiu estis

proponita al li.

- Kio estas ? demandis Holmso signante per la angulo de la okulo. Vi ne mienas kontenta.

- Kaj mi ne estas tia. Mi devas okupiĝi pri tiu infera afero de la geedziĝo de lordo Sankta Simono, kiu havas nek voston nek kapon.

- Vere, vi surprizas min.

- Ĉu oni iam vidis pli implikan aferon ? Neniu spuraro sukcesas. Mi laboris pri tio dum la tuta tago.

- Kaj vi estas malseka, diris Holmso metante la manon sur la manikon de lia jak.

- Jes, mi dragis la [Serpentenon](#).

- Por kion fari, bona Dio ?

- Por serĉi la korpon de lordino Sankta Simono.

Ŝerloko Holmso, falita en sian seĝon, eksplodis per rido.

- Ĉu vi ankaŭ dragis la basenon de la [skvaro Trafalgaro](#) ?
li demandis.

- Kial ? Kion vi volas diri ?

- Ĉar vi havus tute tiom da ŝanco trovi la korpon de ĉi tiu virino en iu loko kiom en la alia.

Lapodio ekĵetis al li koleran rigardon.

- Mi supozas ke vi do scias ĉion ! li diris rikanante.

- Vere, mi ĵus ekaŭdis la rakonton de la okazaĵo, sed mia konvinko estas farita.

- Ah ! Vere. Ĉu vi pensas ke la Serpentino tute ne rilatas al ĝi ?

- Tio ŝajnas al mi tre probabla.

- Tiam, ĉu vi bonvolus klarigi al mi kiel estas ke ni trovis ĉi tion en ĝi ?

Li malfermis sian sakon kaj elprenis geedziĝan kostumon el silko, paron da ŝuoj el blanka sateno, kronon kaj velon, ĉio ĉi gutanta per akvo. Jen, li diris, surmetante sur la amason geedziĝan ringon. Jen io por amuzi vin, sinjoro Holmso.

- Ah ! Vere, li respondis ĝetante nubojn da fumo al la plafono. Ĉu vi trovis ĉi tiujn objektojn dragante la Serpenteŝn ?

- Ne. Gardisto trovis ilin flosantaj apud la rando. Oni rekonis ilin kiel estantaj la vestaĵoj de lordino Sankta Simono, kaj mi pensas ke, se la vestaĵoj estis tie trovitaj, la korpo ne devas esti for.

- Se via rezonado estas ĝusta, la korpo de ĉiu homo devas troviĝi tie kie estas sia vestaĵaro. Kaj diru al mi, al kiu konkludo vi pensas veni ?

- Al la pruvo ke Flora Milaro implikiĝas en la malapero de la sinjorino.

- Mi timas ke tio estu malfacila.

- Ah ! Vi kredas ? ekkriis Lapodio kun iom da inciteco. Mi ja timas, Holms, ke vi ne havu praktikan spiriton pro via tuta logiko kaj viaj deduktoj. Vi ĝus faris du gravajn erarojn en malpli da tempo ol estas necesa por diri tion. Ĉi tiu sola vestaĵo estas akuzi kontraŭ Flora Milaro.

- Kaj kiel ?

- En la vestaĵo, estas poŝo. En la poŝo, notlibro. En la notlibro, letero. Kaj jen ĉi tiu letero.

Li etendis ĝin per la mano sur la tablon.

- Aŭskultu ĉi tion : "Kiam vi vidos min, ĉio estos preta : tuj venu. F. H. M". Mia teorio, al mi, ĉiam estis ke lordino Sankta Simono estis altirita eksteren fare de Flora Milaro, kaj ke ĉi tiu, kun certe komplico, respondekas pri ŝia malapero. Vi havas tie, subskribita per ŝiaj inicialoj, la leteron kiu sendube estis diskrete ŝovita sub la pordo de lordino Sankta Simono kaj faligis ŝin inter la manojn de tiu bando.

- Tre bone, Lapodio, diris Holms ridante. Vi reale estas tre forta. Lasu min vidi.

Li senzorgeme prenis la paperon, sed absorbiĝis en ĝia

legado kaj subite eligis kontentiĝan krion. "Ho ! Ho ! Estas grave, ĉi tio", li diris.

- Ah ! Vi trovas ?

- Absolute. Mi varme gratulas vin.

Lapodio triumfe stariĝis, kaj rigardante la paperon.

- Sed, li kriis, vi legas ĝin ĉe la malantaŭa flanko.

- Male, tio ĉi estas la antaŭa flanko.

- La antaŭa flanko ! Vi estas freneza ! Estas ĉi-flanke ke troviĝas la linioj skribitaj per krajono.

- Kaj mi vidas ĉi tie fragmenton de hotela fakturo kiu ege interesigas min.

- Mi legis ĝin kiel vi, diris Lapodio. Nenio el tio estas tre kurioza : "La 4^a de oktobro, ĉambro 8 ŝilingoj, tagmanĝo 2 ŝilingoj 6 pencoj, koktelo 1 ŝilingo, 1 glaso da ŝereo 8 pencoj". Tio estas signifoplena.

- Eble laŭ via opinio; tio tamen ne estas malpli grava. Koncerne la skribitan leteron, ĝi ankaŭ havas sian valoron, aŭ almenaŭ la inicialoj, tial mi denove gratulas vin.

- Mi jam perdis sufiĉe da tempo, diris Lapodio stariĝante. Mi havas pli da konfido en serioza laboro ol en la teorioj kiujn oni forĝas al si apud la kameno. Ĝis baldaŭ, sinjoro Holmso; ni vidos kiu la unua sukcesos malkovri la veron.

Li kolektis la vestaĵojn, remetis ilin en la sakon, kaj ekiris al la pordo.

- Aŭskultu, Lapodio : nur unu vorton; mi tuj donos al vi la veran solvon. Lordino Sankta Simono estas mito. Estas neniu lordino Sankta Simono kaj neniam ekzistis unu.

Lapodio rigardis lin kompateme. Poste turnante al mi, li trifoje frapis al si la frunton, malrapide skuis la kapon kaj foriris.

Li apenaŭ fermis la pordon kiam Holmso leviĝis kaj surmetis sian superveston.

Estas io vera en tiu kiun li ĵus diris; necesas ke mi

dediĉas min al enketo; tial, Watsono, mi tuj lasos vin kun viaj gazetoj.

Estis plu ol la kvina kiam Ŝerloko Holmsø forlasis min, sed mi ne havis tempon por enui, ĉar post malpli ol unu horo alvenis la komizo de pladvendisto kun granda plata skatolo. Li elpakis ĝin helpe de knabo, kiun li alkondukis kun li, kaj mi mirege vidis aranĝiĝi sur la modesta tablo el mahagono de nia meblita apartamento, etan malvarman vespermanĝon el la plej epikura. Estis kvar malvarmaj skolopaĵoj, fazano, pasteĉo de grashepataĵo, akompanitaj de polvaj boteloj. Ilia laboro finita, miaj du vizitantoj malaperis, kiel genioj en la *Mil kaj Unu Noktoj*, sen doni alian klarigon ol ĉi tiu : la fakturo estis pagita, kaj ili estis senditaj al ĉi tiu adreso.

Iom antaŭ la naŭa, Holmsø rapidege rehejmeniris. Li aspektis serioza, sed pro la brilo de lia rigardo mi ekkomprenis ke li ne eraris en siaj konkludoj.

- Ah ! Oni preparis la vespermanĝon, li diris, frotante al si la manojn.

- Ĉu vi atendas homojn ? Oni metis kvin manĝilarojn ?

- Jes, mi imagas ke ni estas vidontaj alveni kelkajn gastojn. Mi miras ke lordo Sankta Simono ne jam ĉeestas ! Ha ! Mi kredas ke mi aŭdas lin supreniri.

Efektive estis nia matena vizitanto kiu eniris; li ŝajnis maltrankvila kaj furioze volvis inter siaj fingroj la ŝnuron de sia nazumo; liaj subtilaj kaj delikataj trajtoj havis esprimon de konfuzo kaj laceco.

- Ĉu vi ricevis mian mesaĝon ? demandis Holmsø.

- Jes, kaj mi konfesas ke la enhavo profunde surprizis min. Ĉu vi tute certas tion kion vi diras ?

- Tiel certa kiel eble.

Lordo Sankta Simono lasis sin fali sur seĝon, kaj pasigis al si la manon sur la frunton.

- Kion diros la duko, li murmuris, kiam li ekaŭdos ke

membro de sia familio suferis tian humiligon?

- Ĝi estas simpla akcidento. Mi ne vidas humiligon en tio.

- Ah ! Vi konsideras la aferon laŭ tute alia vidpunkto.

- Neniu devas esti mallaŭdi en tio. Mi ne vidas ke la sinjorino povu alie agi, kvankam oni povu bedaŭri la krudan manieron kiun ŝi elektis. Ne havante patrinon, ŝi troviĝis en ĉi tiu krizo sen subteno kaj sen konsilo.

- Mi ripetas al vi ke tio estas insulto, sinjoro, publika insulto, diris lordo Sankta Simono tamburante per siaj fingroj sur la tablo.

- Estu do indulga por ĉi tiu kompatinda knabino, kiu troviĝis alpremita al tute eksterordinara situacio.

- Mi havas nenian kompaton, mi estas furioza pro esti lasante min tiel indigne trompi.

- Mi kredas ke mi aŭdis sonori, diris Holms. Jes, oni supreniras la ŝtuparon. Kaj ĉar mi ne sukcesas trankviligi vin, mi venigis advokaton kiu eble havos pli da sukceso ol mi.

Li malfermis la pordon kaj enirigis viron kaj virinon.

- Lordo Sankta Simono, permesu al mi prezenti vin al S^{ro} kaj S^{ino} Francisko Hej Multono. Vi jam, mi kredas, renkontis ĉi-lastan.

Ekvidante la novajn gevenintojn, nia kliento abrupte leviĝis, kaj tre rigide, kun la okuloj fiksita al la planko, la mano enŝovita en la redingoton, li prenis la teniĝon de homo kies digno estis trafita. S^{ino} Multono vigle antaŭeniris, kaj etendis al li manon kiun li rifuzis vidi. Mi certas ke lia rankoro rapidege malaperintus se li konsentintus rigardi la ĉarman vizaĝon kiu sin turnis al li.

- Vi koleras, Roberto, ŝi diris, kaj vi havas por tio bonajn kialojn.

- Neniajn pardonpetojn, mi petegas vin, amare diris lordo Sankta Simono.

- Ho ! Jes; Mi scias ke mi tre malbone traktis vin kaj ke

mi devintus ĉion klarigi al vi antaŭ ol foriri; sed mi estis kiel freneza, kaj de la momento kiam mi revidis Francjoⁿ ĉi tie, mi ne plu sciis aŭ tion kion mi diris aŭ tion kion mi faris. Tio mirigas min ne esti svene falanta antaŭ la altaro.

- Ĉu eble, S^{ro} Multono, vi pli ŝatus ke mia amiko kaj mi, ni eksigu por permesi al vi libere kompreniĝi ?

- Se mi havas rajton de voĉo, rimarkigis la stranga ulo kiu havis nomon S^{ro} Multono, ŝajnas al mi ke jam estis tro da mistero en ĉio ĉi. Miaflanke, mi ŝatus ke Eŭropo kaj la tuta Ameriko sciiĝu la veron.

La viro kiu tiamaniere parolis estis malgranda, seka, bruligita de la suno, kun inteligenta vizaĝo kaj bruskaĵaj manieroj.

- Nu ! Mi tuj diros ĉion al vi, reparolis lia edzino. Ni konatiĝis, Francjo kaj mi, en 81, en la barakaro de Mak Kejro, apud la Rokmontaro, kie paĉjo laboris en koncesio. Ni gefianĉiĝis, sed jen tio ke iun tagon, paĉjo trafas riĉan minvejon, kaj senskrupule riĉiĝas, dum ĉi tiu kompatinda Francjo, li, trovis nenion en sia koncesio.

...Ju pli paĉjo riĉiĝas, des pli Francjo malriĉiĝas, tiel bone ke finfine paĉjo ne plu volis aŭdi paroli pri geedziĝo kaj forkondukis min al Frisco. Sed Francjo ne volis forlasi min, tiam li sekvis min kaj ni daŭrigis renkontiĝi sen tio ke paĉjo sciu tion. Tio frenezigus lin, kaj ni kaŝis nin de li. Poste Francjo diris al mi ke li baldaŭ laboros por ankaŭ riĉiĝi, kaj ke li neniam venos serĉi min ĝis kiam li estos tiel riĉa kiel paĉjo. Mi promesis al li atendi lin senfine, kaj ne edziniĝi dum li vivas.

...- Kial ne peti al pastoro tuj geedzigi nin ?, li diris; mi postulos nenion de vi antaŭ mia reveno, sed almenaŭ tiel mi estos pli kvieta.

...Post esti bone pripensanta, ni decidis nin prezenti antaŭ la pastra moŝto kiun Francjo antaŭsciigis, kaj ni geedziĝis

senfanfare. Poste Francjo foriris por fariĝi riĉa kaj mi restis kun paĉjo.

...La unua letero de Francjo venis de Montano; poste li iris prospektori en Arizono, kaj fine skribis al mi el Nov-Meksiko. Post tio, mi legis en la gazetoj la tragikan rakonton de barakaro de ministoj atakita de la indianoj Apaĉoj, kaj la nomo de mia Francjo troviĝis inter la mortintoj. Mi sekve svenis, kaj estis tre malsana dum pluraj monatoj. Paĉjo kredis min nesavebla kaj li konsultis preskaŭ ĉiujn kuracistojn de Frisco. Ne unu vorto kiel novaĵo dum unu jaro kaj pli, tiel bone ke mi ne plu dubis pri la morto de Francjo. Tiam lordo Sankta Simono venis al Frisco, poste ni iris al Londono, kaj mia geedziĝo okazis; paĉjo estis tre kontenta, sed mi sentis ke neniu viro sur la tero povus iam preni en mia koro la lokon kiun estis okupinta mia kompatinda Francjo.

...Tamen, se mi edziniĝus kun lordo Sankta Simono, mi plenumintus mian devon rilate al li. Oni ne estras sian koron, sed oni estras sian volon. Mi iris al la altaro kun la intenco esti reale honesta kaj sindonema edzino tiom kiom mi sentas min kapabla por tio. Vi do povas imagi tion kion mi sentis kiam, preterpasante antaŭ la unua benko, mi vidis Francjoⁿ kiu fikse rigardis min. Mi unue kredis ke ĝi estas lia fantomo; sed denove rigardante mi vidis ke li ankoraŭ ĉeestis, kun scivola okulo kiu ŝajnis demandi al mi ĉu mi estis kontenta aŭ ne vidi lin. Mi mirigas min ne esti falanta. Ĉio rondiris ĉirkaŭ mi kaj la paroloj de la pastro estis kiel zumado de abeloj. Mi ne sciis kion fari. Ĉu ĉesigi la ceremonion kaj kaŭzi skandalon en la preĝejo? Mi rigardis Francjoⁿ, kaj kvazaŭ li komprenus mian penson, li metis sian fingron sur siajn lipojn por diri al mi nenion fari. Poste mi vidis lin rapide skribi sur papero, kaj mi komprenis ke li skribis al mi leteron. Ĉe la eliro, preterpasante apud li, mi

lasi fali mian bukedon ĉe la loko kie li troviĝis kaj li enŝovis la paperon en mian manon redonante ĝin al mi. Estis nur kelkaj linioj por diri al mi iri rekuniĝi kun li kiam li kontaktos min. Kompreneble mi ne havis la plej etan dubon ke nun mia unua devo estis iri al li, kaj mi decidis fari ĉion kion li diris al mi.

...Reveninte hejme, mi konfidis min al mia ĉambristino kiu konis lin en Kalifornio kaj ĉiam estis favora al li. Mi ordonis al ŝi nenion diri, sed paki kelkajn el miaj vestaĵoj kaj prepari mian surtuton. Mi scias ke mi devintus paroli kun lordo Sankta Simono, sed estis malfacile antaŭ lia patrino kaj ĉiuj tiuj mondumaj homoj. Mi decidiĝis unue fuĝi, kaj poste klarigi min. Mi ne sidis ĉetabele de dek minutoj ke, tra la fenestro, mi vidis Francjoⁿ, trans la strato. Li signis al mi kaj eniris en la parkon. Mi eltabliĝis, surmetis ĉapelon kaj mantelon, kaj mi sekvis lin. Mi estis tuj alproksimiĝita de virino kiu rakontis al mi historion pri lordo Sankta Simono. Se mi bone komprenis ĉi tiun rakonton, lordo Sankta Simono havintus ankaŭ li misteran aventureton antaŭ sia edziĝo. Sed mi rapide sukcesis liberigi min de ĉi tiu virino kaj atingi Francjoⁿ. Ni uzis fiakron, ni iris al la apartamento kiun li rezervis sur skvaro Gordono, kaj tie estis mia vera geedziĝo post tiom da atendaj jaroj ! Francjo estis kaptita ĉe la Apaĉoj, eskapis, venis al Frisco, eksciis ke mi kredis lin morta kaj ke mi foriris al Anglio, li sekvis min tien kaj retrovis min la tagon mem de mia dua geedziĝo.

- Mi legis la anoncon de la ceremonio en gazeto, interrompis la usonano : oni ja donis la nomon kaj la preĝejon, sed ne la adreson de la edziniĝonto.

- Tiam ni interparolis pri la prenenda decido kaj Francjo volis ĉion rakonti sincere, sed mi tiom hontis ke mi volintus malaperi kaj ne plu iam vidi iun ajn el la homoj ligitaj al ĉi tiu afero. Estas apenaŭ se mi konsentis sendi leteron al

paĉjo, por pruvi al li ke mi vivis. Terurigis min pensi ke ĉiuj tiuj lordoj kaj lordinoj estis ĉe la tablo atendante mian revenon. Tiam Francjo prenis miajn geedziniĝajn vestojn, faris pakaĵon kun ili kaj ĵetis ilin en iun lokon kie li pensis ke oni neniam malkovros ilin. Ni intencis morgaŭ foriri al Parizo, kiam ĉi tiu bona S^{ro} Holmsø venis viziti nin, sen tio ke mi kapablu kompreni kiel li sukcesis trovi nin : li tute klare pruvis al ni ke mi malpravis, kaj ke Francjo pravis, kaj ke ni estus tre mallaŭdindaj daŭrigi sin kaŝi. Tiam li proponis al ni doni al ni okazon babili kun lordo Sankta Simono tute sole, kaj jen kiel ni estas ĉi tie. Nun, Roberto, vi scias ĉion, mi tre bedaŭras esti afliktinta vin kaj mi esperas ke vi ne riproĉos min.

Lordo Sankta Simono nenion ŝanĝis pri sia rigida teniĝo; li aŭskultis ĉi tiun longan rakonton, kun la brovoj kuntirataj kaj la lipoj streĉaj.

- Pardonu min, li diris, sed mi ne kutimas diskuti miajn intimajn aferojn laŭ maniero tiel publika.

- Do, vi ne volas pardoni min ? Nek premi al mi la manon antaŭ ol mi foriru ?

- Ho ! Se tio povas plezurigi al vi. Li etendis la manon kaj senemocie skuis tiun kiun ŝi etendis al li.

- Mi esperis, sugestis Holmsø, ke vi akceptu ĉi tiun repaciĝan vespermanĝon.

- Mi kredas ke vi tro multe petas de mi, respondis la lordo. Mi povas trude submetiĝi al eventoj, sed vi ne povas esperi ke mi gaje akceptu ilin. Mi estas do, kun via permeso, dezironta al vi bonan nokton.

Li envolvis nin ĉiujn en iu sama saluto kaj eliris serioze.

- Mi pensas ke vi almenaŭ faros al mi la honoron resti kun ni, diris Ŝerloko Holmsø al la juna paro. Mi ĉiam havas grandan plezuron renkonti usonanon, sinjoro Multono, ĉar mi estas inter tiuj kiuj kredas ke la frenezeco de monarko kaj

la mallerteco de ministro en la antikva tempo ne malhelpos niajn infanojn iam esti nacianoj de la sama grandega imperio sub la kvaronigita flago de **Unuiĝo-Flago**, kun la steloj kaj la strioj.

- Ĉi tiu afero estis tre interesa, diris al mi Holmso, kiam niaj gastoj eksteriĝis, ĉar ĝi montras kiel simpla povas esti afero kiu unuavide ŝajnas tiel malsimpla. Tio ŝajnis neklarigebla, kaj tamen nenio estas pli natura ol la serio de okazaĵoj raportitaj de ĉi tiu juna virino, dum la rezulto, al kiu alvenis S^{ro} Lapodio, de Metropola Polico, estis tute sensenca.

- Vi do ne eraris.

- De la komenco, estis du faktoj absolute evidentaj por mi : unue, ke la junulino propravole konsentis al la geedziĝa ceremonio, due, ke ŝi havis bedaŭron pri tio kelkajn minutojn antaŭ ol reveni. Devis do okazi dum la mateno, cirkonstanco kiu igis ŝin ŝanĝi sian opinion. Kiu estis ĉi tiu cirkonstanco ? La junulino ne povis esti parolinta ekstere kun iu ajn, ĉar ŝi estis kun sia fianĉo. Ĉu do ŝi vidis iun ? Se jes, devis esti iu venanta de Usono; ŝi pasigis malmulte da tempo en ĉi tiu lando kaj certe konis nenium havantan sur ŝi sufiĉe da influo por aliigi ĉiujn siajn planojn. Jen ni jam, per simpla eliminado, alvenitaj al la ideo ke ŝi eble vidis usonanon. Kiu povis esti ĉi tiu usonano, kaj kial li havis tian influon sur ŝi ? Amanto, eble edzo ? Mi sciis ke la junulino estis edukita en primitiva kaj stranga medio kaj jen kie mi estis kiam lordo Sankta Simono alvenis. Kiam li parolis al ni pri la viro sidinta sur la benko, pri la ekaperata ŝanĝo en la stato de la novedzino, pri la falo de la bukedo, artifiko tiel banale uzata por ricevi leteron, pri la interparolado de lordino Sankta Simono kun la ĉambristino, ŝia konfidenculino, kaj pri ŝia tiel signifa esprimo de forigi koncesiaĵon, tio kiu en la ministra ĵargono signifas preni en

posedon iun aferon rajte apartenantan al alia, la situacio fariĝis tute klara por mi. La juna virino foriris kun viro kaj ĉi tiu viro estis aŭ amanto aŭ edzo, la ŝancoj estantaj favore al la lasta hipotezo.

- Sed kiel diable vi trovis ilin ?

- Tio povintus esti malfacila, sed la amiko Lapodio havis inter la manoj, informojn kies valoro li ne sciis. La inicialoj povis esti el la plej alta graveco, tamen estis ankoraŭ pli valora scii ke malpli ol unu semajnon antaŭe, la usonano pagis fakturon ĉe unu el la plej multekostaj hoteloj de Londono.

- Kiel vi divenis tion ?

- Per la prezoj. Ok ŝilingoj por ĉambro kaj ok pencejoj por glaso da ŝereo indikis unu el la plej elspezigaj hoteloj. Ne estas multaj en Londono kiuj pagigas ĉi tiujn prezojn. La ekzameno de la registroj en la dua hotelo de la avenuo Notumberlando kiun mi vizitis, donis al mi la nomon de Francisko H. Multono, usonano, elirinta la antaŭtagon kaj kies la konto kongruis kun la fakturo kiun mi havis antaŭ miaj okuloj. Oni devis plusendi liajn leterojn al la 26a de la skvaro Gordono kien mi iris; havante la ŝancon trovi la junan paron hejme, mi permesis min doni al ili kelkajn patrajn konsilojn, kaj rimarkigi ilin ke pli bone valorus, laŭ ĉiuj vidpunktoj, pli klare konigi ilian situacion ĝenerale al la publiko, kaj aparte al lordo sankta Simono. Mi invitis ilin veni renkonti lin ĉi tien, kaj kiel vi vidis tion, mi ricevis ke ankaŭ li venu.

- Sen feliĉa rezulto, mi diris. Lia konduto certe ne estis tre afabla.

- Ah ! Watsono, diris Holmso ridetante, eble ankaŭ vi ne estus tre afabla, se post ĉiuj embarasoj de flirtado kaj geedziĝo, vi estus momente ŝtelita de edzino kaj riĉaĝo. Mi kredas ke ni devas juĝi lordon Sanktaⁿ Simonoⁿ kun multe da indulgo, kaj danki nian stelon pro domaĝi al ni la eblecon de

tia situacio. Alproksimigu vian seĝon kaj donu al mi mian violonon, ĉar la sola problemo kiu restas al ni por solvi, estas scii kiel ni forpasigos la tempon dum ĉi tiuj malĝojaj vesperoj de aŭtuno.

La Diademo de Beriloj.

- Kara Holmso mia, mi diris iam matene, rigardante tra la fenestro, jen frenezulo kiu pasas sur la strato. Vere estas bedaŭrinde ke liaj gepatroj lasas lin eliri sola.

Mia amiko sin levis pigre, kun la manoj en la poŝoj de sia noktosurtuto, kaj proksimiĝis al mi por rigardi super mia ŝultro. Estis dum bela mateno de februaro; la malvarmo estis tranĉa kaj la neĝo de la antaŭtago, ankoraŭ kovranta la grundon, fulmetis sub la pala vintra suno. Meze de la strato ĝi estis surpaŝita kaj surtretita kaj fariĝis bruneta; sed sur la randoj, kaj sur la amasoj kie oni ĵetis ĝin por malobstrukci la trotuarojn, ĝi estis senmakula. La grizaj slaboj estis balaitaj kaj skrapitaj, sed restis tre glitigaj, tiel ke oni evitis paŝi sur ili. Efektive, en la direkto al la stacio de metroo, oni vidis nenium veni, krom la individuo kies la strangea irmaniero altiris mian atenton.

Li estis ĉirkaŭ kvindekjara viro, alta, fortika, impona, kun larĝa vizaĝo, viglaj trajtoj. Lia aspekto estis severa sed belaspekta : nigra redingoto, neriproĉebla ĉapelo, brunaj gamaŝoj, kaj perlgriza pantalono el bonega fasono. Tamen liaj agoj estis en plena malakordo kun la digno de sia persono kaj de sia vestaranĝo, ĉar li kuris per ĉiuj siaj fortoj, saltetante de tempo al tempo, kiel homo laca kaj kiu ne kutimas kurpaŝe iri. Kurante, li gestadis per la manoj, skuis la kapon kaj faris la plej eksterordinarajn grimacojn.

- Kion diable li povas ja havi ? Li rigardas la domajn numerojn.

- Mi kredas ke li venas ĉi tien, diris Holmso frotante al si la manojn.

- Ĉi tien ?

- Jes; mi havas kiel ideon ke li venas konsulti min. Ŝajnas al mi rekonigi la simptomojn de la plej granda perplekseco. Jen ! Ĉu mi ne diris tion al vi ?

La viro, fakte, tute spirmanka, kuris rekte al la pordo, ekkaptis la sonorilon kies la tintadoj baldaŭ eĥiĝis en la tuta domo.

Momenton poste li estis en la ĉambro, ankoraŭ spirmanka, ankoraŭ gestadanta, sed kun tia esprimo de malĝojo kaj de malespero ke, ĉesante ridi, ni estis kaptitaj de hororo kaj de kompatato. Dum kelkaj minutoj, ne eblis al li paroli; li svingis de dekstre maldekstren kaj elŝiris al si la harojn kiel homo kiu perdis la saĝon... Poste subite saltstariĝante, li ekfrapis al si la kapon kontraŭ la muron per tia perforto ke ni devis peli nin al li kaj kontraŭvole gardi lin meze de la ĉambro. Ŝerloko Holms sidigis lin en fotelon, staris apud li kaj batetante lin en la mano, provis rekuraĝigi lin per tia gajeta tono, kiun li kapablis tiel bone uzis.

- Vi venis por raporti al mi vian rakonton, ĉu ne ? Vi estas laca pro via kurado. Atendu ĝis kiam vi estos denove kapabla, kaj tiam ni estos tro feliĉaj priatenti la etan problemon kiun vi estos detalita al ni.

La brusto anhelanta, la viro ankoraŭ luktis kontraŭ sia emocio. Fine, pasante sian poŝtukon sur sian frunton, li premis la lipojn kaj rigardis nin.

- Vi devas kredi min freneza ! li diris.

- Mi vidas ke vi estas sub la efiko de kelka granda malagrablaĵo, respondis Holms.

- Ha ! Dio scias ! Iu malfeliĉo tiel subita kaj tiel terura, ke ĝi estas por freneziĝi. Mi povintus elteni publikan malhonoron, kvankam mi estas homo kies reputacio neniam suferis la plej etan atakon. Mi povintus elteni familian malfeliĉon, ĉar ĝi estas la loto de ĉiu homo; sed la du kunigitaj, kaj laŭ tiel terura formo ! Estas tro ! Mia koro

pro tio estas rompita ! Kaj poste, mi ne estas sola en la risko; la plej altaj gravuloj de la reĝlando povas suferi pro tio, se oni ne trovas rimedon aranĝi ĉi tiun abomenan aferon.

- Retrankviliĝu vin, sinjoro, diris Holmso, kaj bonvolu ekzakte diri al mi kiu vi estas kaj tion kio okazis al vi.

- Mia nomo, respondis nia gasto, estas probable de vi konata. Mi estas Aleksandro Holdero, de la bankfirmo Holdero kaj Stevenson, de la strato Fadenonadlo.

La nomo fakte estis konata de mi, pro esti tiu de la ĉefa asociito de unu el la plej gravaj privataj bankoj de la urbo. Kio do povis okaziĝi por peli en ĉi tiu peniga stato unu el la unuaj civitanoj de Londono ? Nia scivolemo estis ekscitita ĝis la lasta grado. Fine nia vizitanto faris novan strebon, kaj tiel komencis sian rakonton.

- Mi sentas ke la tempo estas altvalora, li diris, tial mi hastis veni, kiam la polica inspektoro sugestis al mi la ideon akiri vian kunlaboron. Mi ensaltis en la metroon kaj de la stacidomo mi piede venis kurante, ĉar la fiakroj ne iras rapide en ĉi tiu neĝo. Jen kial mi estas tiel senspira, ĉar mi ne kutimas multe ekzercadi. Mi nun sentas min pli bona, kaj mi tuj raportos al vi la faktojn koncize, sed tiel klare kiel eble.

...Vi scias kompreneble, ke por sukcesi koncerne bankaĵo, estas tiel grave trovi bonajn investadojn por nia fonduso, kiel pliigi niajn rilatojn kaj nian klientaron de deponantoj. Unu el la plej lukraj investoj estas la monprunto kontraŭ senriska garantio. Ni faris multe da tiaj pruntoj dum ĉi tiuj lastaj jaroj, kaj estas multe da noblaj familioj al kiuj ni pruntedonis dikajn monsumojn kontraŭ la depono de iliaj penraĵoj, ilia biblioteko aŭ ilia arĝentaĵaro.

...Hieraŭ matene, mi estis en mia kabineto de la banko, kiam oni alportis al mi vizitkarton. Mi eksaltis legante la

nomon, ĉar ĝi estis tiu... sed, eĉ rilate al vi, necesas esti diskreta kaj mi kontentiĝos diri al vi ke ĝi estis universale konata nomo, unu el la unuaj de Anglio. Mirfrapita pro ĉi tiu honoro, mi balbutis kelkajn vortojn al mia vizitanto kiam li aperis, sed li tuj eniris en la temo kun la aspekto de homo kiu volas finsolvi kiel eble plej baldaŭ malagrablan aferon.

...- Sinjoro Holdero, li diris, oni diris al mi ke vi pruntedonas monon.

...- La firmo konsentas tion kiam la garantio estas bona.

...- Mi absolute bezonas tuj havi kvindek mil sterlingojn. Mi evidente povus pruntepreni dekoble tiom de miaj amikoj, sed mi tre preferas turni min al banko, kaj mem fari la negocon. En mia situacio vi komprenos ke ne estas agrable iĝi la ŝuldanto de la aliuloj.

...- Dum kiom longe vi bezonas ĉi tiun monprunton ?

...- Venontan lundon, monsumego estas ŝuldita al mi, kaj mi certe repagos vin kun la interezo kiun vi decidis. Sed tute nepras ke mi senprokraste havu la monon.

...- Mi estus feliĉa pruntedoni al vi el miaj propraj fondusoj sen pli da intertraktoj, se la sumo ne estus ja iom tro alta. Aliflanke, se mi faras tion sub la nomo de la firmo, mi ŝuldas al mia asociito preni, eĉ kun vi, ĉiujn uzgarantiojn.

...- Estas ja tiel kiel mi komprenas tion, li diris, prenante grandan juvelujon el nigra marokeno kiun li demetis apud sia seĝo. Sendube vi aŭdis paroli pri la diademo de beriloj, ĉu ?

...- Unu el la plej altvaloraj juveloj de la Krono ?

...- Ĝuste.

...Li malfermis la juvelujon, kaj montris al mi, kontrastanta sur bela karnkolora veluro, la pompan koncernatan juvelon.

...- Estas tridek naŭ grandegaj beriloj, kaj la prezo de la muntumo el oro estas nekalkulebla. La plej malalta ekspertizo egalvalorus la duoblon de la monsumo kiun mi

petas al vi; mi lasos al vi ĉi tiun diademon kiel garantion.

...Mi prenis la valoran skatolon inter miaj manoj, kaj rigardis kun iom da perplekseco mian famkonatan vizitanton.

...-Ĉu vi dubas pri ĝia valoro ? li diris.

...-Tute ne. Mi nur demandas al mi...

...-Se mi ne malpravas doni al vi ĉi tiun garantiaĵon ? Vi povas trankviliĝi pri tio. Mi ne estus pensanta pri tio dum momento, se ne estis tute certa ke mi povos repreni ĝin post kvar tagoj. Tio estas nur afero pri formalaĵo. Ĉu vi trovas la garantiaĵon sufiĉa ?

...- Abunde.

...-Vi komprenas, sinjoro Holdero, ke mi donas al vi grandan pruvon de konfido, kaj tiu ĉi konfido baziĝas sur ĉio kion oni diris al mi pri vi. Mi kalkulas ke ne nur vi estos diskreta kaj malhelpos ĉian klaĉo pri tio, sed ĉefe ke vi plenumos la plej grandajn antaŭzorgojn por ke la juvelo estu sekura; ne utilas diri ke, se la plej eta akcidento okazis al ĉi tiu juvelo, tio kaŭzus grandan skandalon. Kaj la plej eta akcidento estus tiel grava kiel la kompleta perdo, ĉar ne ekzistas en la mondo beriloj komparindaj kun ĉi tiuj. Tamen mi plenkonfide lasas al vi la diademon, kaj mi venos mem repreni ĝin lundon matene.

...Vidante mian klienton urĝatan por foriri, mi kredis senutila respondi, kaj vokante mian kasiston, mi doni ordonon por elspezi kvindek biletojn de mil sterlingoj. Kiam mi poste estis denove sola, kun la altvalora juvelujo sur la tablo antaŭ mi, mi ne sukcesis retenigi min tremeti en la ĉeesto de la grandega respondeco kiun mi akceptis. Estis tute certa ke ĉi tiu juvelo estanta nacia valoraĵo, terura skandalo eksplodis se malfeliĉo okazus al ĝi. Mi jam bedaŭris esti konsentinta prizorgi ĝin. Tamen estis tro malfrue por reveni al ĉi tiu punkto; mi enŝlosis ĝin en mia

propra kiraskesto kaj relaboris.

...Kiam vesperiĝis, ŝajnis al mi malprudenta lasi malantaŭ mi en la oficejo tian altvaloran objekton. Kiraskestoj de bankistoj jam estis rompitaĵ, kaj kiu pruvis ke la mia ne estus tia ? Tiam kia terura situacio, tiu en kiu mi troviĝus ! Mi do decidis ĉiutage kunpreni la juvelujon, tiel ke ĝi ĉiam estu reale sub mia mano. Tiucele mi hoĵis fiakron kaj reĥejmeniris en Strithamo kun la altvalora juvelo; mi spiris bone nur kiam mi sekure demetis ĝin sur la unuan etaĝon kaj ke mi enŝlosis ĝin en la skribotablo de mia tualetejo.

...Kaj nun vorton pri mia domo, sinjoro Holms, ĉar mi deziras ke vi bone ekkomprenu la situacion. Mia ĉambristo kaj mia lakeo kuŝas ekstere, kaj ili estas senkulpaj. Mi havas tri domservistinojn kiuj estas ĉe mi ekde jaroj kaj kies absoluta honesteco estas super ĉia suspekto. Alia, Lucia Paŭo, la dua ĉambristino, estas sub mia dispoŝo nur ekde kelkaj monatoj. Ŝi havis bonegajn atestilojn, kaj mi estis ĝis nun perfekte kontenta pri ŝi. Ŝi estas tre beleta knabino, kies admirantoj estis viditaj pli ol unu fojon en la ĉirkaŭaĵo de mia hejmo. Sed mi tamen kredas ke ĉi tiu knabino estas honesta en ĉiu senco de la vorto.

...Jen pri la geservistoj. Mia familio mem estas tiel malvasta ke la priskribo ne estos longa. Mi estas vidvo kaj havas nur unu filon, Arturo. Li estis por mi disreviĝo, sinjoro Holms, malĝoja disreviĝo. Certe mi ne estas sen riproĉo. Oni diras ke mi dorlotis lin. Tio tute eblas. Kiam mi perdis mian pleĵamatan edzinon, ĉi tiu infano estis ĉio kio restis al mi en la mondo. Mi ne kapablis elteni vidi lin zorgoplena dum unu sola momento. Mi neniam rifuzis ion ajn al li. Eble estus pli preferinde por ni ambaŭ ke mi estu pli severa, kaj se mi ne sukcesis bone eduki lin, almenaŭ mi havis bonan intencon.

...Mi nature deziris ke li postvenu min ĉe la banko, sed li

ne havis spiriton turnita al la aferoj. Li estis kolerema, obstina, kaj por verdir, mi ne povis konfidi al li grandajn monsumojn. Li fariĝis membro de aristokrata rondo en kiu, dank' al siaj ĉarmaj manieroj, li faris sin la intiman amikon de multe da junuloj havantaj grandajn riĉaĵojn kaj elspezigajn kutimojn. Li komencis ludi altan sumon, kaj priveti en la vetkuroj, tiel bone ke li devis ofte turni sin al mi por pagi honorŝuldojn. Li plurfoje provis forlasi ĉi tiun danĝeran kompanion, sed ĉiufoje la influo de lia amiko sinjoro Georgo Bonbruli revenigis lin en ĝin.

...Kaj vere, mi ne miras ke viro kiel sinjoro Georgo Bonbruli havis tian influon sur li, ĉar li ofte venis hejmen, kaj mi konfesas ke li treege plaĉis al mi. Li estas pli aĝa ol Arturo, kaj estas mondomano ĝis la fino de siaj ungoj; li iris ĉien, li vidis ĉion, li estas sprita parolanto, kaj vere bela knabo. Tamen, kiam mi malvarmsange pensas pri tio, kaj ke li ne plu ĉeestas por uzi sur mi sian logpovon, mi estas konvinkita de lia cinika lingvaĵo kaj certa brileto kiun mi kaptis en liaj okuloj, ke necesas profunde malfidi lin. Tio estas mia opinio, kaj estas ankaŭ la opinio de mia eta Maria, kiu jam havas saĝon de virino.

...Kaj restas nur ŝi por priskribi al vi : ŝi estas mia nevino. Kiam mia frato mortis antaŭ kvin jaroj, ĉi tiu infano restis sola en la mondo; mi filinigis ŝin, kaj de tiam rigardis ŝin kiel mian filinon. Ŝi estas mia sunradio; ŝi estas dolĉa, tenera, ĉarma, bonega mastrumantino, perfekta hejmestrino, kaj tamen tiel kvieta, afabla kaj sentema kiel virino povas esti. Ŝi estas mia ĉefhelpantino, mi ne scias tion kion mi fariĝus sen ŝi. Ŝi rezistis antaŭ mi nur pri unu punkto. Dufoje, mia filo edziĝopetis ŝin al mi, ĉar li tenere amas ŝin, sed ĉiufoje ŝi rifuzis lin. Mi kredas ke se iu kapablis revenigi lin sur la vojo de la virto, estas ŝi, kaj ke tiu geedziĝo transformintus lin; sed ve ! Nun estas tro malfrue, tro malfrue por ĉiam !

...Nun, sinjoro Holms, vi konas ĉiujn kiuj loĝas sub mia tegmento kaj mi tuj daŭrigos mian malĝojan rakonton.

...Prenante la kafon, en la salono post la tagmanĝo, mi rakontis la aventuron al Arturo kaj Maria, kaj diris al ili la altvaloran trezoron, kiun mi alportis, detenante min nur nomi mian klienton. Mi certas ke Lucia Paŭo, kiu servis la kafon, estis foririnta; sed mi ne povus aserti ke la pordo estis fermita. Maria kaj Arturo aŭskultis min kun granda intereso kaj volintus vidi la faman diademon, sed mi opiniis pli saĝa ne tuŝi ĝin.

...- Kie vi metis ĝin ? Demandis Arturo.

...- En mia skribotablo.

...- Nu ! Mi deziras ke la ŝtelistoj ne eniros en la domon ĉi-vespere, li diris.

...- Ĝi estas ŝlosita.

...- Ho ! Ia ajn ŝlosilo malfermus ĝin. Kiam mi estis infano, mi malfermis ĝin per la ŝlosilo de la ŝranko de la formetejo.

...Li ofte tiel diris sensencaĵojn, kaj mi ne atentis al ĉi tiu frazo. Sed li tiunokte sekvis min en mia ĉambro kun tre serioza mieno.

...- Aŭskultu, paĉjo, li diris kun la okuloj mallevitaj, ĉu vi povus doni al mi ducent sterlingojn ?

...- Ne, mi ne povas ! mi vigle respondis. Mi ĝis nun estis nur tro malavara kun vi.

...- Vi estis tre bona, mi scias tion; sed ĉiাপреze necesas al mi ĉi tiun monon ! Alie mi ne plu povos montri min en la rondejo.

...- Nu, mi estos tre plenkontenta !

...- Jes, sed vi ne volus ke mi forlasu ĝin kiel malhonorulo. Mi ne kapablas elteni ĉi tiun ideon. Necesas al mi la mono ĉiuokaze, kaj se vi ne volas doni ĝin al mi, mi devos serĉi aliloke.

...- Vi ne havos centimon de mi, mi kolere kriis al li, ĉar ĝi estis lia tria peto de la komenco de la monato.

...Kiam li estis foririnta, mi malfermis mian skribotablon, por certigi ke mia trezoro estis sekura, kaj mi zorge reŝosis ĝin, mi tiam komencis la viziton de la domo por vidi, ĉu ĉio estas bone fermita. Estas tasko kiun mi kutime lasas por Maria, sed kiun mi preferis mem plenumi tiuvespere. Malsuprenirante, mi ekvidis Mariaⁿ tra la fenestro de la antaŭĉambro, fenestro kiun ŝi fermis kiam ŝi aŭdis min.

...- Diru al mi, paĉjo, ŝi diris al mi kun mieno kiu ŝajnis al mi iom konfuzita, ĉu vi permesis Luciaⁿ eliri ĉivespere ?

...- Certe ne.

...Ŝi ĵus eniris tra la malantaŭa pordo. Mi ja pensas ke ŝi iris nur ĝis la krado por vidi iun, sed tio tamen ne ŝajnas al mi akceptebla, kaj ŝajnas al mi ke ne necesas permesi al ŝi ĉi tiujn eliradojn.

...- Parolu al ŝi morgaŭ matene, aŭ mi mem faros tion, se vi preferas. Ĉu vi certas ke ĉio estas bone fermita ?

...- Tute certa, paĉjo.

...- Do, bonan nokton. Mi kisis ŝin kaj supreniris en mian ĉambron, kie mi baldaŭ endormiĝis.

Kiel vi vidas, sinjoro Holms, mi raportas la plej etajn detalojn; malgraŭ tio, mi esperas ke vi pridemandos min pri ĉio kio ŝajnas al vi malklara.

- Mi trovas vian raporton tute klaran.

- Mi alvenas al la priatentinda punkto. Mi ne estas profunda dormanto, kaj ĉar mi estis zorgoplena, mia dormo devis esti ankoraŭ pli malprofunda ol kutime. Ĉirkaŭ la dua matene mi estis vekita de bruo kiu ŝajnis veni de la domo. La bruo ĉesis antaŭ ol mi estis bone vigla, sed mi havis la impreson de fenestro mallaŭte fermita. Mi restis kuŝanta, aŭskultante per ĉiuj miaj oreloj. Subite, kia ne estis mia hororo, aŭdante senkonfuze obtuzajn paŝojn en la apuda

ĉambro. Mi elŝoviĝis el mia lito, tute tremetanta pro timo, kaj mi rigardis en mian tualetejon tra la duonmalfermita pordo.

...- Arturo ! mi kriis. Rabisto ! Bandito ! Kiel vi aŭdacas tuŝi ĉi tiun diademon ?

...La gaso duone brulis kiel mi lasis ĝin kaj mia kompatinda filo, vestita nur de ĉemizo kaj pantalono, staris tie apud la lumo, tenante la diademon inter la manoj. Li ŝajnis streĉi ĉiujn siajn fortojn por rompi ĝin aŭ por tordi ĝin. Je mia krio, li maltenis ĝin kaj fariĝis pala kiel morto. Mi ekkaptis la juvelon kaj ekzamenis ĝin. Unu el la ekstremaĵoj mankis kun tri ŝtonoj.

...- Mizerulo ! Vi rompis ĝin ! Vi ĉiame malhonoris min ! Kie estas la ŝtonoj kiujn vi ŝtelis ?

...- Ŝtelitaj !

...- Jes, ŝtelisto ! mi furioze kriis, skuante lin per la ŝultro.

...- Ne mankas unu; li ne povas manki unu, li diras.

...- Mankas tri. Kaj vi scias kie ili estas. Ĉu necesas nomi vin mensogulo, tiel bone kiel ŝtelisto ? Ĉu mi ne vidis vin provi rompi duan pecon de la diademo ?

...- Tio estas tro ! li diris. Ne pli da vortoj pri ĉi tiu afero, kaj ĉar vi trovis bone insulti min, mi forlasos vian domon morgaŭ matene, kaj faros tutsole mian vojon en la mondo.

...- Vi forlasos la domon inter la manoj de la polico ! Ĉi tiu afero estos klarigita.

...- Vi sciiĝos nenion de mi, li ekkriis kun emocio kiu surprizis min, se plaĉas al vi alvoki la policon, ke la polico ekenketu.

...Tiumomente la tuta domo estis sur la piedoj, ĉar en mia kolero mi laŭtigis mian voĉon. Maria alvenis unue; ĉe la vido de la diademo kaj de la vizaĝo de Arturo, ŝi komprenis la

veron, kaj eligante krion, ŝi senkonsciiĝis. Mi sendis serĉi la policon kaj metis la aferon inter ĝiaj manoj. Kiam la inspektoro kaj la policisto eniris, Arturo, kiu restis tie kun krucitaj brakoj, demandis al mi ĉu mi intencis akuzi lin pri ŝtelo. Mi respondis ke ĝi ne plu estis privata afero, sed publika, ĉar la rompita diademo estis nacia posedaĵo. Mi estis decidinta lasi labori justicon.

...- Almenaŭ, li diris, vi ne tuj arestigos min. Estus en via intereso, kiel en la mia, permesi al mi forestiĝi, estus nur dum kvin minutoj.

...- Por fuĝi aŭ eble kaŝi tion kion vi ŝtelis.

...Kaj tiam, provante mildigi lin per la hororo de la situacio, mi petegis lin pensi ke, ne nur mia honoro, sed ankaŭ tiu de alia, multe pli altranga ol mi, estis riskata; ke li, mia filo, riskis kaŭzi skandalon kiu revolucius la landon. Li kapablis malebligi ĝin, se li diris al mi tion kio iĝis la tri perditaj ŝtonoj.

...- Ne trompiĝu, mi aldonis, vi estis surprizata ĉe la kulpo, kaj via konfeso ne povus plimalbonigi vian kazon. Sed se vi riparas vian kulpon laŭ mezuro de ebleco, dirante al ni kie estas la beriloj, ĉio estos forgesita kaj pardonita.

...- Gardu vian pardonon por tiuj kiuj petas ĝin al vi, li respondis, bruske turnante al mi la dorson, kaj mi vidis ke li estas tro decida por ke miaj paroloj povu skui lin. Ne plu estis por heziti. Mi vokis la inspektoron kaj konfidis al li lian sorton. Oni tuj priserĉis ne nur lian personon, sed lian ĉambron kaj ĉiun lokon de la domo kie li povintus kaŝi la juvelojn; sed oni trovis nenian spuron de ĝi, kaj la kompatinda knabo rifuzis malfermi la buŝon malgraŭ miaj petegoj aŭ niaj minacoj. Oni enkarcerigis lin ĉimatene, kaj post esti plenuminta diversajn formalizaĵojn ĉe la policejo, mi alkuris vidi vin por peti al vi klarigi ĉi tiun misteron. La polico konfesas ke ĝi nenion komprenas. Vi povas fari ajnan

elspezon kiu ŝajnos al vi utila : mi jam promesis rekompencan de mil sterlingoj. Dio mia, kio mi fariĝos ? Mi perdis mian honoron, la ŝtonojn kaj mian filon en unu sola nokto ! Kiel mi estas malfeliĉa !

Li prenis sian kapon inter siajn manojn kaj sin balancis dekstren, maldekstren, lamentante mallaŭte kiel infano.

Ŝerloko Holmso restis silenta kelkajn minutojn, kun la brovoj kuntirataj, la okuloj fikse direktataj al la fajro.

- Ĉu vi multofte gastigas ? li demandis.

- Neniu krom mia asociito kaj lia familio, kaj kelkfoje iu amiko de Arturo. Sinjoro Georgo Bonbruli lastatempe venis ofte. Neniu alia, mi kredas.

- Ĉu vi multofte iras en la mondomon ?

- Arturo, jes. Sed Maria kaj mi, ni restas hejme. Neniu el ni volegas eliri.

- Tio estas malofta ĉe junulino.

- Ŝi havas jam dudek kvar jarojn kaj havas trankvilan naturon.

- Laŭ vi, ĉi tiu afero multe emociis ŝin ?

- Jes, ŝi eĉ estas pli impresita ol mi.

- Neniu el vi du havas dubon pri la kulpeco de via filo ?

- Kiel ni povus dubi, ĉar mi vidis lin, per miaj propraj okuloj, kun la diademo inter la manoj.

- Mi ne konsideras tion tute kiel decidigan pruvon. Ĉu la resto de la diademo estis difektita ?

- Jes, ĝi estis tordita.

- Ĉu vi ne pensas ke eble li provis rebonigi ĝin ?

- Ho ! Dio benu vin ! Vi faras tion kion vi povas por mi kaj por li. Sed tio estas tro peza tasko. Unue, kion li devis fari tie ? Se tio estis por senkulpa celo, kial li ne diris tion ?

- Ĝuste. Kaj se li kulpis, kial li ne elpensis fabelon ? Lia silento povas esti interpretata laŭ du manieroj. Estas

diversaj punktoj tre kuriozaj en ĉi tiu afero. Kion pensis la polico pri la bruo kiu vekis vin ?

- Ili diras ke estis probable Arturo fermanta sian pordon.

- Tre malprobable ! Kvazaŭ homo estanta plenumonta tian perfidaĵon fermus sian pordon tiamaniere ke li vekus la tutan domon ! Kion ili diras pri la malapero de la ŝtonoj ?

- Oni ankoraŭ sondas la plankojn kaj meblojn esperante trovi ilin.

- Ĉu ili pensis serĉi eksteren ?

- Jes. Ho ! Ili montris eksterordinaran aktivecon. La tuta ĝardeno jam estis zorgeme ekzamenita.

- Nu, mia kara sinjoro, ĉu ne tutevidentas al vi ke ĉi tiu afero estas multe pli mistera ol ĝi unue aperis al la polico, aŭ al vi ? Tio komence ŝajnis al vi simpla. Por mi, ĝi male estas malsimpla. Vidu tion kion implicas via teorio. Vi supozas ke via filo ellitiĝis, eniris kun grandaj riskoj en vian tualetejon, malfermis vian skribotablon, prenis la diademon, rompis parton de ĝi, iris al ia alia loko kaj tie kaŝis tri el la tridek naŭ ŝtonoj kun tiom da lerteco ke neniu kapablas trovi ilin; ke li poste revenis kun la tridek ses aliaj ŝtonoj en ĉi tiun ĉambron, kie li havis ĉiujn eblajn riskojn esti malkovrata. Mi demandas tion al vi, ĉu tia teorio estas akceptebla ?

- Do kio estas via ? malespere diris la bankiero. Se li ne havis malbonajn intencojn, kial li ne klarigas sin ?

- Estas ni kiuj devos trovi la kialon de ĉi tiu silento, rebatis Holms; se vi bonvolas tion, sinjoro Holdero, ni kune iros al Strithamo, kaj ni pasigos horon por esplori la ejojn.

Mia amiko insistis por ke mi partoprenu en la esplorado, tio kion mi profunde deziris, ĉar mia scivolemo kaj mia simpatio estis vigle ekscitataj de la rakonto kiun ni ĵus aŭdis. Mi konfesas ke la kulpeco de la filo de la bankiero

Ŝajnis al mi tiel evidenta kiel al lia kompatinda patro, sed mi tiom fidis al juĝo de Holmsø ke mi denove esperis kun li. Li, por tiel diri, ne diris vorton dum la tuta voĵiro. Li restis enprofundiĝinta en la plej profundaj pripensoj, kun la kapo klinita sur la brusto, la ĉapelo mallevita sur la okuloj. Nia kliento ŝajnis esti iom rekolektinta sian kuraĝon pro la malmulto da espero kiun ni donis al li, kaj li eĉ iom babilis kun mi pri sia afero. Mallonga voĵiro per fervojo, ankoraŭ pli mallonga promenado, alkondukis nin al Justabanko, la modesta restadejo de la grava financisto.

Justabanko estis sufiĉe granda kvadrata domo el blanka ŝtono, situanta iom malproksime de la vojo. Duobla veturebla aleo, ĉirkaŭ gazono tute blanka pro neĝo, kondukis al du larĝaj kradoj el fero. Dekstre estis malgranda ligna pordeto, de kie mallarĝa pado, bordita de heĝoj, alkondukis al la pordo de la kuirejo; ĝi estis la enirejo de la liverantoj. Maldekstre, vojeto alkondukanta al la staloj; sed ĉi tiu strateto estis ekster la proprietaĵo, kaj publika, kvankam malmulte utiligita. Holmsø forlasis nin ĉe la pordo kaj malrapide ĉirkaŭpaŝis la domon, poste li atingis la straton, revenis laŭ la pado de la liverantoj al la ĝardeno situanta malantaŭ la domo, kaj tra la staloj alvenis al la vojeto. Li tiel longe for-restis ke sinjoro Holdero kaj mi sidiĝis apud la fajro en la manĝoĉambro, por atendi lian revenon. Ni estis tie ekde momento, kiam la pordo malfermiĝis, kaj junulino eniris. Ŝi estis kun staturo plivole supre la averaĝo, maldika, kun malhelaj okuloj kaj haroj intense kontrastante kun sia blanka kaj travidebla vizaĝkoloro. Mi ne kredas esti iam vidanta tian palecon ĉe iu ajn virino. Ŝiaj lipoj mem estis blankaj, kaj ŝiaj okuloj estis ruĝiĝintaj pro la larmoj. Vidante ŝin silente eniri en la ĉambron, ŝi ŝajnis al mi porti la markon de aflikto ankoraŭ pli intensa ol tiu de la bankiero, tio impresis des pli ke ŝi

Ŝajnis decidema virino, posedanta malmulte kutiman kuraĝon. Sen zorgi pri mia ĉeesto, ŝi venis rekte al sia onklo kaj irigis la manon sur lian kapon per tre ina kareso.

- Vi ordonis reliberigi Arturoⁿ, ĉu ne, onklo mia ?

- Ne, ne, infano mia, necesas ke ĉi tiu afero estu tute klarigita.

- Sed mi certas ke li senkulpas. Estas, por verdiri, nur virina instinkto. Mi sentas ke li faris nenion malbonan, kaj ke vi bedaŭros esti aginta tiel severe.

- Kial li rifuzas paroli, se li estas senkulpa ?

- Kiu scias ? Eble pro kolero esti suspektata.

- Kiel ne suspekti lin, vidante li kun la diademo inter la manoj ?

- Ho ! Li prenis ĝin nur por rigardi ĝin. Mi petegas vin, kredu min, li estas senkulpa. Delasu la aferon, kaj ke oni ne plu parolu pri ĝi. Estas tiel terure pensi ke nia Arturo estas en malliberejo.

- Mi ĉesos la serĉadojn nur kiam la ŝtonoj estos trovitaj, ne antaŭe, Maria ! Via korinklino por Arturo blindigas vin tiel ke vi forgesas la terurajn konsekvencojn kiuj rezultos por mi el ĉi tiu afero. Male anstataŭ estingi la aferon, mi venigis el Londono personon kiu helpos min puŝi la esploradon ankoraŭ pli for.

- Ĉu estas la ĉeestanta sinjoro ĉi tie ? Ŝi demandis, sin turnante al mi.

- Ne, lia amiko. Li petegis nin lasi lin sola. Li ĉirkaŭiris la domon laŭ la vojeto de la staloj.

- La vojeto ? La nigraj brovoj sulkiĝis. Kion li esperas trovi tien ? Ha ! Jen li, mi supozas... Mi esperas, sinjoro, ke vi sukcesos pruvi, tio pri kio mi estas konvinkita, ke mia kuzo Arturo senkulpas pri ĉi tiu krimo.

- Mi tute samopinias kiel vi, respondis Holmso irante skui la neĝon de siaj ŝuoj sur la skraptapîŝon, mi kredas ke mi

havas la honoron paroli kun fraŭlino Maria Holdero. Ĉu mi povas meti al vi unu aŭ du demandojn ?

- Mi petegas vin, sinjoro, se tio povas servi por klarigi ĉi tiun malĝojan aferon.

- Ĉu vi nenion aŭdis dum la lasta vespero ?

- Nenion ĝis kiam mia onklo laŭtigis la voĉon. Mi aŭdis lin kaj tuj malsupreniris.

- Estas vi kiu vespere fermis la fenestrojn kaj la pordojn. Ĉu vi alfortikigis ĉiujn fenestrojn ?

- Jes.

- Ĉu ili ĉimatene estis ankoraŭ tiaj ?

- Jes.

- Ĉu unu el viaj ĉambristinoj havas amanton ? Mi kredas ke vi diris al via onklo hieraŭ vespere, ke ŝi eliris por renkonti lin.

- Jes, kaj estas ŝi mem kiu servis la teon en la salono, kaj kiu povis aŭdi mian onklon paroli pri la diademo.

- Mi komprenas. Vi deduktas el tio ke ŝi povas esti elirinta por informi sian amanton kaj ke ili povis ambaŭ aranĝi la ŝteladon.

- Sed por kio utilas ĉiuj ĉi konjektoj, ekkriis senpacience la bankiero, kiam mi diras al vi ke mi vidis Arturoⁿ kun la diademo inter la manoj ?

- Atendu iomete, sinjoro Holdero. Ni revenos al tio. Kaj pri tiu knabino, fraŭlino Holdero, vi vidis ŝin reeniri tra la pordon de la kuirejo, mi supozas ?

- Jes, kiam mi iris vidi ĉu la pordo estis bone fermita por la nokto, mi trovis ŝin kiu sin ŝovis endomen. Mi ankaŭ ekvidis la viron en la mallumo.

- Ĉu vi konas lin ?

- Ho, jes, li estas la komercisto kiu alportas al ni la legomojn. Li nomiĝas Francisko Prospero.

- Li staris, diris Holmso, maldekstre kaj je kelka distanco

de la pordo.

- Jes, maldekstre.
- Kaj li havas lignokruron !

Terura ekbrilo ŝajnis trapasi en la okulojn de la junulino.

- Ĉu vi do estas sorĉisto ? ŝi diris; kiel vi scias tion ?

Ŝi ridetis, sed la maldika kaj esprimplena vizaĝo de Holms restis senpasia.

- Mi nun bonvolus supreniri al la unuan, li diris. Mi probable bezonos denove eliri. Ha ! Mi tuj inspektos la fenestrojn de la teretaĝo antaŭ ol supreniri.

Li rapide iris de unu al la alia, poste haltis pli longe ĉe la granda aperturo kiu rigardis de la vestiblon en la vojeto. Li malfermis ĝin, kaj zorge ekzamenis la randon per sia lupeo ! Ni supreniru nun, li fine diris.

La tualetejo de la bankiero estis simple meblita ĉambro, kun griza tapiŝo, granda skribotablo kaj alta spegulo. Holms unue iris al la skribotablo kaj ekzamenis al ĝi la seruron.

- Kia ŝlosilo oni uzis por malfermi ĝin ?
- Tiun kiun mia filo mem indikis, tiu de la ŝranko de la formetejo.

- Ĉu vi havas ĝin tie ?

- Ĝi estas tiu kiu estas sur la tualetujo.

Ŝerloko Holms prenis ĝin kaj malfermis la skribotablon.

- Ĝi estas silenta seruro. Ne estas mirinda ke tio ne vekis vin. Ĉi tiu skatolo, mi pensas, enhavas la diademon. Ni vidu ĝin.

Li malfermis la juvelujon kaj elprenante la diademon, metis ĝin sur la tablon. Ĝi estis belega specimeno de la arto de juvelisto, kaj la tridek ses ŝtonoj estis la plej belaj kiujn mi iam vidis. Ĉe iu flanko, ĝi estis tordita; eĉ mankis parto ĉe la ekstremo de la peco, tiu precize sur kiu estis enfiksita la tri mankantajn ŝtonojn.

- Tie, sinjoro Holdero, diris Holmso, jen la loko kiu estas simetria kun tiu kiu estas tiel malfeliĉe perdita. Ĉu mi povos peti al vi rompi ĝin ?

La bankiero retroiris pro hororo.

- Neniam, li diris, mi eĉ ne kuraĝus provi.

- Nu ! Mi tuj aŭdacos tion.

Holmso enmetis sian tutan forton sur ĝin, sen ia rezulto.

- Mi sentas ke ĝi iomete cedas, li diris, sed kvankam mi havas ege fortajn fingrojn, necesus al mi multe da tempo por sukcesi. Ordinara homo ne kapablus. Kaj kio viaopinie okazus, sinjoro Holdero, se mi rompus ĝin ? ĝi farus bruon, kiel pistola pafado. Ĉu vi estas dironta al mi ke ĉio ĉi okazis je kelkaj paŝoj de via lito kaj ke vi nenion aŭdis ?

- Mi ne scias, kion pensi. Ĉio ĉi estas pli kaj pli malklara.

- Sed ĉio klariĝos laŭmezure kiam ni ekzamenos la aferon. Kion vi pensas, fraŭlino Holdero ?

- Mi konfesas ke mi ankoraŭ partoprenas en la perplekseco de mia onklo.

- Ĉu via filo havis nek ŝuojn nek pantoflojn kiam vi vidis lin ?

- Li precize havis nur sian pantalonon kaj sian ĉemizon.

- Mi dankas vin. Ni certe estis favorata de eksterordinara ŝanco en tiu ĉi tuta enketo, kaj estos ja nia kulpo se ni ne alvenos al la kompleta vero. Kun via permeso, sinjoro Holdero, mi tuj daŭrigos miajn esplorojn eksteren.

Li iris sola, laŭ sia peto, ĉar li klarigis ke novaj piedsignoj plimalfaciligis lian taskon. Post unu horo, eble pli, li revenis kun la piedoj kovritaj de neĝo, la vizaĝo pli neesplorebla ol neniam.

- Mi kredas ke mi vidis nun ĉion kio estis por vidi, sinjoro Holdero, li diris; mi estos pli utila al vi reirante hejmen.

- Sed la ŝtonoj, sinjoro Holmso. Kie ili estas ?

- Mi ne povas diri al vi.

La bankiero tordetis al si la manojn.

- Mi neniam plu revidos ilin, li kriis. Kaj mia filo ? Ĉu vi donas al mi esperon ?

- Mia opinio neniel ŝanĝiĝis.

- Do, je la nomo de la Ĉielo, kio estis ĉi tiu bedaŭrinda tragedio kiu okazis hejme dum la lasta vespero ?

- Se vi volas veni ĝis mia hejmo en la strato Bakisto, morgaŭ matene, inter la naŭa kaj la deka, mi estos tre feliĉa povi ĉion klarigi al vi. Se mi bone komprenis, vi donas al mi plenpermeson por agi en via nomo, kondiĉe ke mi retrovos la ŝtonojn, kaj vi ne metas al mi limon al la elspezo ?

- Mi donus mian riĉaĵon por retrovi ilin.

- Tre bone. Mi ekzamenos la aferon de nun ĝis morgaŭ. Adiaŭ, eblas ja ke mi devu reveni ĉi tien antaŭ nokto.

Estis al mi evidente ke mia kunulo jam faris sian opinion, kvankam mi eĉ ne kapablis antaŭflari la solvon. Plurfoje dum la revena voĵiro, mi provis sondi lin pri tio, sed li ĉiam transirigis al alia temo, kaj mi fine rezigni ĝin. Ne jam estis la tria kiam ni rehejmiĝis. Li rekte iris al sia ĉambro kaj eliris el ĝi post kelkaj minutoj, vestita kiel vulgara vagabondo; kun sia kolumo malfaldita, sia jako brilanta ĉe la kudroj, sia koltuko ruĝa, kaj sia botetoj eluzitaj, li estis la perfekta tipo de ili.

- Mi kredas ke tio taŭgos, li diris, ekrigardante al la spegulon super la kameno. Mi deziras ke vi povu veni kun mi, Vatsono, sed mi timas ke tio estu malutila. Ĉu mi estas sur la vera spuraro aŭ estas nur tromplogilo ? Ĉiuokaze mi baldaŭ scios tion. Mi esperas reveni post nelonge.

Li iris al la bufedo, tranĉis por si tranĉaĵon el bovaĵo, kiun li sandviĉe metis inter du panpecoj kaj enŝovante ĉi tiun malabundan manĝon en sian poŝon, li exploreme foriris.

Mi ĵus prenis mian teon de la kvina, kiam li revenis kun tre bona humoro, kaj tenante ĉe la fino de la fingroj

malnovan elastan boteton. Li ĵetis ĝin en angulon kaj verŝis al si tason da teo.

- Mi eniris nur pasante, li diris. Mi daŭrigas.

- Kie tio ?

- Ho ! Ĉe la alia flanko de la For-okcidento. Mi eble estos for dum kelka tempo. Ĉefe ne atendu min.

- Kaj kiel tio prezentiĝas ?

- Ho ! Tiel. Mi ne devas plendi. Mi reiris al Strithamo de kiam mi forlasis vin, sed sen eniri en la domon. Estas ĉarma problemeto kiun mi estas tre feliĉa ricevi ĝin por solvi. Sed mi ne havas tempon por babili; mi tuj demetos ĉi tiujn vestojn kun nefidinda aspekto, kaj refariĝos mia tre respektinda mi mem.

Mi bone vidis per liaj manieroj ke li havis pli bonajn kialojn esti kontenta ol li diris. Liaj okuloj fulmetis, kaj liaj vangoj, kutime tiel palaj, estis delikate koloraj. Li rapide supreniris ĉe li; kelkajn minutojn poste, mi aŭdis fortege la pordon de la strato fermiĝi; li estis denove foririnta por tiu ĉaso kiu pasiigis lin je tiel alta grado.

Mi atendis lin ĝis noktomezo, kaj ne vidante lin veni, mi eniris en mian ĉambron. Mi ofte vidis lin resti ekstere dum pluraj sinsekvaj tagoj kaj noktoj kiam li estis sur varma spuraro, tiel ke lia malfruo ne surprizis min. Mi ne scias je kioma horo li revenis, sed kiam mi malsupreniris por matenmanĝi, morgaŭon matene, li estis tie, tiel freŝa kaj sana kiel eble, kun taso da kafo en iu mano, lia gazeto en la alia.

- Vi senkulpigos min pro komenci sen vi, Vatsono, li diris al mi, sed vi memoras ke nia kliento devas veni sufiĉe frue ĉi-matene.

- Estas vere ke jam pasis la naŭa, mi respondis. Mi eĉ kredas ke jen li. Ŝajnas al mi esti aŭdanta sonori.

Fakte, estis nia amiko la financisto. Mi estis mirigata de

la ŝanĝo kiu okazis en li, ĉar lia vizaĝo, nature larĝa kaj masiva, estis kiel reduktita kaj ŝrumpita, eĉ liaj haroj ŝajnis blankiĝintaj. Li eniris kun pigreco kaj letargio kiuj estis ankoraŭ pli penigaj por vidi ol lia vigleco de la antaŭtago, kaj li peze falis en la fotelon kiun mi antaŭenpuŝis al li.

- Mi ne scias tion kion mi faris por esti tiel kruele elprovida, li diris. Antaŭ nur du tagoj, mi estis feliĉa kaj prospera viro, sen zorgo en la mondo. Hodiaŭ restas nur al mi unu soleca kaj malhonorita maljuneco. Estas hejme miaj sortobato post sortobato... Mia nevino Maria forlasis min.

- Forlasis ?

- Jes. Ŝia lito ne estis malaranĝita ĉi-nokte, ŝia ĉambro estis neloĝata ĉi-matene, kaj estis letero por mi sur la tablo de la vestiblo. Mi hieraŭ diris al ŝi, malĝoje sed sen kolero, ke se ŝi edziniĝus kun mia filo, ĉio ĉi ne okazintus. Tio estis senpripensa parolo. Estas pri tio ke ŝi aludas en sia letero :

"Mia kara onklo,

"Mi sentas ke mi estis la kaŭzo de via malfeliĉo kaj ke se mi agis malsame, ĉio ĉi ne okazintus. Mi neniam plu povas, kun ĉi tiu ideo, esti feliĉa sub via tegmento, kaj necesas ke mi forlasas vin por ĉiam. Ne zorgu pri mia estonteco, ĝi estas asekurita, kaj ĉefe ne serĉu min, estus vana peno, kaj malbona servo por fari al mi. Ĝismorte, mi ĉiam estas via amatino.

Maria".

- Kion signifas ĉi tiu letero, sinjoro Holms ? Ĉu vi kredas ke ĝi indikas memmortigon ?

- Ne, ne, tute ne, kaj ĝi eble estas la plej bona solvo. Mi kredas povi diri al vi, sinjoro Holdero, ke vi alvenas al la fino de viaj malfeliĉoj.

- Ha ! Vi kredas ? Kion vi sciiĝis, sinjoro Holms ? Ĉu vi scias kie estas la ŝtonoj ?

- Ĉu vi donus mil sterlingojn por ĉiu el ili ?

- Mi donus dekoble.

- Tio estus senutila. Tri mil sterlingoj sufiĉos. Estas ankaŭ malgranda rekompenco, mi kredas. Ĉu vi havas vian ĉekujon ? Jen plumo. Faru ĝin por kvar mil sterlingoj.

La bankiero, tute konsternita, subskribis la petitan ĉekon ! Holmsio iris al sia skribotablo kaj elprenis malgrandan orpecon triangule skulptitan, kun tri inkrustitaj ŝtonoj; li ĵetis ĝin sur la tablon.

Kun ĝoja krio, nia kliento ekprenis ĝin.

- Vi havas ĝin ! Li diris anhelante. Mi estas savata ! Mi estas savata !

La reago estis tiel fortega kiel la ĉagreno estis, kaj la kompatinda viro premis la retrovitajn ŝtonojn kontraŭ sia brusto.

- Vi havas alian ŝuldon, sinjoro Holdero, diris Ŝerloko Holmsio kun iom da graveco.

- Ŝuldo ! Li ekprenis la plumon. Diru la sumon, kaj mi pagos.

- Ne, ne al mi. Vi ŝuldas tre humilajn pardonpetojn al tiu nobla knabo, via filo, kiu kondukis kiel mi estus fiera vidi mian filon kondukita, se mi iam havus iun.

- Do ne estis Arturo kiu prenis la ŝtonojn ?

- Mi diris al vi hieraŭ, kaj mi ripetas al vi hodiaŭ, ke ne estas li.

- Ĉu vi certas ? Do ni tuj kuru sciigi al li ke la vero estas malkovrita.

- Li jam scias tion. Post esti klariginta ĉion, mi havis interparoladon kun li, kaj vidante ke li ne volis paroli, mi diris ĉion al li. Li devis konfesi al mi ke mi pravis kaj donis al mi la kelkajn detalojn kiuj ankoraŭ mankis al mi. Nun eble li konsentos paroli kun vi.

- Je la nomo de la Ĉielo, klarigu do al mi ĉi tiun eksterordinaran misteron !

- Tujtuj kaj mi eĉ rakontos al vi kiel mi alvenis al la vero. Sed lasu min unue diri al vi la plej penigan por vi kaj por mi. Estis interkonsento inter sinjoro Georgo Bonbruli kaj via nevino Maria. Ili forfuĝis kune.

- Mia Maria ? Neeblas !

- Bedaŭrinde tio estas pli ol ebla : tio certas. Nek vi, nek via filo konis la veran karakteron de ĉi tiu viro kiun vi akceptis en via intimeco. Li estas unu el la plej danĝeraj homoj de Anglio, iu ruiniĝinta ludanto, iu tute senespera mizerulo, iu homo sen koro sen konscienco. Via nevino ne sciis tian kia estas tiaj homoj. Kiam li flustris al ŝi amvortojn, la samajn kiujn li flustris al tiom da aliaj virinoj antaŭ ŝi, ŝi kredis esti sola sukcesanta tuŝi sian koron. Satano inspiris ĉi tiun malŝatindulon, fine la kompatindulino fariĝis ludilo inter liaj manoj; ŝi havis ĉiuvespere rendezvoujn kun li.

- Mi ne povas, mi ne volas kredi tion ! ekkriis la bankiero, kies vizaĝo fariĝis palega.

- Nu ! Mi ja diros al vi tion kio viahejme okazis dum la alia nokto. Via nevino, kiam ŝi kredis vin enirintan en vian ĉambron, dolĉe malsupreniris kaj iris babili kun sia amanto ĉe la fenestro kiu eliras sur la vojeton. La postsigno de liaj piedoj tute traboris la neĝon, tio kio pravas ke li restis tie tre longe. Ŝi parolis al li pri la diademo. Li, kies la malbelega pasio por oro vigliĝis per ĉi tiu novaĵo, submetis vian nevino al sia volo. Mi ne dubas ke ŝi amas vin, sed estas virinoj por kiu la amo de viro regas la aliajn korinklinojn, mi pensas ke ŝi devas esti el tuj ĉi. Ŝi apenaŭ finis aŭskulti siajn instrukciojn, ke ŝi vidis vin malsupreniri : ŝi rapide fermis la fenestron kaj rakontis al vi la eliron de unu el la ĉambristinoj kun sia amanto kun lignokruro, eliro kiu cetere estis vera.

Via filo Arturo iris enlitiĝi post sia konversacio kun vi,

sed li malbone dormis pro la problemo kiun kaŭzis al li siaj hazardludaj ŝuldoj. Meze de la nokto, li aŭdis malpezan paŝadon antaŭ sia pordo, li ellitiĝis, kaj rigardante en la koridoron, li estis tre mirigita vidi sian kuzinon atente paŝantan kaj enirantan en vian tualetejon. Ŝtonigita de miro, li surmetis veston kaj atendis en la ombro la sekvon de ĉi tiu stranga aventuro. Via nevino baldaŭ eliris el la koncerna ĉambro kaj en la lumeto de la koridora lampo, via filo vidis ŝin kunportantan la altvaloran diademon. Ŝi malsupreniris. Li, tremanta pro hororo, sekvis ŝin kaj, kaŝinta malantaŭ kurteno, vidis tion kio okazis en la vestiblo. Ŝi dolĉe malfermis la fenestron, transdonis la diademon al iu kiu sin kaŝis en la ombro, refermis kaj eniris ĉe si, frotetante vian filon, ankoraŭ kaŝinta malantaŭ sia kurteno.

Tiel longe dum ŝi estis tie, li povis nenion fari sen perdi la virinon kiun li amis. Sed tuj kiam ŝi malaperis, li komprenis kia terura malfeliĉo tio estis por vi, kaj kia graveco estis forŝovi ĝin. Li rapidis, tiel kiel li estis, nudpiede, al la fenestro, saltis en la neĝon kaj kuris en la vojeton kie li videtis ombron en la lunlumo. Sinjoro Georgo Bonbruli provis forfuĝi, sed Arturo atingis lin : okazis lukto inter ili, via filo tirante la diademon per iu flanko, kaj lia kontraŭulo per la alia. En la miksbatalo, li frapis sinjoron Georgoⁿ kaj vundis lin super la okulo. Io subite cedis, kaj via filo entenis la diademon inter la manojn, forkuris, fermis la fenestron kaj resupreniris viahejmen. Li ĵus rimarkis ke la diademo estis tordita dum la lukto kaj strebis reĝustigi ĝin kiam vi alvenis.

- Ĉu tio eblas ? murmuris la bankiero.

- Vi ekscitis lian koleron insultante lin ĉe la momento kiam li pensis ke li ĵus meritis viajn plej varmajn gratulojn. Li ne povis diri la veron sen perfidi iun kiu certe ne meritis

tiom da konsidero. Sed li elektis la plej grandaniman agmanieron, kaj konservis sian sekreton.

- Kaj estas pro tio ke ŝi eksplodis en larmoj kaj svenis vidante la diademon, ekkriis S^{ro} Holdero. Ho ! Dio mia ! Kia blinda frenezulo mi estis. Kaj li petis permeson eliri dum kvin minutoj ! La kara infano volis serĉi ĉu la rompita peco ne falis al la planko. Kiel mi false kaj kruele juĝis lin.

- Kiam mi alvenis hejmen, daŭrigis Holmsø, mi ĉirkaŭiris ĝin tre zorge por vidi ĉu kelka spuro en la neĝo povus lumigi min. Mi sciis ke ne falis neĝo ekde la antaŭtago, kaj ankaŭ ke forta frosto devis esti konservanta la piedsignojn. Laŭ la pado de la liverantoj, ĉio estis piedpremita kaj nereconebla. Iom pli for, tamen, preter la pordon de la kuirejo, virino restadis kaj babilis kun viro kiu unuflanke lasis spuron de lignokruro. Mi eĉ povis distingi ke ili estis ĝenitaj, ĉar la virino rapide kuris al la pordo, tio kion malkaŝis la piedsignoj; ili estis profundaj ĉe la pinto de la piedo, kaj apenaŭaj ĉe la kalkano. Lignokrurulo, li, atendis momenton antaŭ ol foriri. Mi pensis ke ĉi tiuj du individuoj povas esti la ĉambristino kaj la amanto pri kiu vi parolis al mi, kaj la enketo cetere pruvis tion. Mi trairis la ĝardenon sen trovi ion krom nur spurarojn hazarde strekitajn kaj kiuj devis deveni de la polico; sed en la vojeto alkondukanta al la staloj, longa kaj kompleksa historio estis skribita en la neĝo, antaŭ miaj okuloj.

...Estis duobla spurado de paŝadoj de piedvestita viro, kaj dua duobla spurado devenanta de viro kiun, je mia ĝojo, mi rekonis esti estanta nudpieda. Mi estis tuj konvinkata, laŭ tio kion vi diris al mi, ke ĉi tiu viro estis neniue alia ol via filo. La unua estis paŝinta ire kaj revene, sed la alia estis rapide kurinta, kaj liaj spuroj kelkfoje kovrantaj tiujn de la unua, estis evidente ke li sekvis lin. Mi inversiris laŭ tiu ĉi spuraron kaj ĝi alkondukis min al la fenestro de la vestiblo,

kie la viro kun botetoj fandigis la neĝon, pruvo ke li tie staris sufiĉe longe. Poste mi inversiris mian retrospuradon, ĝis ĉirkaŭ cent metroj sur la vojeto. Tie, la botetoj frontis la malamikon, la neĝo estis piedpremita kiel en lukto, kaj kelkaj gutoj da sango montris al mi ke mi ne eraris en miaj konjektoj. La viro kun la botetoj ankoraŭ kuris sur la vojeto, kaj novaj spuroj de sango montris ke estis li kiu estis vundita. Kiam mi alvenis al la ĉefvojon, la spuroj perdiĝis, la trotuaro estinta balaita.

...Enirante en la domon, mi ekzamenis, per lupeo, vi memoras tion, la breton kaj la lignotegaĵon de la vestibla fenestro. Mi sukcesis distingi la konturon de malseka piedo, eniranta. Mi ekde tiam povis fari al mi opinion pri tio kio okazis. Homo staris ĉe la fenestro, iu alportis al li la diademon; via filo aŭdis bruon kaj, vidinte tion kio okazis, postkuris la ŝteliston; li luktis kun li, ĉiu siaflanke tiranta la juvelon per siaj tutaj fortoj, tiel estas ke ili sukcesis rompi ĝin. Poste via filo revenis kun sia kapto, sed ne sen lasi rompaĵon inter la manoj de sia kontraŭulo. Ĝis tio, nenio pli klara. Restis scii kiu estis la viro, kaj kiu alportis al li la diademon ?

...Mi delonge havas kiel principon ke kiam vi forigis la neeblaĵon, tio kio restas, kiel ajn neprobabla tio estas, tamen estas la vero. Mi sciis ke ne estis vi kiu alportis la diademon eksteren, restis do nur via nevino kaj la servistoj. Sed se temus pri la servistoj, kial via filo lasus sin kulpigi anstataŭ ili ? Estis nenia kialo por tio. Dum estis en lia amo al lia kuzino, bonega kialo por konservi la sekreton, des pli ke ĉi tiu sekreto kuntiris malhonoron. Kiam mi rememoris ke vi vidis la junulinon ĉe la fenestro, kaj ke ŝi svenis revidante la diademon, mia konjekto fariĝis certeco.

...Kaj kiu povis esti lia komplico ? Iu amanto, kompreneble, la sola ullo kiu povus forgesigi al ŝi la

korinklinon kaj dankemon kiun ŝi ŝuldis al vi ? Mi sciis ke vi malmulte elhejmiĝas, kaj ke via rondo de amikoj estis tre malvasta. Sed inter ili estis sinjoro Georgo Bonbruli. Mi aŭdis paroli pri li kiel malbonfaman homon. La viro kun la botetoj povis nur esti li, la juveloj devis esti inter liaj manoj. Eĉ rekonita de Arturo, li povis kredi sin sekura ĉar neebliis ke via filo denuncu lin sen kompromiti sian propran familion.

...Nun vi facile divenas la rimedojn kiujn mi uzis. Mi iris en alivestaĵo de vagabondo al la domo de sinjoro Georgo, mi konatiĝis kun sia ĉambristo kiu sciigis min ke lia mastro sin vundis la kapon dum la antaŭa nokto, kaj fine, per la modesta sumo de ses ŝilingoj, mi akiris nerefuteblan pruvon ricevante paron da liaj malnovaj ŝuoj. Mi alportis ilin al Strithamo, kaj vidis ke ili ĝuste taŭgis al la piedsignoj kiujn mi malkovris en la neĝo.

- Mi vidis vagabondon kun malbela aspekto en la vojeto, hieraŭ posttagmeze.

- Precize. Estis mi. Estante trovanta mian viron, mi rehejmiris kaj ŝanĝis miajn vestojn. Sed la plej delikata ankoraŭ restis farenda; necesis neniu persekutoj por eviti skandalon, kaj mi sciis ke malŝatindulo tiel ruzoplena kiel sinjoro Georgo komprenus tion kio ligis al ni la manojn. Mi iris viziti lin. Unue, kompreneble, li neis ĉion. Poste, kiam mi diris al li laŭvice ĉion kiu okazis, li volis bruegi kaj ekprenis ponardon el panoplio. Sed mi konis mian viron, kaj mi metis al li pistolon sub la nazon antaŭ ol li povu moviĝi. Li tiam fariĝis iom pli prudenta. Mi diris al li ke ni bone pagos al li la ŝtonojn kiujn li posedis, po mil sterlingoj ĉiun. Ĉi tio eltiris de li la unuajn bedaŭrajn signojn kiujn li montris.

..."La tero min glutas, li diris, mi cedis la tri por sescent sterlingoj". Mi facile ricevis de li la adreson de la ŝtelaĵokaŝisto, promesante al li ke li ne estos persekutita.

Mi tujtuj iris tien, kaj post multaj marĉandadoj, mi akiris la ŝtonojn po mil sterlingoj ĉiun. Tiam mi iris vidi vian filon, diris al li ke ĉio estas en ordo, kaj fine mi revenis enlitiĝi je la dua matene, post tio kion mi povas nomi bonan labortagon.

- Tago kiu ŝparis al Anglio, dikan politikan skandalon, diris la bankiero stariĝante. Sinjoro, mi ne trovas vortojn por danki vin, sed vi ne traktis kun sendankulo. Via lerteco superis ĉion kion mi aŭdis diri pri vi. Kaj nun necesas ke mi kuru por peti al mia kara filo pardoni al mi la malbonojn kiujn mi faris kontraŭ li. Pri tio kion vi diris al mi pri la kompatinda Maria, tio tranĉas al mi la koron. Ĉu via tuta scienco ne kapablas sciigi al mi kie ŝi nun estas ?

- Mi kredas ke ni povas diri kun certeco ke ŝi estas tie kie troviĝas sinjoro Georgo Bonbruli. Certas ke, kiaj ajn estis ŝiaj kulpoj, ŝi baldaŭ ricevos pli ol sufiĉan punon.

La Purpuraj Fagoj.

- Pri la homo kiu ŝatas arton por arto, diras Ŝerloko Holms flanken ĵetante la *Ĉiutaga Telegrafo*, kies li ĵus legis la anoncojn, ofte estas en siaj malplej gravaj manifestadoj ke li trovas la plej grandan plezuron. Mi estas feliĉa konstati, Watsono, ke vi bonege komprenis ĉi tiun veron; kaj en ĉi tiuj raportoj pri niaj aventuroj kiujn vi havis la bonkorecon verki, mi eĉ devas diri plibeligi, vi donis tutsuperecon malpli al la famaj kaŭzoj kaj al la sensaciaj procesoj en kiuj mi miksiĝis, ol al tiuj oftaj okazaĵoj en si mem, sed faritaj por spertigi tiujn kapablecojn de dedukto kaj de logika sintezo pri kiuj mi faris specialan studon.

- Kaj tamen, mi respondis ridetante, mi ne kredas ke mi estu tute absolvita pri la krimo de sensaciismo kiun oni riproĉis al ĉi tiuj rakontoj.

- Via eraro, li diris, prenante ardan karbon per fajroprenilo por bruligi la longan pipon el merizujo, kiu ĝenerale anstataŭis tiun el tero kiam li estis en humoro plivole batalema ol meditema, via eraro estis esti provanta doni koloron kaj vivon al ĉiu el ĉi tiuj rakontoj, anstataŭ limigi vin konsekvence raporti tiun rigoran rezonadon kiu reale faras de ĝi la solan intereson.

- Ŝajnas al mi ke mi rekonis plenajn meritojn al vi pri ĉi tiu temo, mi respondis iom malvarme, ĉar mi estis ŝokita de la senco de personeco kiu okupis tiel vastan lokon en la aparta karaktero de mia amiko.

- Ne, ne estas egoismo aŭ memamo, li diris respondante laŭ sia kutimo al miaj pensoj plivole ol al miaj paroloj; se mi postulas plenan justecon al mia arto, estas ĉar ĝi estas senpersona afero, ekster mi mem. Krimoj estas oftaj,

logiko estas malofta. Estas do pri la logiko plivole ol pri la krimoj, kiun vi devas insisti. Vi malindigis al nivelo de simplaj rakontoj, tion kio devintus esti serio da prelegoj.

Estis dum malvarma printempa mateno, kaj ni sidis, post la matenmanĝo, ambaŭflanke de la kameno kie kraketis luma fajro. Densa nebulo envolvis la domojn kun malhelaj koloroj, kaj la kontraŭaj fenestroj videtitaj tra tiuj flavaj vaporoj, ŝajnis kiel nigrajn kaj senformajn makulojn. La gaso flamis en la ĉambro, ĝi lumigis la tablotukon, kaj briligis la porcelanaĵon kaj la arĝentaĵon, ĉar la manĝilaro ne ankoraŭ estis forigita. Ŝerloko Holms, silenta dum la tuta mateno, restis absorbita en legado de la anoncoj de tuta serio da gazetoj; estante finfine ĉesiganta sian esploradon, li sin translasis al sia sufiĉe tristema humoro, por admoni min pri miaj literaturaj eraroj.

- Aliflanke, li rekomencis post paŭzo dum kiu li vigle suĉis sian longan pipon kaj kontemplis la fajron, oni povas apenaŭ akuzi vin pri sensaciismo, ĉar inter ĉiuj ĉi kaŭzoj pri kiuj vi bonvolis zorgi, estas en ĝi bona porcio kie tute ne temas pri krimoj en la leĝa senco de la vorto. La eta afero en kiu mi provis esti utila al la reĝo de Bohemio, la aparta aventuro de fraŭlino Maria Suterlando, la problemo rilata al la viro kun la kuspita lipo, kaj la incidento de nia fraŭla aristokrato ne estis en la instanco de la leĝo. Sed por eviti la sensacion, mi timas ke vi alvenis ĝis tanĝi la banalecon.

- Mi koncedas tion al vi, koncerne la celon; mi tamen subtenas ke la maniero procedi estis aparte originala kaj interesa.

- Ba ! Kara amiko mia, ne gravas por la publiko, ĉi tiu publiko kiu ne kapablas observi ion, kiu ne kapablas rekoni teksiston per liaj dentoj, aŭ komponiston per lia maldekstra dikfingro, ne gravas por la publiko pri la delikataj nuancoj de la analizo kaj de la dedukto ! Sed fakte, se vi estas

senstila, mi ne povas mallaŭdi vin pro tio, ĉar la tempo de grandaj aferoj pasis. La homo, aŭ almenaŭ la krima ulo, perdis ĉian maltimecon kaj originalecon. Koncerne mian profesion, ĝi ŝajnas degeneri en agentejo por retrovi la perditajn kraĵojn, kaj doni konsilojn al junulinoj kiuj eliras el internulejo. Jen mi, mi kredas, alveninta ĉe la lasta grado. Ĉi tiu letero ricevita ĉimatenes ŝajnas esti la ekstrema limo de la senvalorigo, prefere legu !

Li ĵetis al mi ĉifitan leteron : ĝi venis de Montago-Palaco, ĝi estis datita de la antaŭtago. Jen tio kion ĝi enhavis :

"Kara sinjoro Holms,

*"Mi tre deziras konsulti vin rilate al situacio de
guvernistino kiu estas proponita al mi. Mi iros vidi vin
je la deka kaj duono morgaŭ, se tio ne ĝenas vin.
Sincere al vi.*

Violeta Oriono".

- Ĉu vi konas ĉi tiun junan ulinon ? mi demandis.
- Tute ne.
- Estas la deka kaj duono.
- Jes, kaj certe estas ŝi kiu ĵus sonorigis.
- Eble tio estos pli interesa ol vi pensas. Memoru la aferon de la blua grenato kiu, de simpla fajrero, kondukis vin al serioza esplorado. Eble estos same ĉi-foje.

- Ni esperu tion ! Sed niaj duboj baldaŭ estos kvietigataj, ĉar jen, mi kredas, estas la koncerna persono.

Efektive la pordo malfermiĝis ĉe ĉi tiu momento, donante trapason al junulino. Ŝi estis simple sed taŭge vestita; ŝia gaja, vigla vizaĝo estis kovrita de lentugoj kiel ovo de pluvio, kaj ŝiaj facilmovaj irmanieroj vidigis virinon kutimiĝintan tutsole elturni sin.

- Mi esperas ke vi senkulpigos min ĝeni vin, ŝi diris al mia amiko kiu leviĝis por ricevi ŝin; sed okazas al mi stranga aventuro al mi, kaj havante nek parencojn nek amikojn por

konsulti, mi pensis ke vi eble estus sufiĉe bona por doni al mi konsilon.

- Sidigu vin, mi petegas, fraŭlino Oriono. Mi estos tro feliĉa esti utila al vi.

Mi vidis ke Holmso estis favore impresita de la manieroj kaj lingvaĵo de sia nova kliento. Li rigardis ŝin per sia explorema okulo, poste sidiĝis por aŭskulti ŝin, kun la palpebroj mallevitaj, la fingroj kunigitaj.

- Mi estis guvernistino dum kvin jaroj, ŝi diras, en la familio de kolonelo Spenco Munro, sed antaŭ du monatoj la kolonelo estis sendita al [Halifakso](#), [Nov-Skotio](#), kaj ĉar li kunprenis siajn infanojn kun li en Ameriko, mi troviĝis sen situacio. Mi metis anoncojn en la gazetoj, respondis al tiuj kiuj povis taŭgi al mi, sed sen iu ajn sukceso, tiel bone ke miaj malfortaj vivrimedoj komencante elĉerpiĝi mi reale ne plu sciis kio fariĝi.

...Estas en la For-okcidento agentejo kun la nomo de Ulongvojo, kiu havas la fakon dungigi guvernistinojn; mi iris tien ĉiusemajne kun la espero trovi tie situacion.

...Ulongvojo estas la nomo de la fondinto de la stablo, sed la direktorino estas fraŭlino Stopero. Ŝi sidas en sia malgranda oficejo, la sinjorinoj kiuj serĉas oficon atendas en antaŭĉambro kaj estas aparte akceptitaj de ŝi. La fraŭlino konsultas siajn registrojn en la ĉeesto de ĉiu klientino por vidi ĉu ŝi havas situacion povantan taŭgi al ŝi.

...Kiam mi iris al ĉi tiu agentejo la pasintan semajnon, mi miavice eniris, kiel kutime, kaj miris vidi ke fraŭlino Stopero ne estis sola. Eksterordinare dika viro kun tre plaĉa vizaĝo kaj dika mentono kiu etendiĝis per faldoj ĝis sur lia kolo, sidis apud ŝi, kun okulvitroj sur la nazo, tre atente rigardanta la sinjorinojn kiuj eniris. Ĉe mia alveno, li saltis en sia seĝo, kaj alparolante al fraŭlino Stopero :

..."Jen la afero, li diris; mi nenion povus peti pli bonan.

Perfekte ! Perfekte !" Li ŝajnis tute entuziasma kaj frotis al si la manojn kun kontentega mieno. Li aspektis tiel feliĉa ke plaĉis rigardi lin.

...- Ĉu vi serĉas situacion, fraŭlino ? li demandis al mi.

...- Jes, sinjoro.

...- Kiel guvernistino ?

...- Jes, sinjoro.

...- Kaj kian salajron vi petas ?

...- Ĉe la kolonelo Spenco Munro de kie mi eliris, mi havis po cent frankoj monate.

...- Ho, ne, ne ! Ĝi estas ekspluato, pura ekspluatado ! li ekkriis, levante la manojn, kiel indignigita homo, kiel oni povas doni tian hontindan monsumon al tiel ĉarma kaj tiel perfekta sinjorino ?

...- Mia scio, sinjoro, eble estas pli malgranda ol vi imagas ĝin, mi diris : iom da franca, iom da germana, muziko, desegno...

...- Ne, ne, li ekkriis, tio tute ne estas la demando. Temas scii ĉu, per viaj teniĝoj, vi vere estas sinjorino. Jen ĉio. Se ne, vi ne povas zorgi pri la edukado de infano kiu kapablos dum kelka tago, ludi konsiderindan rolon en la historio de sia lando. Se jes, kiel ĝentlemano sukcesis akceptigi al vi tian aĉan monsumon ? Viaj laborpagoj ĉe mi, sinjorino, komence estos po du mil kvincent frankoj jare.

...Vi bone pensas, sinjoro Holms, ke en la situacio en kiu mi troviĝis, tia propono ŝajnis al mi nekredbla. La sinjoro eble rimarkinta mian mienon de nekredemo, malfermis monpaperujon kaj elprenis bankbiletan.

...- Ankaŭ estas mia kutimo, li diris ridetante kun la plej amika mieno, tiel bone ke liaj okuloj malaperis meze de la faldoj de lia dika vizaĝo, estas mia kutimo antaŭpagi al la guvernistinoj la duonon de iliaj salajroj por kovri la malgrandajn elspezojn de vojaĝo kaj de vestaro.

...Mi neniam renkontis tiel afablan kaj antaŭzorgeman homon. Ĉar mi jam ŝuldis monon al miaj vendistoj, ĉi tiu antaŭpago estis providenca; tamen mi sentis min en malfido kaj ne kuraĝis devontigi min sen esti pli bone informita.

...- Ĉu mi povas demandi al vi kie vi loĝas, sinjoro ? mi diris al li.

...- Ĉe la Purpuraj Fagoj, en Hampŝiro, je kvin mejloj de Vinĉestero. Ĝi estas tre agrabla lando, kara fraŭlino, kaj la domo havas antikvan karakteron kiu donas al ĝi grandan ĉarmon.

...- Kaj miaj funkcioj, sinjoro ? Mi ŝatus koni ilin.

...- Infano, ĉarma eta sesjara elfo. Ho ! Se vi vidus lin mortigi blatojn per pantoflo ! Paf ! Paf ! Paf ! Jen tri el ili detruitaj en palpebruma daŭro !

...Li apogis sin malantaŭen sur sia seĝo kaj ekridis tiamaniere ke liaj okuloj denove malaperis.

...Mi estis iom surprizata de la ludojn de tiu infano, sed la ridado de la patro kredigis al mi ke li ŝercis.

...- Mi do ne havos aliajn funkciojn, mi diris, ol zorgi nur pri ununura infano !

...- Ne, ili ne estos la solaj, mia kara infano, li ekkriis. Vi devos, laŭ konveneco, obei al la instrukciojn kiujn mia edzino povos doni al vi, kondiĉe tamen ke ili estu el tiuj kiujn sinjorino povu plenumi sen malrespekti la dececojn. Vi vidas nenian kontraŭdiron, mi pensas ?

...- Mi estos feliĉa min utile okupi.

...- Tio estas. Ni nun parolu pri la vestaro. En ĉi tiu ĉapitro ekzemple, ni estas iom postulemaj, nu, postulemaj sed bonaj. Se ni petus al vi surmeti senmeritan robon donitan de ni, vi ne kontraŭstarus nian etan fantazion, ĉu ne ?

...- Ne, mi diris, tre surprizita.

...- Se oni petus al vi sidigi vin ĉi tie, aŭ tie, ĉu tio ne

ofendus vin ?

...- Ho ! ne.

...- Aŭ tondi viajn harojn antaŭ ol veni hejmen ?

...Mi apenaŭ povis kredi miajn orelojn. Kiel vi vidas, sinjoro Holmso, miaj haroj estas abundaj, kaj kun kaŝtankolora tono sufiĉe speciala. Oni diris ĉirkaŭ mi ke ili havis la nuancon deziregatan de la artistoj. Mi ne povis akcepti la ideon tiel foroferi ilin.

...- Mi timas ke tio ĉi tute ne eblas, mi diris. Li atente rigardis min per siaj malgrandaj okuloj, kaj sekve de mia nea respondo, mi vidis ombron pasi sur liajn trajtojn.

...- Bedaŭrinde tio tute nepras, li diris. Ĝi estas ideo de mia edzino kaj la ideoj de virinoj, sinjorino, devas esti respektataj. Tiam ĉu vi ne volas tondi viajn harojn ?

...- Ne, sinjoro, reale, mi ne povas, mi firme respondis.

...- Ha ! Bonege, tio decidus la demandon. Estas domaĝe, ĉar laŭ la aliaj rilatoj vi perfekte taŭgis al mi. Ĉi-tiukaze, fraŭlino Stopero, mi dezirus ankoraŭ vidi kelkajn el viaj junaj klientoj.

...La direktorino restis dum la tuta tempo droninta en siaj paperoj, sen diri unu solan vorton, sed ŝi rigardis min kun tiel elrevigita mieno ke mi ekkomprenis ke ŝi perdas pro mia malakcepto bonan gratifikon.

...- Ĉu vi deziras ke via nomo restu en niaj libroj ? ŝi demandis al mi.

...- Bonvolu, fraŭlino Stopero.

...- Finfine, tio ŝajnas al mi sufiĉe senutila, ĉar vi tiel rifuzas la plej avantaĝajn proponojn, ŝi amare diris. Vi apenaŭ povas atendi tion ke ni faru novajn klopodojn por retrovi al vi okazon kiel ĉi tiun. Adiaŭ, fraŭlino Oriono.

...Ŝi frapis la tintinilon, kaj la grumo rekondukis min ĉe la pordon.

...- Mi devas konfesi al vi, sinjoro Holmso, ke

hejmenirante, kie mi trovis miajn ŝrankojn malplenaj kaj du aŭ tri fakturojn sur la tablo, mi komencis bedaŭri mian decidon. Finfine, se ĉi tiuj homoj havas strangajn ideojn, kaj petis mian konsenton por eksterordinaraj aferoj, ili abunde monkompensis min de tio. Tre malmultaj guvernistinoj, en Anglio, gajnas du mil kvincent frankojn jare. Cetere, por kio servas miaj haroj ?

...Estas virinoj ĉe kiuj mallongaj haroj bone taŭgas; mi eble estas inter ili. La morgaŭon mi komencis opinii ke mi faris stultaĵon, kaj la sekvantan tagon mi estis konvinkita pri tio. Mi baldaŭ decidiĝis formeti mian fierecon kaj reiri al la agentejo por vidi ĉu la situacio ankoraŭ vakis, kiam mi ricevis ĉi tiun leteron de la sinjoro mem. Mi tuj legos ĝin al vi :

"La Purpuraj Fagoj, apud Vinĉestero.

"Kara fraŭlino Oriono,

"Fraŭlino Stopero bonvolis doni al mi vian adreson, kaj mi venas demandi al vi ĉu vi ne ŝanĝis vian decidon. Mia edzino vigle deziras ke vi venu ĉe ni, ĉar ŝi estis tre favore impresita de la priskribon kiun mi faris al ŝi pri vi. Ni estas pretaj doni al vi po sepcent kvindek frankoj kvaronjare, tio estas po tri mil frankoj jare, por kompensi al vi la embarason kiun povus kaŭzi al vi niaj kapricoj. Ili ne estas tre teruraj, finfine. Mia edzino ŝatas ian nuancon de elektra bluo, kaj ŝatus ke vi surmetu, dummatene en la domo, robon kun tiu koloro. Vi tamen ne bezonas aĉeti ĝin al vi, ĉar ni havas unu apartenantan al mia filino Alico (kiu nun estas en Filadelfio) kaj kiu taŭgas al vi, mi kredas, tre bone. Koncerne sidigi vin ĉi tie aŭ tie, distri vin laŭ la maniero kiu estos sciigita al vi, tio vere neniel povas ĝeni vin. Pri viaj haroj, certe estas granda domaĝo, ĉar mi ne sukcesis retenigi min dum nia mallonga interparolado, admiri ilin, sed mi devas insisti pri ĉi tiu punkto, kaj mi

esperas, ke ĉi tiu salajra plialtiĝo kompensos al vi ĉi tiun foroferon. Viaj funkcioj kun la infano estos facilaj. Mi esperas ke vi venos, mi iros serĉi vin per kariolo en Vinĉestero. Nur sciigu al mi la trajnon per kiu vi veturos.

"Sincere al vi.

Jefro Rukastelo."

...- Jen la letero kiun mi ĵus ricevis, sinjoro Holmso, kaj mi estas decidita akcepti. Mi tamen kredis devi submeti la aferon al via ekzameno antaŭ ol akcepti definitivan dungigon.

- Sed, fraŭlino Oriono, se vi estas decidita, tio solvas la demandon.

- Ĉu vi opinius rifuzi ?

- Mi konfesas ke tio ne estas precize la situacio kiun mi elektus por mia fratino, ekzemple.

- Kion ĉio ĉi povas signifi, sinjoro Holmso ?

- Ha ! Mi havas nenian ideon pri tio. Mi nenion scias. Kaj vi mem ĉu vi havas opinion ?

- Mi vidas nur unu kredeblan klarigon. S^{ro} Rukastelo ŝajnas esti afabla viro, dotita de bona koro. Sed lia edzino eble estas freneza, kaj tiam li strebas submeti sin al ĉiuj ŝiaj kapricoj por malhelpi krizojn kaj por malebligi ke oni enfermas ŝin en frenezulejo.

- Tio eblas kaj mi eĉ diros probablas. Sed ĉiuokaze, tio ne aŭguras tre agrablan hejmon por junulino.

- Kaj pri la laborpago, sinjoro Holmso ?

- Nu ! Jes, tio estas tenta, mi konfesas tion, eĉ tro tenta. Jen tio kio maltrankviligas min. Kial ili proponas al vi tri mil frankojn jare, kiam ili havus pli da gubernistinoj ol ili volus por mil frankoj ? Estas io sub tio.

- Mi pensis ke informante vin hodiaŭ pri ĉio ĉi, vi jam scius, se mi bezonus vin pli poste. Mi sentos min pli forta,

se mi estas subtenata de vi.

- Ho ! Vi povas kalkuli kun mi. Pasis multaj monatoj de kiam mi ne renkontis tiel interesan problemon; ĉiuj ĉi detaloj estas strangaj. En kazo de dubo, aŭ de danĝero...

- Danĝero ! Kian danĝeron vi antaŭvidas ?

Holmso grave skuis la kapon.

- Ne estus danĝero se ni kapablus difini ĝin. Sed je ajna horo de la tago aŭ de la nokto kiam telegramo de vi alvenas al mi, mi iras al via helpo.

- Tio sufiĉas por mi.

Ŝi vigle stariĝis, ĉiu spuro de malkvieteco malaperis el ŝia vizaĝo.

- Mi iros en la Hampŝiroⁿ sen ia ajn timeto. Mi tuj skribas al S^{ro} Rukastelo, mi foroferas miajn kompatindajn harojn ĉi-vespere, kaj mi morgaŭ foriros al Vinĉestero.

Post esti denove adresanta kelkajn dankojn al Holmso, ŝi adiaŭis nin, kaj eliris per malpeza paŝado.

- Almenaŭ, mi diris aŭdante ŝin malsupreniri la ŝtuparon, ŝi ŝajnas al mi tre kapabla konduti tutsole.

- Kaj des pli bone por ŝi, diris Holmso penseme. Mi estus tre surprizita se ni ne aŭdus paroli pri ŝi post nelonge.

La profetaĵo de mia amiko ne estis longedaŭra por sin realigi. Dekkvino da tagoj pasis kaj dum tiu tempo mi min surprizis pli ol unu fojon pensi pri ĉi tiu virino kaj pri la malfacilaĵoj kontraŭ kiuj ŝi devis eble lukti sole. La eksterordinaraj salajroj kiujn oni donis al ŝi, la tiel strangaj kondiĉoj kiujn oni faris al ŝi, ĉiuj indikis nenormalajn cirkonstancojn; sed estis neeble al mi malimpliki ĉu temis pri manio aŭ komploto, kaj ĉu la viro estis filantropo aŭ kanajlo. Koncerne Holmsoⁿ, li restis silenta dum tutaj horoj, kun kuntiritaj brovoj, enpena mieno; rifuzante respondi al mi se mi malbonŝance pritraktus la temon kiu interesis min.

- Informojn ! Mi petas informojn ! li senpacience ekkriis; mi ne kapablas konstrui sen fundamentoj. Kaj li ĉiam finis asertante ke li neniam permesintus al fratino akcepti tian situacion.

La telegramo kiun ni atendis, alvenis al ni dum vespero, ĉe la momento kiam mi iris enlitiĝi kaj kiam Holmsø pretiĝis labori dum la tuta nokto por solvi sciencan problemon : li kutimis tion fari. Mi ofte lasis lin vespere kliniĝanta super retorto, kun provtubo enmane kaj mi retrovis lin en la sama pozicio la morgaŭon matene venante matenmanĝi. Li disŝiris la flavan koverton, tralegis la mesaĝon kaj ĵetis ĝin al mi.

- Rigardu do la horojn por la trajnoj en la tabelaro, li diris kaj li daŭrigis sian kemian eksperimenton.

La alvoko estis mallonga kaj urĝa.

Bonvolu troviĝi ĉe la hotelo de la Nigra Cigno, en Vinĉestero, morgaŭ tagmeze. Mi petegas vin veni ! Mi perdas la kapon.

Oriono."

- Ĉu vi volas veni kun mi ? demandis al mi Holmsø.

- Mi ne petas pli bone.

- Do konsultu la tabelaron.

- Estas trajno je la naŭa kaj duono, kiu alvenas al Vinĉestero je la dekunua kaj tridek.

- Tio ĝuste faros nian aferon. Pli bone valoras prokrasti mian analizon pri acetono ĉar ni bezonos esti freŝa kaj sana morgaŭ matene.

Je la dekunua, la morgaŭon, ni alproksimiĝis al la malnova angla urbo. Holmsø komence absorbiĝis en la legado de la matenaj ĵurnaloj, sed kiam ni eniris en Hampŝiroⁿ, li ĵetis ilin kaj ekadmiris la pejzaĝon. Estis ideala printempa tago: ĉielo el delikata bluo, punktita de blankaj flokaj nubetoj kiuj drivis de okcidento al oriento. La suno gaje brilis, sed estis en la aero iomete da malvarmeteco kiu pinĉis kaj

ĝenis. Tra la tuta lando, ĝis la rondigitaj montetoj en la ĉirkaŭaĵo de Alderŝoto, la malgrandaj ruĝaj kaj grizaj tegmentoj de la farmodomaj konstruaĵoj aperis el la pala verdaĵo, apenaŭ komenciĝanta.

- Ĉu tio estas sufiĉe freŝa kaj rava ? mi ekkriis, kun la tuta entuziasmo de homo eskapanta el la nebuloj de la strato Bakisto.

Sed Holmso grave skuis la kapon.

- Vi vidas, Watsono, estas unu el la malfeliĉoj de cerbo strukturita kiel la mia, ne sukcesi rigardi ion sen ligi ĝin al mia fako. Vi vidas ĉi tiujn disajn domojn kaj vi estas impresata de iliaj pitoreskecoj. Mi ja rigardas ilin, kaj la sola penso kiu venas al mi, estas tiu de ilia izoleco kaj de la senpuneco dank'al kiu krimoj povas esti faritaj.

- Granda Dio ! mi ekkriis. Kiu povas paroli pri krimo en ĉi tiuj malnovaj loĝejoj kiuj eligas nedifineblan ĉarmon.

- Ili ĉiam plenigas min per certa timego. Estas mia konvikto, Watsono, kaj ĝi baziĝas sur la sperto, ke la plej nigraj kaj la plej senvaloraj kaŝanguloj de Londono ne havas pli da pekoj sur la konscienco ol la plej ĉarma kaj la plej bela kamparo.

- Vi timigas min !

- Kaj la kialo estas evidenta. La premo de publika opinio povas fari en la urboj tion kion la leĝo sola estas senpotenca akiri. Ne estas vojeto, tiom ajn ĝi estas perdita, kie la kriadado de turmentita infano, la bruado de batoj donataj de ebriulo, ekscitas nenium simpatian kaj indignon ĉe la najbaroj; en palpebruma daŭro, justeco kun sia tuta organaro staras, sufiĉas unu signo por movigi ĝin kaj konduki la krimulon sur la benkon de la akuzitoj. Sed vidu ĉi tiujn izolitajn domojn en sia kampo, loĝataj de malriĉuloj, kiuj scias nenion pri la leĝo. Pensu pri la agoj de terura krueleco, pri kaŝitaj krimoj kiuj povas malrapide plenumiĝi

en ili, sen ke iu sciu ion. Se ĉi tiu junulino kiu vokas nin je helpo, loĝus en Vinĉestero, mi neniam timus ion ajn pri ŝi. Estas tiuj kvin mejloj en la kamparo kiuj maltrankviligas min. Tamen estas certa ke ŝi ne estas persone minacata.

- Ne. Se ŝi venas renkonte al ni ĉe Vinĉestero, estas ke ŝi povas se necese eskapi.

- Estas evidente. Ŝi estas libera.

- Kio do estas ĉi tiu mistero ? Ĉu vi havas donitaĵon ?

- Mi trovis sep malsamajn solvojn, ĉiu povanta adaptiĝi al la faktoj kiujn ni konas. Sed mi povos nur esti certa post novaj informoj. Jen la turo de la katedralo, kaj ni baldaŭ scios tion kion fraŭlino Oriono volas de ni.

La "Nigra Cigno" estas fama hotelo situita en la strato Alta, tute proksime de la stacidomo; ni trovis tie la junulinon kiu atendis nin. Ŝi rezervigis privatan salonon kaj servigis matenmanĝon.

- Mi estas tiel feliĉa ke vi estas venintaj, ŝi ekkriis; tio estas tiel afabla de vi. Mi vere ne scias kiun decidon elekti. Viaj konsiloj estos karegaj por mi.

- Diru al ni unue tion kio okazis al vi.

- Estas per tio kiun mi komencos kaj necesas ke mi estu mallonge, ĉar mi promesis al S^{ro} Rukastelo esti reveninta antaŭ la tria. Li permesis al mi veni en la urbon ĉi-matene, sed li ne vere suspektas pri tio kio alkondukis min ĉi tie.

- Ni procedu laŭorde kaj komencu vian rakonton.

Holmso etendis siajn longajn krurojn antaŭ la fajron, kaj komforte sidiĝis por aŭskulti.

- Mi unue devas konfesi ke mi ne estis mistraktita de S^{ro} kaj S^{ino} Rukastelo. Estas meritoj kiujn mi rekonas al ili. Sed mi ne kapablas kompreni ilin, kaj ilia konduto maltrankviligas min.

- Kion vi ne kapablas kompreni ?

- La kialoj de ilia agmaniero. Jen la faktoj tiel kiel ili

okazis. Kiam mi alvenis ĉi tie, S^{ro} Rukastelo atendis min ĉe la stacidomo kaj li alkondukis min per kariolo al Purpuraj Fagoj. Estas, kiel li diris al mi, domo tre bone situata, sed sen ia ajn stilo. Imagu grandan kvadratan konstruaĵon, kalkitan, makulitan de loko al loko de larĝaj verdaj platoj pro la humideco. En la ĉirkaŭaĵo, ĉe tri flankoj, arbaroj, kaj ĉe la kvara herbejo kiu malsupreniras al la ĉefa vojo de Sudemptono, vojo kiu troviĝas ĉirkaŭ cent metrojn de la enira pordo. La herbejo estas proprietaĵo de S^{ro} Rukastelo, sed la tuta restaĵo estas parto de la bieno de lordo Saŭtertono. Bosketo de purpuraj faboj, ĝuste antaŭ la pordo, donis sian nomon al ĉi tiu loko.

...S^{ro} Rukastelo, kiu sin montris tre afabla, alvenante prezentis min al siaj edzino kaj infano. Ni eraris, sinjoro Holmsio, pensante ke S^{ino} Rukastelo eble freneziĝis. Ŝi estas pala, silenta virino, multe pli juna ol ŝia edzo, ĉar ŝi ne estas pli ol tridekjara, kaj li apenaŭ povas esti malpli ol kvardekkvinjara. Mi kredis kompreni ke ili estis edziniĝintaj ekde ĉirkaŭ sep jaroj, ke S^{ro} Rukastelo edzinigis ŝin estanta vidvo kaj ke la sola infano kiun li havis de sia unua edzino, estas ĉi tiu knabino kiu iris al Filadelfio. S^{ro} Rukastelo sekrete konfidis al mi ke la kialo de la foriro de lia filino estis la troa malinklino kiun ŝi havis al sia bopatrino, kies juneco evidente malfaciligis la situacion de S^{ino} Rukastelo en la domo de ŝia patro.

...S^{ino} Rukastelo ŝajnis al mi senkolora kaj morale kaj fizike. Ŝi faris al mi nenian impreson, nek bonan nek malbonan. Ŝi estas estulino sen karaktero. Oni vidas ke ŝi estas pasie alliginta al sia edzo kaj sia knabeto. Ŝiaj hele grizaj okuloj senĉese iras de unu al la alia, por vidi tion kion ili povas bezoni, kaj laŭeble konjekti ĝin. Li, kvankam kruda kaj bruema, estas bona por ŝi laŭ sia maniero; unuvorte ili ŝajnas esti bonaj geedzoj. Kaj tamen, ĉi tiu virino havas

sekretan aflikton. Ŝi kelkfoje ŝajnas absorbita, kaj ŝia vizaĝo esprimas suferon. Pli ol unu fojon, mi surprizis ŝin larmoplenan. Mi kelkfoje kredis ke estis la inklinoj de ŝia filo kiu malĝojigis ŝin, ĉar mi neniam vidis estulon pli dorlotitan, nek dotitan de pli malbonaj instinktoj. Ĉi tiu infano estas malgranda laŭ sia aĝo, sed li havas dikegan kapon kaj tute misproportcian. Lia vivo pasas alterne de atako de kolerego kaj malĝoja paŭtado. Li havas nur unu plezuron : tiun de turmenti la estulojn pli malfortaj ol li, kaj li havas rimarkindan talenton por kapti musojn, birdojn kaj insektojn. Sed mi pli ŝatas, sinjoro Holms, ne paroli pri tio kio cetere estas nur malmulte miksitaj kun mia historio.

- Necesas al mi ĉiuj detaloj, ĉu ili ŝajnas utilaj al vi aŭ ne.

- Mi provos ne preterlasi ion gravan. Unu el la malagrablaĵoj de ĉi tiu domo, kaj la unua kiu mirigis min, estas la malbona maniero kiun havas la geservistoj. Estas nur du, geedzoj. Toller - estas la nomo de la viro - estas needukita, malĝentila individuo, kun haroj kaj vangharoj griziĝantaj; li ĉiam odoras la drinkaĵon. Dufoje, de kiam mi estis tie, mi vidis lin tute ebria kaj S^{ro} Rukastelo ne ŝajnis rimarki tion. Lia edzino estas tre granda kaj tre forta kun severaspekta vizaĝo, ŝi estas tiel silenta kiel S^{ino} Rukastelo, sed multe malpli afabla. Ili estas paro el la plej malplaĉaj, kiu cetere malmulte ĝenas min, ĉar mi pasigas preskaŭ mian tutan tempon en la infanvartejo kaj en mia ĉambro, du apudaj ĉambroj kiuj situas en unu el la anguloj de la loĝejo.

...Dum la du unuaj tagoj kiuj sekvis mian alvenon al la purpuraj faboj, mia vivo estis tre trankvila; la trian tagon, S^{ino} Rukastelo malsuprenvenis post la tagmanĝo kaj subdiris kelkajn vortojn al la orelon de sia edzo.

...- Ho ! Jes, li diris turnante sin al mi, ni estas tre dankemaj al vi, fraŭlino Oriono, pro tio ke vi forferis viajn harojn al nia fantazio. Mi certigas vin ke tio tre bone

taŭgas. Ni nun vidos kiel sidas al vi la elektre bluan robon. Vi trovos ĝin sur via lito, kaj se vi bonvolus provi ĝin, ni estus tre feliĉaj.

...La kostumo kiun mi trovis pretigita por mi, en mia ĉambro, estis el tute aparta bluo. La ŝtofo, ia serĝo, estis el bela kvalito, sed certe jam servis. La ensemblo mirinde vestis min kaj ŝajnis farita laŭmezure. S^{ro} kaj S^{ino} Rukastelo montris sian ĝojon per tute troa maniero. Ili atendis min en la salono, tre granda ĉambro eliranta al la fasado per tri fenestropordoj.

...Iu seĝo estis metita proksime al la meza fenestro, kun la dorsapogilo direktita al ekstero. Oni petis al mi sidigi min sur ĝi, kaj S^{ro} Rukastelo, paŝante tien kaj reen ĉe la alia flanko de la ĉambro, komencis rakonti al mi la plej neverŝajnajn rakontojn. Vi ne povas imagi kiom li estis stranga kaj amuza, mi senbride ekridegis. S^{ino} Rukastelo, kiu evidente ne komprenas ŝercon, ne ridetis dum momento, sed restis sidanta, la manoj etenditaj sur la genuoj, kun malserena mieno. Post ĉirkaŭ unu horo, S^{ro} Rukastelo subite rimarkigis ke tempis por eklabori, kaj ke mi povis senvestiĝi por iri rekuniĝi kun la eta Eduardo en la infanvartejon.

...Du tagojn poste, la sama ceremonio rekomenciĝis, ekzakte en la samaj kondiĉoj. Mi denove vestis min, sidiĝis apud la fenestro kaj ridis tiom kiom la unuan fojon pro la amuzaj rakontoj eltiritaj el la neelĉerpebla repertuaro de mia gastiganto, kiu majstris en ilia rakontado. Poste li donis al mi romanon kun flava kovrilo, kaj iom turnante mian seĝon por ke mia ombro ne falu sur la paĝon, li petis al mi laŭte legi ĝin al li. Mi legis dum ĉirkaŭ dek minutoj, hazarde elektitan paĝon; poste S^{ro} Rukastelo interrompis min plenmeze de frazo kaj ordonis min iri ŝanĝi kostumon.

...Vi facile povas imagi, sinjoro Holmsø, kiom ĉi tiu eksterordinara ceremonio ekscitis mian scivolemon. Ili ĉiam

zorgis, mi rimarkis, turnigi al mi la dorson al la fenestro, tiel ke mi estis baldaŭ sopirema pro deziro vidi tion kio okazas malantaŭ mi. Unuavide tio ŝajnis neebbla, sed mi baldaŭ trovis rimedon. Mia manspegulo rompiĝis, tio kio donis al mi la feliĉan ideon kaŝi pecon de ĝi en mia nadtuko. La sekvan fojon, meze de miaj ridadoj, mi direktis mian nadtukon al miaj okuloj, kaj povis tiel vidi tion kio estis malantaŭ mi. Mi konfesas ke mi seniluziiĝis. Estis nenio, absolute nenio.

...Almenaŭ, tio estis mia unua impresio. Sed denove rigardante, mi ekvidis sur la vojo al Sudemptono, multe trapasata vojo, iu malgrandan viron grize vestitan, havantan plenbarbon, kaj kiu sin apoganta sur la barilo ŝajnis fikse rigardi al mia flanko. Mi mallevis mian nadtukon, kaj miaj okuloj renkontis tiujn de S^{ino} Rukastelo. Ŝi nenion diris, sed mi estas konvinkita ke ŝi divenis mian ruzaĵon. Ŝi tuj stariĝis.

...- Jefro, ŝi diris, estas senhontulo sur la vojo, kiu ne ĉesas rigardi fraŭlinon Oriono".

...- Ĉu li ne estas unu el viaj amikoj, fraŭlino Oriono, li demandis al mi ?

...- Ne; mi konas neniun ĉiflanke.

...- Ĉu vere ? Kia malĝentileco ! Turnu vin, kaj signu al li foriri, bonvolu ?

...- Ŝajnas al mi, ke estus multe pli bone ne ŝajni atentigi al li !

...- Ne, ne, ni ĉiam vidus lin spionvagi tie. Turnu do vin kaj tiel signu al li.

...Mi faris kiel li diris al mi, kaj tuj S^{ino} Rukastelo mallevis la rulkurtenon. Estis pasinta semajno, kaj de tiam mi ne plu sidiĝis ĉe la fenestro, mi ne plu surmetis la bluan robon, kaj mi ne plu vidis la viron sur la vojo.

- Daŭrigu, mi petegas vin, diris Holmso, via rakonto

esperigas esti el la plej interesaj.

- Vi baldaŭ, mi timas, trovos ĝin iom senkohera, kaj ne estos ĉiam multe da rilatoj inter la diversaj incidentoj, kiujn mi volas rilati al vi. En la tago mem de mia alveno ĉe la purpuraj fagoj, S^{ro} Rukastelo kondukis min en malgrandan loĝejo apud la pordo de la kuirejo. Alproksimiĝante, mi aŭdis la bruon de ĉeno kaj de dika moviĝanta besto.

...- Rigardu tien, diris al mi S^{ro} Rukastelo, montrante al mi fendon inter du tabuloj. Ĉu ne ke ĝi estas bela ?

...Mi rigardis kaj unue ekvidis du brilajn okulojn, poste formon kiun mallumo tre konfuzis.

...- Ne timu, li diris al mi ridante pro la tremeto kiu trairis laŭ miaj membroj. Ĝi estas nur Karlo, mia laniario. Mi diras "mia", sed la maljuna Tollero estas la sola persono kiu kapablas supervenki ĝin. Oni nutras ĝin unufoje tage, kaj ankoraŭ ne tro multe, tiamaniere ke ĝi ĉiam estas malbona kiel skabio. Tollero liberlasas ĝin ĉiunokte, kaj Dio kompatu al ŝtelisto kiu ĝi trafus per la dentoj. Pro la ĉielamo, nenial metu piedon eksteren dumnokte, ĉar tio estus riski vian vivon.

...La konsilo ne estis senvalora. Du tagojn poste, mi rigardis tra la fenestro de mia dormĉambro je la dua matene. Estis bela lunlumo, kiu donis al la gazono antaŭ la domo arĝentan rebrilon kaj lumigis ĝin preskaŭ kiel en plena taglumo. Mi restis tie, ensorĉata de la kvieta beleco de ĉi tiu vidaĵo, kiam mi vidis ion moviĝi sub la ombro de la fagoj. Poste mi vidis aperi gigantan hundon, grandan kiel bovido, el rufeta koloro, kun nigra muzelo, pendantaj lipoj, elstaraj ostoj. Ĝi malrapide trairis la gazonon kaj malaperis en la ombro de la kontraŭa flanko... La vido de ĉi tiu terura muta gardostaranto frostigis al mi la koron pli ol ŝtelisto ne povintus fari tion, mi kredas.

...Kaj nun mi alvenas al tre stranga aventuro. Mi tondigis,

vi scias tion, miajn harojn en Londono, kaj mi metis ilin funde de mia kofro. Iun vesperon, la infanon enlitigitan, mi komencis ekzameni la meblaron de mia ĉambro kaj ordigi miajn vestaĵojn. Staris tie malnova komodo kies la du supraj tirkesto estis malplenaj kaj malfermitaj, dum la suba estis ŝlosita. Mi plenigis la du unuajn per tolaĵoj, kaj ĉar mi ankoraŭ havis multajn aferojn por aranĝi, mi estis embarasita ne povi uzi la trian. Mi imagis min ke ĝi eble restis ŝlosita pro forgeso, kaj mi prenis mian ŝlosilaron por provi malfermi ĝin. La unua ŝlosilo sukcesis tion. Estis nur unu afero ene, kaj mi vetas ke vi neniam divenos tion kio tio estis : miaj propraj haroj.

...Mi prenis ilin kaj ekzamenis ilin. Estis ĝuste la sama koloro, kaj la sama kvalito. Sed kiel miaj propraj haroj povis esti enŝlositaj en ĉi tiu tirkesto ? Absolute ne eblis. Kun tremantaj manoj, mi malfermis mian kofron kaj en ĝi, retrovis miajn harojn. Mi komparis la du plektaĵojn, ili estis absolute identaj. Ĉu tio ne estis eksterordinara ? Mi vane serĉis, mi ne kapablis kompreni tion kion tio signifis. Mi remetis la aliajn harojn en la tirkeston kaj mi ne parolis pri ĉi tiu aventuro al la Rukastelo^j, ĉar mi sentis ke mi krude malpravis malfermante tirkeston kiun ili ŝlosis.

...Mi estas nature observema, sinjoro Holmso, vi eble rimarkis tion, kaj mi baldaŭ havis sufiĉe precizan planon de la tuta domo en mia kapo. Estis tuta flanko kiu ne ŝajnis al mi loĝata. Pordo apud la apartamentoj de la geedzoj Tollero^j, evidente alkondukis en tiun parton de la domo, sed ĉi tiu pordo ĉiam estis ŝlosita. Iun tagon, tamen, suprenirante la ŝtuparon, mi vidis S^{ron} Rukasteloⁿ trapasi tra tiun pordon, kun siaj ŝlosiloj enmane kaj la vizaĝo tute malsimila al tiu kiu faris la graspuŝeto kaj gajeman viron kiun mi konis. Li havis la vangojn ruĝajn, la frunton tute falditan pro kolero, kaj la tempiaj vejnoj ŝvelintaj. Li ŝlosis

la pordon kaj rapide pasis apud mi sen paroli al mi kaj eĉ sen rigardi min.

...Tio ekscitis mian scivolemon; kaj kiam mi eliris kun la infano por promeni en la ĝardenon, mi direktis min al la flanko, de kie mi povis vidi la fenestrojn de ĉi tiu parto de la domo. Ili estis kvar linie kies tri simple malpuraj, dum la kvara estis obstrukcita. Evidente neniu loĝis tie. Ĉar mi daŭris promeni turnante la okulojn al tiuj fenestroj, S^{ro} Rukastelo ekaperis; li reakiris sian kutiman gajecon.

...- Ha ! li diris, ne kredu min malĝentila ĉar mi pasis apud vi sen paroli al vi, kara infano mia, mi estis absorbita pri grava afero.

...Mi certigis lin ke mi ne ofendiĝis de tio.

...- Pri tio, mi aldonis, ŝajnas al mi ke vi havas tutan serion da neokupitaj ĉambroj tien supren, estas eĉ unu kies la ŝutroj estas fermitaj.

...Li ŝajnis surprizita, kaj eĉ ektimetis je ĉi tiu rimarko.

...- La fotografio estas unu el miaj pasioj, li diris. Mi havas mian senluman kameron tien supren. Sed, Dio mia ! Kia observantino vi estas ! Kiu kredintus tion ? Kiu iam kredintus tion ?

...Li parolis per agrabla tono, sed liaj okuloj ne ŝercis. Mi male legis en ili suspekton kaj incitiĝon.

...Tiam, sinjoro Holmso, en la momento kiam mi flaris misteron, mi havis nur unu ideon : malkovri ĝin. Ne estis nur scivolemo, kvankam mi havas mian parton de ĝi, kiel tiom da aliaj, estis ankaŭ sento de devo, la sento ke se mi enirus tien, tio estus plenumi bonfaron. Oni parolas pri la instinkto de virinoj; eble estas ĉi tiu instinkto kiu gvidis min.

...Ĉiukaze mi havis ĝin; kaj mi zorge gvertis la okazon trairi la malpermesitan pordon.

...Estis nur hieraŭ ke ĉi tiu okazo sin prezentis. Mi devas

diri al vi ke krom S^{ro} Rukastelo, Tollero kaj lia edzino eniras en ĉi tiujn neloĝatajn ĉambrojn; mi eĉ vidis la viron alporti tien dikan sakon el nigra tolon. Ĉitiutempe, li drinkis pli ol kutime, kaj hieraŭ vespere li estis tute ebria.

Suprenirante, mi trovis la ŝlosilon sur la pordo; mi certas, ke estis li kiu lasis ĝin tie. S^{ro} kaj S^{ino} Rukastelo ambaŭ estis malsupre kun sia infano, estis do bonega okazo por mi kontentigi mian scivolemon. Mi malrapide turnis la ŝlosilon en la seruro, malfermis la pordon kaj enŝoviĝis en la malpermesatajn lokojn.

...Mi trovis min en malgranda koridoro sen tapiŝoj kaj kies muroj estis blankaj. Ĉi tiu koridoro orte kurbiĝis; ĉe la fino tri pordoj el kiuj la unua kaj la tria estis malfermitaj sur malplenaj, polvaj kaj malĝojaj ĉambroj, unu kun du fenestroj, la alia nur kun unu. La fenestraj vitroj estis tiel malpuraj ke ili lasis apenaŭ eniri la lumon.

...La meza pordo estis fermita, kaj alfortikigita de tio kio ŝajnis al mi fera litostango, unuflanke ligita de dika ŝnuro, kaj aliaflanke de pendseruro. La pordo mem estis ŝlosita, sed la ŝlosilo ne estis tie. Ĉi tiu pordo evidente respondis al la obstrukcita fenestro kiun mi vidis sur la fasado, kaj tamen la lumadio kiu trapasis sub la pordo, indikis ke la ĉambro ne estas senluma. Vitrotegmento evidente lumigis ĝin. Dum mi rigardis ĉi tiun misteran pordon, demandante al mi kian sekreton ĝi povas kaŝi, mi aŭdis bruojn de paŝadoj en la ĉambro, kaj ĉe la mallarĝa lumlinio kiu filtriĝis sub la pordo, mi vidis ombron moviĝi. Freneza teruro min kaptis ĉe tiu vido, sinjoro Holmso. La kuraĝo subite mankis al mi, kaj mi kurante forfuĝis por eskapi el fera mano kiu strebintus ekkapti miajn jupejn.

...Mi transiris la koridoron, la pordon, kaj falis en la brakojn de S^{ro} Rukastelo, kiu atendis ĉe la alia flanko.

...- Ha ! li diris ridetante, estis vi. Mi pensis tion vidante

la pordon malfermitan.

...- Ho ! mi tiom timis, mi diris anhelanta.

...- Kara, kara fraŭlino, vi ne imagas kiom lia voĉo estis karesa kaj tenera, kaj kion do tiom timigis vin ?

...Sed lia voĉo vere estis tro kaŝolema. Li troigis. Tio tuj faris min singardan.

...- Mi havis la scivolon eniri en la neloĝatan alon, mi respondis al li; sed ĉio estas tiel malluma, tiel dezerta, ke la timo kaptis min kaj ke mi kurante forfuĝis. Ho ! Kia silento en tiu angulo !

...- Estas ĉio ? li diris fikse rigardante min.

...- Sed kion vi volas pli ?

...- Kial vi pensas ke ĉi tiu pordo estas ŝlosita ?

...- Mi tute ne scias.

...- Estas por malhelpi eniri tien homojn kiuj havas nenion por fari tien. Ĉu vi komprenas?

...Li ankoraŭ ridetis laŭ la plej ĉarma maniero.

...- Certe, se mi sciintus...

...- Nu ! Vi nun scias. Kaj se vi iam remetos la piedon ĉi tie, lia rideto rapidege ŝanĝiĝis al koler-kuntiriĝo kaj li teruris min per diabla rigardo, mi donas vin kiel nutraĵon al la laniario.

...Mi estis tiel timigata ke mi ne plu scias tion kion mi faris. Mi verŝajne abrupte forlasis lin por rehejmeniri. Mi ne plu memoras ion ĝis la momento kiam mi retrovis min tute tremantan sur mia lito. Tiam, mi pensis pri vi, sinjoro Holmso. Mi ne plu povis vivi tie sen peti konsilon de iu. Mi timis pri la domo, pri la viro, pri la virino, pri la geservistoj, pri la infano mem. Ili ĉiuj hororigis min. Ŝajnis al mi ke via ĉeesto savus ĉion. Kompreneble mi povintus forfuĝi el la domo, sed mia scivolemo estis preskaŭ tiel forta kiel mia timo. Mi decidiĝis telegrafi al vi. Mi surmetis mian mantelon kaj mian ĉapelon, iris al la telegrafa oficejo kiu

estas proksimume je duonmeĵlo de la domo, kaj revenante, mi jam sentis min senpezigita de ŝarĝego. Mi estis tamen kaptita de abomena timo alproksimiĝante al la domo kaj pensante ke la hundo eble estis maltenita, sed mi memoris ke Tollero tiun vesperon estis morte ebria, ke li verŝajne ne pensis liberigi ĝin kaj ke neniu krom li kapablis fari tion, tiom la besto estis kruelega. Mi revenis sen akcidento, kaj pasigis la duonon de la nokto sen sukcesi dormi pro mia ĝojo baldaŭ vidi vin alveni. Mi facile ricevis la permeson veni al Vinĉestero ĉimatene, sed necesas ke mi estu reveninta je la tria, ĉar S^{ro} kaj S^{ino} Rukastelo iros viziti amikojn kaj forestos dum la tuta vespero, tiel ke necesas ke mi estu apud la infano. Nun mi elmetis al vi la faktojn, sinjoro Holmso, kaj mi estus tre feliĉa havi la klarigon pri ĝi, ĉefe tre feliĉa scii tion kion mi devas fari.

Ni, Holmso kaj mi, aŭskultis ĉi tiun tutan rakonton kun plej intensa atento. Mia amiko stariĝis, komencis paŝegi en la ĉambro, kun manoj en poŝoj, kaj la vizaĝo ekstreme zorgoplena.

- Ĉu Tollero ankoraŭ estas ebria ? li demandis.

- Jes. Mi aŭdis lia edzino diri al S^{ino} Rukastelo ke ŝi nenion povis eltiri de li.

- Bone. Kaj la ge-Rukastelo^j foriros ĉivespere ?

- Jes.

- Ĉu estas kelo, kun fortika seruro ?

- Jes.

- Ŝajnas al mi, fraŭlino Oriono, ke vi kondukis en ĉio ĉi kiel inteligenta kaj kuraĝa virino. Ĉu vi kapablas fari ankoraŭ ion pli ? Mi ne parolus pri tio al vi, se mi ne konsiderus vin kiel escepta virino.

- Mi provos. Kio tio estas ?

- Ni alvenos al purpuraj fagoj, mia amiko kaj mi, je la sepa. La ge-Rukastelo^j estos jam foririntaj, kaj Tollero

estos, mi esperas, ankoraŭ ekster agado. Restas nur lia edzino por sonorigi alarmon. Se vi sukcesus sendi ŝin serĉon al la kelo, kaj meti ŝin sub ŝlositan ĉelon, tio multege faciligus nian laboron.

- Mi plenumos tion.

- Perfekte. Ni tiam fordonos nin al kompleta ekzameno. Estas nur unu ebla klarigo. Vi estis alkondukita tien por ludi la rolon de iu kaj la vera persono estas enŝlosita en la mistera ĉambro. Tio estas evidenta. Koncerne la malliberulinon, mi ne dubas ke temu pri la filino de S^{ro} Rukastelo, Alico Rukastelo, se mi havas bonan memoron, kiun oni diris esti irinta al Ameriko. Vi estis elektita, sen ia ajn dubo, ĉar vi similas ŝin laŭ staturo, laŭ aspekto kaj laŭ haroj. La ŝiaj probable estis tonditaj sekve de malsano, kaj kompreneble la viaj ankaŭ devis esti foroferita. Per stranga hazardo vi trovis la distonditan plektaĵon. La viro en la vojo certe estas unu el ŝiaj amikoj - probable ŝia fianĉo - kiu estas trompita de la simileco kaj ankaŭ de tiu robo de la junulino per kiun vi estis vestita. Li estas konvinkinta per via gajeco kaj via teniĝo ke fraŭlino Rukastelo estas tute feliĉa kaj ke ŝi ne plu deziras ke li amindumu ŝin. La hundo estas ĉiunokte liberigita por malhelpi lin komuniki kun ŝi. Ĉio ĉi estas sufiĉe klara. La plej serioza punkto de la afero estas la naturo de la infano.

- Kian rilaton tio povas havi ? mi ekkriis

- Kara Watsono mia, vi estas kuracisto, kaj vi lernis malkovri la inklinon de infano studante liajn gepatrojn. Ĉu vi ne vidas ke la reciprokeco estas vera ? Mi ofte havis la unuan indicon pri la karaktero de patro studante liajn infanojn. La naturo de tiu kiu okupas nin, estas kruela ĝis nenormala punkto, li turmentas pro pura amo de krueleco, kaj aŭ li ricevis ĉi tiun malvirton de sia patro, ĉiam ridetanta, aŭ de sia patrino, tio estas malĝoja antaŭsigno

por la kompatinda junulino kiu estas inter iliaj manoj.

- Mi certas, ke vi pravas, sinjoro Holms, ekkriis nia kliento. Rememoras al mi mil detaloj kiuj pruvas al mi ke vi estas prava. Ho ! Ne estas perdenda momento por helpi ĉi tiun kompatindan estulon.

- Necesas lertecon, ĉar ni traktas kun ruza viro. Ni povas nenion entrepreni antaŭ la sepa. Ĉe tiu momento, ni estos apud vi, kaj la mistero estos rapide klarigita.

Fidelaj al nia parolo, estis precize la sepa kiam ni alvenis al la purpuraj fagoj, post esti lasante nian veturilon sur la vojo, en gastejo. La aro da arboj, kun malhela foliaro, brilanta kiel polurita metalo en la lumo de la subiranta suno, sufiĉe indikintus al ni la domon, se fraŭlino Oriono mem ne atendus nin, ridetante, sur la sojlo de la pordo.

- Ĉu vi sukcesis ? Holms demandis.

Ĉe la sama momento, ni aŭdis obtuzan bruon venantan el la keletaĝo.

- Estas S^{ino} Tollero en la kelo, ŝi diris. Ŝia edzo ronkas sur la pordomato de la kuirejo. Jen liaj ŝlosiloj, ili estas la samaj kiel tiuj de S^{ro} Rukastelo.

- Vi admirinde sukcesis ! ekkriis Holms entuziasme. Nun montru al ni la vojon kaj ni baldaŭ ekkonos ĉi tiun teruran historion.

Ni supreniris la ŝtuparon, malfermis la pordon kaj laŭiris la koridoron, kaj ni troviĝis antaŭ la barikado priskribita de fraŭlino Oriono. Holms tranĉis la ŝnuron kaj formetis la transversan stangon. Li provis plurajn ŝlosilojn en la seruro, sed sen sukceso. Neniu bruo venis de interne, kaj ĉe ĉi tiu silento la vizaĝo de Holms malheliĝis.

- Mi esperas ke ni ne alvenos tro malfrue, li diris. Mi kredas, fraŭlino Oriono, ke pli bone valoras ke ni eniru sole. Nu, Vatsono, puŝu sur ĝin per ŝultro kaj ni provu enrompi la pordon.

Ĝi estis malnova pordo kiu tuj cedis al niaj klopodoj. Ni ekrapidegis enen. La ĉambro estis malplena ! Estis kiel meblaro nur malgranda tendolito, malgranda tablo, kaj korbo plena de tuko. La vitraro metita en la tegmento estis malfermita kaj la kaptitino foriris.

- Novan perfidaĵon, diris Holms. La bonega viro divenis la intencojn de fraŭlino Oriono, kaj forrabis sian viktimon.

- Sed tra kie ?

- Tra la tegmento. Ni baldaŭ vidos kiel li faris. Li sin tiris tra la luk. "Ho ! Jes, li kriis, jen la fino de longa ŝtupetaro apogita kontraŭ la gutujo. Estas tra tie ke li forprenis ŝin.

- Sed tio neblas, diris fraŭlino Oriono. La ŝtupetaro ne estis kiam la ge-Rukastelo^j foriris.

- Li revenis tute intence. Mi diras al vi ke li estas tre forta kaj tre danĝera viro. Mi ne mirus ke estus li kiun mi aŭdas supreniri. Vatsono, mi kredas ke vi bone farus teni preta vian pistolon.

Li ne finis kiam aperis ĉe la pordo tre dikan kaj tre altan viron kun grandega bastono en la mano. Fraŭlino Oriono laŭte eligis akrasonan krion, kaj sin apogis kontraŭ la muro, sed Ŝerloko Holms ekĵetis sin antaŭ la individuo.

- Mizerulo ! Kie estas via filino ?

La dikulo rigardis ĉirkaŭ li, kaj ekvidis la malfermitan lukon.

- Estas al mi demandi tion al vi, li kriegis, rabistoj ! Spionoj kaj rabistoj ! Mi surprizis vin, ĉu ne ? Vi estas inter miaj manoj. Mi tuj traktos vin laŭ bela maniero !

Li hastis eksteren kaj rapidege malsupreniris la ŝtuparon.

- Li iris serĉi la hundon ! ekkriis fraŭlino Oriono.

- Mi havas mian revolveron, mi diris.

- Pli bone valoras iri fermi la pordon de la domo, rebatis Holms. Kaj ni rapide malsupreniris. Apenaŭ ni estis

malsupren kiam ni aŭdis la bojadojn de hundo, poste iun hurladon de agonio kaj bruon de timiga lukto. Maljuna viro kun vizaĝo ruĝa, kruroj tremantaj, aperis antaŭ la pordo.

- Dio mia ! li kriis. Iu liberlasis la hundon. Li ne manĝis ekde du tagoj ! Rapide, rapide, aŭ estos tro malfrue.

Holmso kaj mi ekkuris eksteren por ĉirkaŭiri la domon, sekvitaj de Tollero. La grandega malsata besto teren faligis Rukasteloⁿ kaj ruliĝis kun li sur la grundo, kun ĝia faŭko enigita en la gorĝon de la viro. Mi alproksimiĝis kaj eksplodigis al ĝi la cerbon per pafo de revolvero; ĝi sinkis, sed ĝiaj blankaj dentoj ne forlasis la grasajn faltojn de la kolo de sia viktimo. Penege, ni disigis ilin kaj transportis en la domon la vunditon, ankoraŭ vivan, sed abomene ŝirita. Ni etendis lin sur sofo, kaj dum Tollero iris serĉi sian edzinon, mi faris tion kion mi povis por mildigi liajn dolorojn. Ni ĉiuj estis ĉirkaŭ li, kiam la pordo malfermiĝis kaj cedis la trairon al granda kaj forta virino.

- Sinjorino Tollero ! ekkriis fraŭlino Oriono.

- Jes, fraŭlino, S^{ro} Rukastelo enirante malfermis al mi, antaŭ ol kuniĝi kun vi tien supren. Ha ! Fraŭlino, kia bedaŭro ke vi ne diris al mi viajn projektojn, mi povintus informi vin ke tio estis senutila.

- Ha ! diris Holmso, atente rigardante ŝin. Estas evidente ke S^{ino} Tollero scias pli ol iu ajn pri tio.

- Jes, sinjoro, kaj mi estas preta diri ĉion kion mi scias.

- Nu ! Sidiĝu, kaj diru tion, ĉar mi konfesas ke estas pluraj punktoj kiuj restas malklaraj por mi.

- Mi tujrapide klarigos al vi, kaj mi farus tion pli frue, se mi povus eliri el la kelo. Se la tribunaloj entrudiĝos en tio, vi rememoros ke mi samcele agas kun vi, kiel mi ĉiam deklaris min por fraŭlino Alico.

...Ŝi neniam estis feliĉa hejme, fraŭlino Alico, ekde kiam sia patro reedziĝis. Ŝi estis metita flanken kaj ne rajtis

malfermi sian buŝon; sed estis multe pli malbone kiam ŝi konatiĝis, ĉe amikoj, kun S^{ro} Logbirdo. Mi vere kredas ke fraŭlino Alico, sekve de heredaĵo, havis personan riĉaĵon; ŝi estis tiel dolĉa kaj tiel pacienca, ke ŝi neniam parolis pri tio kaj lasis ĉion inter la manoj de sia patro. Li sciis ke estas nenio por timi de ŝi : sed kiam oni parolis pri edzo kiu postulus sian tutan rajtaĵon, tiam li volis malebligi la geedziĝon. Li provis subskribigi ŝin paperon laŭ kiu, edziniĝinta aŭ ne, ŝi lasus al li la liberan disponon de sia riĉaĵo. Ĉar ŝi rifuzis, li turmentis ŝin ĝis kiam ŝi havis febron kiu kondukis ŝin al la mortosoĵlo dum ses semajnoj. Fine ŝi malrapide resaniĝis, sed ŝi estis nur ombro de si mem, kaj ŝiaj belaj haroj devis esti tonditaj. Tio ne ŝanĝis la amsentojn de sia amanto kiu restis fidela al ŝi spite ĉiujn obstaklojn.

- Ha ! diris Holmsø, tio klarigas ĉion, kaj mi nun kredas, diveni la ceteron. S^{ro} Rukastelo tiam adoptis ĉi tiun sistemon de malliberigo !

- Jes, sinjoro.

- Kaj venigis fraŭlinon Orionoⁿ el Londono, por liberigi sin de la malagrabla persisteco de S^{ro} Logbirdo ?

- Precize, sinjoro.

- Sed, S^{ro} Logbirdo, havanta persistecon kiel decas al bona maristo, sieĝis la domon kaj, renkontinte vin, sukcesis per iaj argumentoj, metalaj aŭ aliaj, persvadi vin ke viaj interesoj estas samaj kiel la liaj.

- S^{ro} Logbirdo estas tre afabla ĝentlemano, kaj tre donacema, trankvile respondis S^{ino} Tollero.

- Kaj tiel li sin aranĝis por ke via kara edzo havu ĉiam por drinki, kaj ke ŝtupetaro estu tute preta por la momento kiam via mastro elirus.

- Vi diras tion, sinjoro, tute kiel tio okazis.

- Mi certe ŝuldas al vi dankojn, sinjorino Tollero, ĉar vi

klarigis ĉion kio malkvietigis nin. Sed jen la kuracisto de la vilaĝo kaj S^{ino} Rukastelo; mi kredas, Watsono, ke ĉio kio restas por fari estas eskorti fraŭlinon Orionoⁿ al Vinĉestero, ĉar ŝajnas al mi ke nia plenrajteco nun estas tre malmulte certa.

Kaj tiel estis klarigita la mistero de la sinistra domo kun la bosketo de purpuraj faboj. S^{ro} Rukastelo pluvisis, sed kun sano ĉiam ŝanceliĝema, kaj li gardis la vivon nur dank'al la sindonaj zorgadoj de sia edzino. Ili ankoraŭ havas kun si siajn malnovajn geservistojn kiuj tro konas ilian pasintan vivon por ke estu facila maldungi ilin. S^{ro} Logbirdo kaj fraŭlino Rukastelo estis, per speciala escepto, geedziĝintaj en Sudemptono la morgaŭon de ilia fuĝo; li nun estas okupanta oficialan postenon en Maŭricio. Koncerne fraŭlinon Violetaⁿ Orionoⁿ, je mia granda disreviĝo, mia amiko Holmsø tute seninteresiĝis pri ŝi, ekde la tago kiam la problemo estis solvita, kaj ŝi nun estas en Valsalo, ĉe la estreco de tre prospera privata lernejo, oni asertas al mi.